

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription with membership: \$A3.00
(or 43 reply coupons).

Advertising: 3 lines: \$A1.50.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084.
Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road,
Willoughby, N.S.W., 2068.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 88 Verney Rd. West, Graceville, Qld., 4075.
Address of A.E.A.: Box 415, P.O., Manly, N.S.W. 2095.

N-ro 72 (152)

MELBURNO

Jan. - Feb., 1969

PREZIDANTA ALVOKO



Karaj Gemembroj:

La Aŭstralia Esperanto-Asocio ĵus alvenis al nova etapo en sia historio, etapo, en kiu ni ĉiuj povas ludi gravan rolon.

La unua grava evento en ĝia historio estis ĝia renaskiĝo en la jaro, 1948, kiam

Herbert Koppel alvenis en Aŭstralion, kaj komencis revivigi la preskaŭ mortintan organizon. Obstine li marŝigis ĝin malgraŭ la fakto, ke ĝi estis tiel malriĉa, ke ĝi konstante svenis pro malsato. Tion mi forte konstatis dum mia unua periodo kiel prezidanto.

Mi devas akcepti iom da kredito pro la dua etapo, ĉar ĝi komenciĝis en la jaro, 1956, kiam mi fariĝis kasisto, kaj dum dekdu jaroj mi laboris por efektiviĝi finance fortan organizon.

Nun nia landa asocio estas vigla kaj forta organizo, preta fari grandan laboron, sed mankis motoro, persono energia kaj vigla, kiu povus dediĉi la tempon al la afero. Nu, ĝuste nun la tempo alvenis, ke ni komencu tiun laboron, ĉar ni jam trovis tiun motoron en la persono de Tiny Goldsmith, nia nova sekretario.

Motore bezonas brulaĵon, kaj tiun brulaĵon la membroj de A.E.A. devas provizi. Sidnejo kaj Melbourne demontris sian amon al la movado,

kiam ili donacis por starigi proprajn domojn, kaj, kiam mi, kiel kasisto, petis subtenon por Aŭstralia-Cambra Fonduso, la tuta lando malavare donacis. Nun ni havas alian subtenindan aferon, do ni ĉiuj plene atentu. Tri-dek membroj jam kune donacis la sumon de ĉirkaŭ \$250 al la Publiciga Fonduso. Imagu! Kio okazus, se la aliaj 270 same donacos? Ni pruvu al la cetera mondo, ke Aŭstralio vere vivas.

Tiny Goldsmith jam klarigis sian kampanjon en la lastaj tri numeroj de "Australian Esperantist". Nun ni subtenu lin. Ni metu nian ŝultron al la rado, kaj tre baldaŭ la ĉaro ruliĝos. Ĉio komenciĝos per la disdono de la verda karto, do petu provizon kaj disdonu ilin, ne sence, sed prudente, diligente, kaj konstante.

Nia unua celo estas pligrandigi la membraron je 50%. Se ni povos tiun celon atingi — kaj ni facile povos kun via plena subteno — ĉiu membro gajnos bonan servon inkluzive de granda kaj interesa gazeto sen pli granda kotizo.

Antaŭen el la trian etapon!

Via prezidanto, Ken G. Linton.

**AŬSTRALIA
ESPERANTO - ASOCIO
P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095.
OFICIALA INFORMILO**

Novaj Individuaj Membroj:
Cardale, F-ino F., Balgowlah, N.S.W.
Vincent-Smith, F-ino B., Manly,
N.S.W.
Lindsay F-ino J., Claremont W.A.

Fink, F-ino M., Mt. Waverley, Vic.
 Davidson, S-ro T., Kew, Vic.
 Kam, S-ino E., Ashburton, Vic.
 Bastin, S-ro K., Parkville, Vic.
 Pisz, S-ro T., Clayton, Vic.
 Robinson, S-ro M., Aspley, Qld.
 Staggord, S-ro L., Wantirna S., Vic.
 Egset, S-ro R., Buranda, Qld.

Donacoj al la Publiciga Fonduso:

Jam anoncita	\$173.30
Greenhalgh, S-ino W., Qld. ...	10.00
Rosegren, S-ro H., Vic.	10.00
Robertson, Ges. R., N.S.W. ...	10.00
Smith, S-ro K., N.S.W.	2.00
McQueen, S-ro D., Vic. ...	5.00
Dean, S-ro C., W.A.	5.00
Lindsay, F-ino J., W.A. ...	2.00
Hunt, S-ino O., W.A.	5.00
Gray, F-ino J., W.A.	5.00
Oliver, Ges. A. C., Anglujo ...	7.32
"Freedom of Speech"	3.55
Cooper, Ges. G., Tas.	2.00
Blockley, S-ino S., W.A.	7.00
Horsburgh, S-ino R., N.S.W. ...	5.00
Hopkins, S-ino A., Vic.	4.00
Williams, F-ino B., Vic. ...	5.00

\$261.17

Sinceran dankon al ĉiu helpanto:

Celo \$2,500. Kiu sekvos?

Interŝtata Konkurso

Poentoj donataj:

Nova individua membro	5
Nova dumviva membro	50
Aliĝo al Popular Corr. Course	2
Ĉiu \$1 al Publiciga Fonduso	1

Stato je 18a de Januaro 1969:

	Kvoto	Poentoj	%
N.S.W. & A.C.T. ...	260	179	68.8
Victoria	300	179	59.6
W. Australia	80	36	45.0
Queensland	130	53	40.9
Tasmania	30	2	6.6
S. Australia	40	—	—

Novaj Lokaj Reprezentantoj:

N.S.W.—

Bowral: S-ro V. E. Fletcher.

Lane Cove: S-ino O. Russell.

Queensland—

Gladstone: S-ino F. Denney.

Victoria—

Noble Park: S-ro H. Beechey.

Sandringham: S-ro J. Ryding.

—C. C. Goldsmith, Sekretario.

Krei homojn, kiuj povas rezisti la premadon de komerca reklamado—jen eble unu el la plej gravaj devoj de la nuntempa edukado. — D. Rhymes, kanono, Southwark.

Australia Kroniko

PERTH: Nia Jarkunveno okazis 9/12. La Ligo havis en 1968 43 plenrajtajn, 17 asociajn kaj 2 dumvivajn membrojn, entute do 62. Enspezoj superis elspezojn je \$78. Estraro por 1969: Prez.: S-ro C. W. Dean; Vic.-Prez.: S-ino E. McGrath; Sekr.: S-ro W. H. Howard; Kasisto: S-ro N. Bowers; Biblioteko: F-ino V. Egan; Ekzamenoj: S-ino G. Pollard; Informado: F-inoj J. Gray, O. Hunt, S-ino S. Blockley; "Nigra Cigno": S-ro J. Hawks, S-ino E. Palmer.

La Zamenhofa Festo okazis 16/12 en Forrest House. 32 ĉeestis. Nia gasto, S-ro Cecil Goldsmith (Manly), faris la festparoladon. Sekvis artista programo, dank' al la klopodoj de D-ro Einihovici. F-ino Modra kaj S-ro Lingard kantis kaj F-ino Dobie provizis muziken Vespermanĝo finis sukcesan vesperon.

La vizito de S-ro C. Goldsmith provizis unikan okazon propagandi Esperanton. La matena ĵurnalo "West Australian" raportis pri la vizito kaj la privatkomerca TV-Stacio "Channel 9", intervjuis S-ron Goldsmith. La gazetan raporton legis i.a. nederlandaj Ges-roj Bosman de Wilson, esperantistaj enmigrintoj, kiuj neatendite ĉeestis la Zamenhofan Feston.

MELBOURNE: S-ro F. R. Banham prezentis 2/12 ankoraŭ unu mikspoton da pensinstigaj rakontoj.

La deviga ŝanĝigo al nova loko por la ĉi-jara Zamenhof-Festo (14/12) havis bonan rezulton. La multe pli bela YWCA-halo donis al la okazo agrablan etoson de eleganteco, en kiu ĉiu programero surprisn sur sin pli ol kutime solenan dignon. Bedaŭrinde ke la homoj, al kiuj la ĉeestantoj omaĝis, jam estas mortintaj!

Per ĉiaspeca uzado kaj pluigado de Esperanto, la partoprenantoj honoris al ĝia kreinto, D-ro Zamenhof, kaj, per rakonto pri la vivo kaj verko de unu el liaj disĉiploj, S-ino Fay Koppel elvokis honoron al Len Newell, kiu mortis je 7-a de Nov. 1968. Iom mildigis la malĝojon la rava pianludado de Kim Bastin, komence de, kaj kelkfoje dum, la programo, inkluzive de gajiga komuna kantado 57-voĉa. Eĉ ridinstigaj estis kelkaj

poemoj de Raymond Schwartz, deklamitaj de S-ro Koppel. Ie intere troviĝis, kaj mistere efikis, la eksperimento pri novmada fantazio "Psychodelics", aranĝita de S-ro James Rae, sed tio ja ebligis al la ĉe-stantaro cerban malstreĉigon kaj tempon por meditado.

Prezidanto E. McKenzie, nome de la M.E.S., bonvenigis ĉiujn, inkluzive de vizitantoj, S-ino Doris Sinclair (Kvinslando) kaj S-ro C. Goldsmith (Manly). Ĉi tiuj poste mem salutis kaj skizis agadon en la propraj medioj. S-roj C. Stevenson kaj R. Reed same faris nome de la Orrong E-Grupo kaj la E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj.

En la fina Festparolado, S-ro Bannham pritraktis la temon "La nuntempa situacio de E-o", en kiu li komparis kaj kontrastis la nunon kun la situacio en la tempo de D-ro Zamenhof. Li atentigis ke la malfaciloj estas nun pli multnombraj kaj petis ke oni ne malpropagandu la lingvon per troigo pri ĝia facileco, kiu estas nur kompara.

Eksonis denove la instiga pianludado de Kim Bastin, aŭdiĝis la Espero kaj vikle funkciis la langoj dum la posta regaliĝo per sandviĉoj, kukoj kaj teo.

La jarfinan festeton en la E-Domo (16/12) partoprenis 20 ges-anoj. Per sonbendo ni aŭdis poemojn de D-ro Zamenhof deklamitajn de Len Newell, S-ro H. Beechey parolis pri sia kvara jaro kiel Esperantisto, kaj S-ino Doris Sinclair montris diapozitivojn pri la ĉirkaŭaĵo de Buderim. Per vespermanĝeto finiĝis ankoraŭ unu agrabla jaro en la Melburna E-Domo.

MORWELL: S-ro Maddern stailogos intensan kurson de E. Ĝi daŭros ses semajnojn (de la mezo de Feb. ĝis la fino de Marto). Kursfine, jam dediĉinte 15 studhorojn en ĉiu semajno, ĉiu studanto esperinde povos flue legi, skribi kaj paroli la lingvon. La kosto: dek dolaroj. Tio rajtigas al ĉiu studanto lernlibrojn kaj membrecon de la A.E.A. kaj la U.E.A., kune kun la eldonajoj de tiuj asocioj.

SYDNEY: Vizitis nin, 18/11, S-ro van Linde, blinda E-isto nederlanda, kiu vizitas dum 5 monatoj sian fratinton loĝantan en Sydney. Li estas el Amsterdam, el la sama urboparto kiel Rita v. Rijswijk. Tamen, ili

konatiĝis ĉi tie. Li raportas ke la nederlanda movado estas iom malforta, ŝajne pro lernado de la angla lingvo. La programon prizorgis F-ino Rijswijk, kiu laborigis niajn cerbojn per serĉado de vortoj. S-ro W. Chandler raportis 25/11 kiel li intervjuis "Bilabongajn bestojn" kaj speciale la "Bunjipon". Laŭ sia memoro li desegnis la bestojn, fotografis la desegnojn kaj montris ilin lumbilde. Li ankaŭ aŭdiĝis la voĉojn de la bestoj per sonbendo. S-ro F. Dunn parolis, 9/12, pri "la vivo de Sebastiano Scragg."

La Zamenhofa Festo okazis je 14/12. Ĝi okazis en la E-Domo sub la aŭspicio de E-Federacio de NSW, kaj estis aranĝita de la Manly E-Klubo kaj Sydney E-Societo. Post enkondukaj vortoj de la prezidanto (S-ro R. Robertson), sekvis la festparolado de S-ro Kevin Smith en Esperanto, kun angla resumo. Post komuna kantado, S-ro V. Bourlin prezentis lumbildojn laŭ pentraĵoj kiujn li faris. Sekvis 2 teatraĵoj de la Manly dramo-grupo. Komuna kantado kaj vespermanĝeto finis la vesperon, kies programo estis iom longa.

S-ino V. Schlesinger 16/12, legis noveleto "La kaptilo de Dio", de M. Boulton. Ĉeestis S-ro C. Bereau, kiu informis nin ke lin nun iros al Tasmanio, poste al Sudameriko por labori tie dum unu jaro.—VOLO.

MANLY: Post kursoj en la Vespera Kolegio okazis klav-kunveno 8.15-9.30 kun jenaj programoj: 14/11 S-ro P. E. Schwerin: Lumbildoj pri Nederlando; 21/11 S-ro C. C. Goldsmith: La Laborplano de A.E.A. Nia Kursinfesto okazis 28/11 kun teatraĵoj prezentitaj de Margaret Liston; bambu-flutoj luditaj de la muzikgrupo sub Dorothea Taylor; kaj komuna kantado akompanita de Colin Tringham (akordeono). 5/12 ni kunvenis en la hejmo de Ruth Carruthers por plani novan agadon. 13/1-18/1 okazis Esp.-ekspozicio en la vestiblo de la Urba Biblioteko. Prizorgis ĝin Tiny Goldsmith kun helpantoj. La preterpasantoj montris intereson kaj kelkaj promesis aliĝi al nova kurso, kiu komenciĝos 6/2 en la Vespera Kolegio. 18/1 en "St. Matthew's Church Hall, The Corso" ni montris al la publiko diversajn flankojn de Esp. klub-agado. Raporto sekvos.

Multnombro niaj anoj partoprenis en Fed-aranĝoj: 17/11 Pikniko ĉe West Head; 8/12 Kristnaskfestoj ĉe Ruth Carruthers; 14/12 Zamenhofa Vespero ĉe Esp. Domo.

—Marjorie Duncan.

BRISBANE: 11-14 Nov. S-ino Violet Yowe kun la helpo de Tom Donnelly, Kay Davies, Val Robinson kaj F-ino E. Cooney disdonis propagandilojn pri Esperanto en la granda libro-vendejo "Queensland Book Depot", en kies fenestro estis ekspozicio de E-libroj kaj diskoj.

La Zamenhof-Festo okazis 2/12 en la hejmo de Ges-ro T. Donnelly. Vizitantoj el Redcliffe partoprenis kaj kontribuis al programo. S-ino Yowe rakontis ŝercojn, S-ino Robinson legis rakonton, Arlette Gillies ludis kantojn, S-roj McDonnell, Cullinan kaj S-ino Donnelly pianludis. S-ro T. Donnelly kaj filino rolis skizon.

—T. Donnelly.

Western Suburbs - Brisbane elektis novan novan estraron: Prez.: S-ro R. Ross; Sekr.: S-ino D. McDonald; Kasisto: F-ino D. Sciefelbein; Biblioteko: S-ino R. Ross; Informado: S-ro H. V. Petley; Komitatanoj: S-inoj Atwood kaj Blackwell.

Post nur 8-monata lernado kelkaj studentoj jam komencis korespondi kun eksterlandaj E-istoj.

—H. V. Petley.

REDCLIFFE: A successful afternoon party, followed by a barbecue, 14th December, marked the close of the activities of the Adult Esperanto Group for 1968.

We were pleased to welcome the Mayor of Redcliffe, Alderman Kroll and Mrs. Kroll, and the Member for Redcliffe, Mr. Houghton and Mrs. Houghton.

The President, Mrs. Pritchard, opened the Festo by proposing a toast to the Queen. Guests were welcomed and a talk given by Mrs. Styles on Zamenhof, the creator of Esperanto, after which a toast was drunk to his memory and to the success of Esperanto. Mr. Kroll spoke on the history and progress of the Redcliffe Esperanto Group and expressed the wish to see the ideals and aims of the movement extended far beyond their present limits.

Afternoon tea in the shade of the trees was a happy relaxed affair.

Two plays were given by the newer members of the Group. Those taking part were:—Mesdames MacMillan, Gilles, Moy, Misses B. Kent, L. Moy, A. Gilles, and Mr. Marcus Clark. Mr. V. C. Clarke took the part of Mr. R. Bond, who was unavoidably detained.

After a few competitions, the barbecue began. Mrs. Kath. McAdam, Mr. Secombe, and Mr. V. C. Clarke cooked the steaks to perfection, and salad and tarts prepared by Group members completed a happy meal.

Singing in Esperanto and English followed. Miss Arlette Gilles played her guitar and sang a French folk song, an English one, and an Esperanto song of her own composition, to which she had also composed the tune.

Mr. Houghton thanked the Group for a pleasant evening and expressed appreciation for the aims of the Group, doing their tiny share to help alleviate some of the misunderstandings in our "sick old world".

The Group presented Mr. and Mrs. V. C. Clarke with a beautiful flower bowl, the handwork of Mrs. Pritchard, in appreciation of their work for Esperanto during the year.

—J. Clarke.

MANLY ESPERANTO-KLUBO

Finigis la unua jaro en la vivo de nia drama grupo. Naskiĝinte pro la iniciatemo de Tiny Goldsmith kaj reĝisorate de Margaret Liston, antaŭa direktorino kaj ĉef-rolistino en "Garrick Productions", Sydney, la grupo sukcesplene prezentis dum la jaro multvariajn teatraĵojn kaj skeĉojn.

Elstare amuzaj kaj vivplenaj estis "La Drasta Kuracado" de Marjorie Boulton, "La Ĉapelo" de Lucy Bruce, "La Kara Forpasinto" tradukita de V. J. Timmins, kaj du vervaj komedioj verkita de Margaret mem, "La Edzec-agentejo" kaj "La Ĝoja Koro".

Oni multe ridis ankaŭ pri serio da skeĉoj, lerte prezentitaj kun trafa atento pri scenajo kaj etoso.

Unue la grupanoj renkontiĝis ĉusabate en Hotel Manly, sed lastatempe ili translokiĝis al la Vespera Kolegio, kie Margaret ĉiujaŭde instruis ilin pri dramo en la kadro de la Esperanto-temaro.

La grupo prezentis teatraĵojn je kvar specialaj okazoj: 6/1 en Hotel Manly dum la 16a Aŭstralia Kongreso; 20/4 en Hotel Wallacia dum la 5a Konferenco de la Federacio de N.S.W.; 27/7 en Esperanto-Domo dum la 6a Konferenco; 14/2 ĉe Zamenhof Vespero en Esperanto-Domo.

S-ino Liston jam planas programon por la nuna jaro. Faciligos ŝian laboron nova arango permesata de la lernejestro, kiu metos je ŝia dispono grandan halon kun scenejo. Tie ŝi gvidos dramon kurson 7-9 ptm. ĉiun lundon. Ĉi tiu plano ebligos, ke la partoprenantoj povos ĉeesti ankaŭ la ĉiujarajn Esp-lectionojn kaj klubkunvenojn.

Gratulon kaj daŭran sukceson al la grupo!—Marjorie Duncan.

VANA VENO!

P. 229. Ankoraŭ venas avizoj, informoj el Eŭropo, kiuj havas multan aŭ nenian utilon ĝuste pro malfrua ricevo ĉi-landa. Hodiaŭ, la 14-a de Jan., la redakcio ricevis anoncon pri konkurso de la Pola Radio. Limdato—31-a de Jan. Ĝi tial ne povas esti publikata en nia gazeto, ĉar la sekvanta numero (nome ĉi tiu) aperos nur fine de Februaro.

SUR TERO DE ALIA . . .

Al soldatoj irontaj al Vjetnamo:

“Neniam ni dezirus militi en areo en kiu loĝas niaj virinoj, infanoj kaj maljunuloj. Se ni devas batali, ni batalu kiel eble plej for de nia hejmlando”.—S-ro McEwen, vic-ĉefministro Aŭstralia. “Age”, 25 Jan. (Komento?)

HELSINKI CONGRESS

The 54th Congress of the Universal Esperanto Association will be held at Helsinki from 26th July to 2nd August, 1969.

Our representatives in Finland are official travel agents for this important meeting.

For details and reservations, apply COOKS' WORLD TRAVEL SERVICE at:

Adelaide: 142 North Terrace. Tel. 51-1174.

Brisbane: 278 Edward Street. Tel. 2-2379.

Melbourne: 159/161 Collins Street. Tel. 63-2442.

Perth: 51 William Street. Tel. 21-2896.

Sydney: 175 Pitt Street. Tel. 25-4401.

MAY HARRISON: 1911

D-ro Fridenbergs kopiis longan manuskripton de May D. Harrison, pri ŝia vizito en 1911 al Manila. Sia nomo aperas sur p. 271 (“A.E.”) kiel membro de la unua E-klubo en Aŭstralio. Detale ŝi priskribis la gastemon de la Filipinoj, ilian festamon, industrian, higienon, religiajn ritojn k.t.p.

Anoncite en la urba gazetoj, ŝia prelego antaŭ la “Zamenhofa Rondo” altiris multajn, inter ili bonaj E-istoj.¹ Ne sciante la Hispanan, ŝi parolis tute en E-o.

Nomoj menciitaj: S-roj Cadell, McZelland, de Garcia, D-ro Ramora.

Ĝi estas historie valora dokumento, kaj cetere la unua priskribo de longa transmara vojaĝo pere nur de E-o.

Si estis porblindula bonfaranto, instruis E-on. Baldaŭ post la Unua

Mondmilito ŝi mortis. Laŭ ŝia deziro oni faris ĉizitan surskribon en E-o sur ŝian tombon en Melburno. Antaŭ 19 jaroj ŝia amiko S-ro Drummond kondukis D-ron Fridenbergs vizite al ĝi.

La originalo de la mss. estas en la E-muzeo (Morwell)

NEKROLOGO

La 11-an de Oktobro mortis Esperanto-veterano, S-ro D. Guilbert, 84-jaraĝa. Iama delegito de UEA, li praktikis kaj instruis Esperanton pli ol 40 jarojn. Du monatojn antaŭ sia morto li vundiĝis en aŭtomobila akcidento kaj kuŝis hospitala pro rompita kruro. Liaj intimaj amikoj, Ges-roj Looirts, faris funebran paroladeton ĉe la entombigo.

A.E.A. BOOK SERVICE**BALANCE SHEET AT 30.6.68****LIABILITIES**

Accumulated Fund at 1.7.67	\$2968.71
Profit for Year	277.17

Accumulated Fund at 1.7.68	3245.88
Sundry Creditors	21.88

\$3267.76

ASSETS

Cash at Bank	\$880.11
Cash on Hand	5.00
Stock	2126.47
Debtors	202.19
Furniture at Cost	53.99

\$3267.76

REVENUE ACCOUNT**Year Ended 30.6.68**

Stock 1.7.67	\$1956.88
Purchases	1326.58
Postages	73.97
Bank Charges	8.25
Insurance (Norwich Union)	10.31
Printing & Stationery	36.24
Subscription to U.E.A.	6.50
Subscription to B.E.A.	2.00
Donation	4.50

\$3425.83

Profit	277.17
--------	--------

\$3703.00

Branch Sales	\$790.46
Credit Sales	478.49
Cash Sales	271.44
Correspondence Fees	1.97
Bank Interest	34.17
Stock	2126.47

\$3703.00

BANDEROLE?

Verŝajne, ke en iuj Eŭropaj landoj la Poŝto ne enlasas gazetojn alilandajn se ili iras perbanderole, sed almenaŭ iufoje enlasas ili sub leterkoverto. Jen afero, pri kiu ni volonte informiĝus per klarigo de homoj en la koncernaj landoj. Iom grava estas: ke ni povas sendi subkoverte nur du ekz. de "The A.E." (ofte kun nur formala letero) por 7c., sed ses ekz. sub banderolo por 5c. Kiel efektive staras la afero, kamaradoj?

Recenzoj

"Secondary School Esperanto", Book 1, by R. H. M. Markarian, M.A., F.B.E.A., and J. H. Sullivan, F.B.E.A. Published by University Tutorial Press Ltd. 143 pages. Price 9/6 English.

This is the first of three books for use with pupils aged 11 and over. Its vocabulary of about 800 words and 17 affixes gives to the learner ability to form well over 2000 words after a year's study. As a learner increases his root-vocabulary, his ability to form derivatives expands also. Here we remark, that W. T. Oeste, in his "Esperanto, Mittler der Weltliteratur", after deriving 200 variations from the stem "help", states that from the official roots, 4425, may be formed some 200,000 words by use of affixes.

The table giving the names of countries in Esperanto follows usage of the U.E.A. Jarlibro, differing from it only in the choice of Finnujo, Danujo (Finnlando, Danlando: U.E.A. Yearbook).

There are 20 lessons, with 7 pages of effectively presented revision exercises. Verses, songs, playlets and vocabulary form the closing pages.

The diction of the earlier lessons, particularly, is oriented interestingly to the school-life of the pupils, and the amusing illustrations by Kenneth Wootton, a brilliant caricaturist, so different from the conventional forms of early language primers, conform to a cartoon-culture generation.

The authors stress the truth that Esperanto is not "just another language". Its learners, by its use, have access not to one or two countries as with students of a national tongue, but to eighty in which Esperanto has taken root. A pupil should have several pen-friends by the end of the course, or even earlier, we would say.

Hints on project material are given, and exchange visits as individuals or in parties are recommended, together with other useful advice to teachers.

The authors are outstanding men in Esperanto and Education. They hope the book will serve not only British pupils like their own who are offering Esperanto in the newly in-

roduced Certificate of Secondary Education, but also those in other English-speaking countries.

In his Foreword on The Value of Esperanto Teaching, Dr. Mario Pei, Professor of Romance Philology at Columbia University, sets down three notable advantages.

"NORDA PRISMO", 1968 (2) 112 paĝoj. Kvaronjare. 43 steloj.

Jen fasko da 25 eroj ĉiaspecaj. Benczik honeste, "senlake", traktas la poemojn de Felikso ("Fez"), frato de L. L. Zamenhof. Lia verka vivo daŭris jam de 1888 ĝis lia morto en 1933. Unika studo pri memorinda homo, fidela subtenanto de lia pli fama frato.

Auld donas sian tradukon el romano de Howard Spring, "There is no Armour" (Ne estas kiraso).

Van Themaat sin metas en la jaro 2010, fantaziante pri supozita morto de Esperanto. Por sia pensiga "nekrologo" li prenas kiel bazpenson iun paragrafon el la antaŭparolo de Auld ("E-a Antologio", p. 19).

Cichova historie rigardas la Mil Jarojn de Judaismo en Cehaj landoj. Simpatia prezento pri la sortaj zigzagoj de tiu malfeliĉa popolo ĝis ĝia infero sub la Nazioj. La aŭtoro invitas E-istojn al la renoma Stata Juda Muzeo en Praha.

Maimon finas sian valoran vortbilden pri la Familia Vivo de Marko Zamenhof. Leginda suplemento al lia studo en "Nica Lit. Revuo" (Jan.-Aprilo, 1959). Ciu Zamenhofologo devus posedi ambaŭ artikolojn.

Darazs dediĉas al Szi lagyi iun strangan biohemian novelon. Ĝia rilata signifo al la fama E-isto ne klare evidentas.

18 poemoj, krom ilustrtoj, recenzoj k.a.

"Norda Prismo" progresas, abonoj kreskas, sed eldonadi ĝin estas multekoste. Do, subtenu lateble la laboron de ĉi kuraĝaj homoj, kiuj fidele tenas la torĉon de la internacia kulturo.—Perantas Ken Linton.

A.E.A. EXAMINATIONS

Fees for the Elementary and the Advanced have been amended thus: Elementary 2 dol.; Advanced 3 dol. This covers all, i.e., written, oral and diploma.

PERTH ALVOKAS VINI!

Ĝis la nuna jardeko oni traktis la ĉefurbon Perth kiel dormeman loĝlokon en ŝtato kiu konsistas el sablo, malĝojo kaj doloraj okuloj. Sed antaŭ kelkaj jaroj la giganto vekigis kaj Okcidenta Australio jam grande kontribuas al la produktado de Aŭstralio kaj la akiro de eksterlanda kredito.

Ĝi posedas la plej produktan olefontaron de la kontinento; nordokcidente, minerala minado postulas grandajn havenojn. Povas esti, ke post kelke da jaroj la haveno Port Hedland traktos pli da tunoj da ŝipŝarĝo ol kiu ajn alia haveno en Aŭstralio!

Aliregione grenrikolto pligrandigas, ŝafoj plinombrigas, kaj plejnorde la konstruado de la digo Ord ebligos pluan progreson.

La evoluado de la ŝtato speguligas en la plivastiĝo de Perth, kiu tamen ne estas perdinta sian ĉiaman ĉarmon —ĉarmon, kiun prezentas la pitoreska rivero Swan kaj la granda publika parko ("King's Park"), kiu super-rigardas la tutan pejzaĝon. Oriente la montetoj allogas per plezure pacaj pikniklokoj, dum okcidente la ondoj de la Hinda Oceano falas sur blankaj sablozaj strandoj.

Baldaŭ Esperantistoj havos oportunon vidi tiun belan urbon. La 17-a Kongreso de la A.E.A. okazos en Perth: 4-a ĝis 10-a de Januaro, 1970. Partoprenu ĝin kaj ĝuu libertempon en unu el la plej ĉarmaj urboj en Aŭstralio. Post ne longe ĉiu membro de la A.E.A. ricevos cirkuleron pri la kongres-planoj. Zorge ĝin studu; ne prokrastu respondon. La Esperantistaro de Perth varme bonvenigos vin kaj viajn geamikojn.

—W.H.H.

PHOTOSTATS

Any text available to the U.E.A. may be photo-copied for 0.50 guld. (15c) in format A4 (310 x 297 mm). Thus cheaply can one possess a facsimile of a page from our early gazettes, dictionaries, &c., for authentication, research, or sheer pleasure.

RECENZOTAJ

"Vivo de Zamenhof" (Privat): 5-a eldono. "Esperanto por Infanoj" (G. G. Solomon): 6-a eldono. Mendu ĉe Libroservo.

MORWELL HIGH SCHOOL

A "crash" course in Esperanto will be held here for six weeks, from mid-February to end of March. About 15 hours a week will be devoted to the subject, which should make all participants fluent in reading, writing and speaking the language. It will cost each student 10 dol. for books and membership of the Australian Esperanto Assn. and the Universal Esperanto Assn. Among the publications distributed to members are "The Australian Esperantist", the central organ "Esperanto" together with the world centre's annual Year Book, which gives names and addresses of some 3500 representatives in over 60 countries and detailed information on Esperanto in every field.—I. Maddern, Principal, Morwell High School. ("Morwell Advertiser" and "Traralgon Journal", 19/12, featured the course.)

S-INO D. THRELFALL

Vojaĝante en Japanujo, ŝi parolis horon kun la prez. de la E-Instituto en Tokio, S-ro Teraro. Krom la Japana literaturo, li instruas la Anglan lingvon, sed nur malvole ĝin uzas, preferante paroli E-on. En Kobe, ĉe Univ. de Fremdaj Studoj, ŝi alparolis E-grupon.

S-ino Threlfall havas adresojn de Japanaj korespondemuloj; ŝi petas helpon de sam-oj en Aŭstralio. Ili bv. sendu al ŝi nomojn-adresojn, indikante tem-preferojn, por ke ŝi letere kunigu homojn de simila penskampe.

BULGARAJ MARISTOJ

S-ro Eino Loorits kun sia edzino vizitis en Kristnasko la unuan Bulgaran ŝipegon Buzludja ĉe la Hobarta haveno. Ili vendis al maristoj poŝtmarkojn, -kartojn, tukojn, bumerangojn k.a. Ge-sroj Loorits esprimis beadaŭron, ke la maristoj parolas nur Bulgare, montrante al ili la Jarlibron de la UEA kaj informante pri la E-movado ĉi tie kaj tutmonde. Iuj maristoj montris intereson kaj promesis studi la lingvon. Unu diris, ke lia 14-jaraĝa filino certe lernos ĝin por pliriĝi sian kolekton da p.m. Li mem persvadiĝis, ke E-o ja malfermas la mondon ankaŭ al filatelistoj. Tion ne povas fari iu nacia lingvo.

Parolante al la maristoj, S-ro Loorits uzis la Rusan lingvon.

La Slavaj lingvoj havas inter si relative malmulton da interna diferenco; ili havas pli da interrilato ol havas la lingvobranĉoj Latinida kaj Germana.

Ruso, Polo, Jugoslavo, Ĉeho, Bulgaro povas atingi iom kontentiĝan gradon de interkomprenateco, uzante ĉiu la gepatran.

Sed Italo kaj Hispano, Hispano kaj Portugaldo, nur malfacile interkomprenus, se ili parolus unu la alian en sia gepatra.

Simile, Germano, Anglo, Svedo Nederlandano ne interkomprenus, gepatralingve parolante inter si.

Kromdire: ia porcoj de Finnoj parolas Svede; Ĉeĥoj—Germane aŭ Ruse; Bulgaroj.—Ruse.

Vidu: La Rondo, Apr. 1956.—Red.

DEPRENO DE IMPOSTOPAGO

De Marie Laffranque, 23 rue Brouardel, 31 Toulouse, ni ricevis leteron en Esperanto. Si informis al la ~~Impostokolektisto~~, ke ŝi deprenas ~~20.6%~~ de sia ŝuldo kaj donacas ĝin al bonfara asocio. Tio estas gesto kontraŭ la koncepto kaj principo, ke militado estas normale akceptita kaj antaŭvidita. La ago tiel depreni monparton ne havas materialan celon, ĉar en tiu okazo fiska fraŭdo estus pli facila. Malkaŝe deklarante, ke ŝi plenvole rifuzas kontribui al la milita buĝeto, ŝi substrekas tiun rifuzon per firme konkreta gesto, kiel ŝi faris ankaŭ en la antaŭa jaro.

Subtenas ŝin nom-subskribe 25 sampensantoj, inter ili profesoroj kaj pastroj. Ili havis tagon de fasto kaj medito; la manĝmono tiel ŝparita servis por kovri la punpagon, kiel ankaŭ tiun de aliaj protestantoj. La registaro havigis al ŝi la deprenajon el ŝia salajro.

"KULTURAJ KAJEROJ"

Legataj en pli ol 40 landoj! Interesa legajoj diverstema kaj novaĵoj pri la Esperanto Kultur-Domo, Gressillon, Bauge 49, France. Provdnumero: respond-kupono al P. Babin, 13 Bd. de la Chauviniere -44- Nantes.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription with membership: \$A3.00
(or 43 reply coupons).

Advertising: 10 lines: 1 dol.
(non-members).

Members: By arrangement.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084.

Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road,
Willoughby, N.S.W., 2068.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 88 Verney Rd. West, Graceville, Qld., 4075.
Address of A.E.A.: Box 415, P.O., Manly, N.S.W. 2095.

N-ro 73 (153).

MELBURNO.

Marto - Aprilo, 1969.

AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095.

OFICIALA INFORMILO

Novaj Individuaj Membroj:

Sharp, F-ino N., Brisbane, Qld.
Bowes, F-ino T., Malanda, Qld.
Beaumont, S-ino M., Hornsby, N.S.W.
Kelly, S-ro H. R., Archerfield, Qld.
Porter, D-ro K. C., Heidelberg, Vic.
Degotardi, D-ro J. C., Coocoo Bay, Qld.
Hortle, S-ro R. E., Wynyard, Tas.
McDonald, S-ino D., Sherwood, Qld.
Gould, S-ro D., West Ryde, N.S.W.
Buchanan, S-ro L. O., Eltham, Vic.

Donacoj al la Publiciga Fonduso:

Jam anoncita	\$261.17
Robertson, R., Ges., N.S.W.	6.00
Gibson S-ro J., Tas.	5.00
Cox, F-ino V., Vic.	5.00
Smith, S-ro K. L. G., N.S.W. (2a)	8.00
Smith, S-ro C. M., Qld.	4.00
Duncan, S-ino M., N.S.W. (2a)	10.00
Goldsmith, C. C., N.S.W. (2a)	2.00
Lees, F-ino M., N.S.W.	1.00

\$302.17

Sinceran dankon al ĉiu helpanto:

Por atingi nian celon ni bezonas la
helpon de ĉiu, kiu deziras vidi la suk-
ceson de nia kampanjo en Aŭstralia.

Interŝtata Konkurso:

Poentoj donataj

Nova individua membro	5
Nova dumviva membro	50
Aliĝo al la Popular Corr. Course	2
Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso	1

Stato je 5a de Marto 1969:

	Kvoto	Poentoj	%
N.S.W. & A.C.T.	260	222	85.4
Queensland	130	84	64.6
Victoria	300	194	64.6
W. Australia	80	38	47.4
Tasmania	30	12	40.0
S. Australia	40	—	—

Novaj Lokaj Reprezentantoj:

N.S.W.—

Tottenham: S-ino R. L. Horsburgh.

W. Australia—

Port Hedland: S-ro D. Thorp.

LA VERDAJ KARTOJ

Kiel diris nia Prezidanto en nia
lasta numero "Ĉio komenciĝos per la
disdono de la verdaj kartoj". La jena
statistiko rilate al la 165 ricevitaj ĝis
hodiaŭ klare montras kie oni disdonis
ilin.

N.S.W.	93
Queensland	53
W. Australia	7
Victoria	7
Tasmania	4
S. Australia	1

Mirigas min, ke en Victoria, kie en
1967 loĝis la plimulto de niaj mem-
broj, nur eble ses petis provizon kaj
provis helpi al nia kampanjo. Mi
bone scias, ke ne ĉiu povas helpi
finance, sed mi opinias, ke preskaŭ
ĉiu povas helpi al la progreso de Es-
peranto per disdono aŭ dissendo de
tuj kartoj al konatuloj, aŭ disdono
alimaniere.

Mi, do, petas la helpon de ĉiu.
Longa letero ne estas necesa; skribu
vian nomon kaj adreson sur peco de

papero, kaj indiku KIOM vi deziras ricevi, kaj ni tuj sendos ilin al vi—ne por ke vi metu ilin en tirkeston kaj forgesu pri ili, sed por ke vi distribuu ilin.

Ni pruvu, ke ankaŭ en fora Aŭstralio ni kapablas labori por nia movado.

—C. C. Goldsmith, Sekretario.

LEARN ESPERANTO

We are constantly telling members of the public that they should learn Esperanto, but do you yourself really know the language? Remember that you are a better advertisement for Esperanto if you can read, write, and speak it. If you cannot do this, try to improve your knowledge, and a correspondence course will help you. A.E.A. now offers the following courses:—

The Popular Course.—The best for the beginner, or for anyone with only a slight knowledge of Esperanto. Textbook: *A Popular Course in Esperanto* by Szilagy, and the *Edinburgh Dictionary*. Fee \$5: if you possess the textbook deduct 50 cents; if both books, deduct \$2.

The Progressive Intermediate Course.—This deals particularly with those points which are unusual to English-speaking students, and is also an excellent revision course if you are 'rusty'. Textbook: *Step by Step in Esperanto* by M. C. Butler. Fee: \$7.50—deduct \$1.50 if you already have the textbook.

The Advanced Course.—This consists of 15 test papers, each including two passages for translation from Esperanto into English, one passage from English into Esperanto, an essay, and items from the textbook *Step by Step in Esperanto*. Fee: \$10—deduct \$1.50 if you already have the textbook.

Tutors for these courses are at your service, and students will find their corrections and advice helpful. You progress at a speed to suit yourself; you are not handicapped by missing lessons because of illness or holidays; and necessary corrections are always with you for possible reference.

Send enrolments or enquiries to:
Australian Esperanto Association,
P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095.

ELEMENTA AND SUPERA EXAMINATIONS OF THE A.E.A.

The Elementa consists of Written and Oral. The Written has six sections: simple grammatical tests; short translations from Esperanto into English; translations from English into Esperanto ten brief phrases into Esperanto; five word-pairs (difference in meaning to be exemplified); translation into English of a short Esperanto verse (rhyming not necessary).

The Elementa approximately = the now lapsed Pyke Memorial Examination.

The Supera consists of four sections questions on grammar; poem, Esperanto into English (rhyming not necessary); Esperanto science text into English; short English literary and scientific texts into Esperanto; original essay (1000 words) on one of six themes.

The Supera approximately = the B.E.A. Diploma (*Atesto pri Kapableco*).

It is not necessary to gain the Elementa before entering for the Supera.

These examinations are based on the principle of inducing students to study and research in all aspects of the language, rather than of testing their ability to cram and later merely recall more or less vaguely memories of their reading. For two months they are allowed free access to books, from which it is expected that they shall provide reasonably accurate answers to the questions set.

Success in either examination: 55 in Written and Oral. Honors: 80 in Written and Oral.

Fees: Elementary (Elementa) 2 dol. Advanced (Supera) 3 dol. This covers all. For the Final (Klereca): 2 dol. for examination of the thesis; 2 dol. for the Written; 2 dol. for the Oral, and 2 dol. for an eventual Diploma. Send fee to Miss A. Dennys.

Examination results will in future be given in the *Oficiala Informilo* in The A.E.

—F. R. Banham; for the Commission.

**AŬSTRALIA
ESPERANTO - ASOCIO
17A KONGRESO — PERTH
JANUARON, 1970**

PROGRAMO

Jan. 4a—Dimanĉo.

Matene—Pretigo de la Kongresejo.
2.00-4.00—Akcepto de alvenintoj kaj
disdono de dokumentoj.
Vespere—Diservo.

Jan. 5a—Lundo.

9.30-12.00—Disdono de dokumentoj.
2.00-3.00—Oficiala Malfermo.
3.00-4.00—Fotografado.
4.30-5.30—A.E.A. Komitato kun-
venos.
8.00-10.00—Interkona Vespere (kun
subĉiela rostaĵo).

Jan. 6a—Mardo.

9.30-11.30—Generala Kunveno de
A.E.A.
12.00-1.00—Urbestra Akcepto.
2.15-3.15—Prelego.
3.45-5.15—Generala Kunveno de
A.E.A. (daŭrigo).
7.30-10.00—Vespere Ekskurso
(Aŭtobuse).

Jan. 7a—Merkredo.

9.00-10.00—A.I.E.A. (Instruista)
Kunveno.
10.00-10.45—Prelego.
11.15-12.15—U.E.A. Kunveno.
2.30-5.00—Rivera Krozado.
8.00-10.00—Koncerto.

Jan. 8a—Ĵaŭdo.

9.00-10.45—Generala Kunveno de
A.E.A. (daŭrigo).
11.15-12.15—Prelego.
2.00-3.30—Generala Kunveno de
A.E.A. (daŭrigo).
4.00-5.00—Oficiala Fermo.
7.30-8.00—Serejo.
8.00-10.00—Kongresa Vespermanĝo.

Jan. 9a—Vendredo.

8.45-6.00—Tuttaga Ekskurso.

Enrolments have already begun and
the initial list (12 March) is as fol-
lows:—

From Western Australia—

1. S-ro W. H. Howard.
2. S-ino S. Howard.
3. S-ino R. McGrath.
4. S-ro J. Hawks.
6. S-ino E. Palmer.
5. S-ino G. Pollard.
7. F-ino J. Gray.
8. S-ro N. E. Bowers.
9. S-ino Bowers.

10. S-ro C. Dean.
11. S-ino D. Dean.
12. S-ino Brown.
13. S-ro H. McGrath.
14. F-ino A. Longson.

From Other States—

51. S-ro H. Koppel, Melbourne.
52. S-ino F. Koppel, Melbourne.
53. S-ro C. C. Goldsmith.
54. S-ro F. Mueller-Sorau, Peter-
sham, N.S.W.
55. S-ro K. Linton, Melbourne.
56. S-ro Frank Acs, Orange,
N.S.W.
57. S-ino W. Greenhalgh, St. Lucia,
Qld.

Book early to ensure a successful
congress and avoid disappointment.
If you wish, you may enrol a friend
whether a member of the A.E.A. or
not. Further enrolment forms are
available.—W.H.H.

Por propagandaj celoj mi
bezonas multe da malnovaj
numeroj de "The Australian
Esperantist". Rekompence aŭ
kontraŭ nur afranko mi sendos
diversajn Esperantajn gazetojn,
foliojn kaj librojn. De mi oni
ricevos adresojn de Eŭropanoj,
de laboristoj al profesoroj, kiuj
deziras korespondi kun aŭstra-
lianoj.

Senpage estas abonebla LING-
VOLOGIA REVUO de ek-
zakta lingvo-scienca, kiu celas
trovi la objektivajn universalajn
leĝojn de gramatiko kaj sur ili
inventi gramatike perfektan ling-
von.

Emil Hanhiniemi, P.O. Box
764, Ingham, Q-4850.

ESPERANTO AND SCOUTING

At the 6th International Scout Jam-
boree (Southend, England) Esperanto
was used as a second language. The
daily jamboree paper carried Esp.
features; the Sunday Service was
conducted in English and Esperanto;
the camp menu was printed in those
languages only, and the official song
was specially written in Esperanto,
which was used in the opening and
closing ceremonies.

The presence of the Chief Scout of
Japan (the only one among his large
party to speak any English) gave
hope that Esp. may be used at the
next Jamboree in Tokio, 1971.

PREZIDANTO LETERO

Karaj Membroj,—Mi devas ĉiĵoje menciĵi tri aferojn—la unua estas tragika, la dua bedaŭrinda, sed la tria tre laŭdinda.

Tragika estas la perdo de nia amata membro, Len Newell, unu el la plej elstaraj esperantistoj en la tuta mondo. Kiam mi fariĝis esperantisto en la jaro, 1931, meminstruante el lia lernolibro, li estis jam fama. Kiam mi ricevis mian unuan numeron de Literatura Mondo en tiu sama jaro, li estas eĉ tiam kunlaboranto de tiu fama revuo. En Septembro, 1931, li aperentis por Literatura Mondo la ĵus aperintan verkon, "Streĉita Kordo" de Kolomano Kalocsay.

Dum li vizite loĝis kun sia duonfilino en Gorizia (Italujo) lastan jaron, li vojaĝis al Londono por viziti sian fraton, kaj revene al Gorizia li kviete mortis en la trajno, legante libron dum la nokto inter la 7-a kaj la 8-a de novembro ĉe Montereau, kvardek kilometrojn ekster Parizo. La konduktoro provis lin vekti por inspekti bileton kaj trovis lin jam mortinta.

Lia edzino, kiu devis tuj vojaĝi al Parizo por aranĝi entombigon, poste avizis la fraton kie la entombigo okazis. "Estas apenaŭ kredebla", li respondis, "ke liaj cindroj nun ripozas en la "Pere Lachaise Columbaire" tombejo en Parizo. Kiam Len estis majoro en la brita armeo, li vizitis kun mi tiun tombejon. Len estis tiel impresita de la etoso de la loko, ke li diris, ke se estus eble elekti, li dezirus entombigi tie, kiam finiĝos lia vivo. Lia deziro mirakle plenumiĝis".

En ĉi tiu aminda homo la esperanta movado perdis elstaran poeton kaj verkiston. La aŭstralia movado lamentas lian forpason kaj kondolas lian vidvinon kaj familion.

La dua afero estas bedaŭrinda. Mi aludas al la ekŝigo de S-ino Katie Schwerin, kiu prizorgis por A.E.A. dum pluraj jaroj la korespondkursojn. Ni deziras esprimi nian profundan dankon pro ŝia longa kaj sindona laboro, kaj ni kompreneme bedaŭras ŝian ekŝigon el la posteno.

Kaj la tria afero estas tre laŭdinda. Nun mi aludas al la kvietita sed tre efika laboro de nia amiko, John Gibson, en Launceston, Tasmanio. Li sukcesis enplanti nian lingvon en la Wynyard High School, kie li laboris

dum kelka tempo. La ĉefinstruisto, S-ro Hortle, kiu kun du aliaj instruistoj sukcese plenumis la Elementan Diplomon, nun mem instruas la klason post la foriro de John Gibson. Ni elkore gratulas la tri ĝeinstruistojn kiuj gajnis la Elementan Diplomon, sed eĉ pli grave ni tutkore gratulas al John Gibson pro lia entreprenemo, kiu tiel bonege sukcesis.—Kun sincera saluto, Ken G. Linton.

PARIZO

Postlasis mi la koron en Parizo,
Nun restas mia koro trans la mar';
Revenis mi al hejmo kun valizo
Enue vivi dum alia jar' . . .
Sed koron mi postlasis en Parizo.

Ah, kiom mi sopiras al Parizo!
Eksaltas mia sango en la vejn';
Urbeĝo de gajeco kaj surprizo,
De vino kaj kafejoj apud SEINE
Ĉielon spegulanta el turkizo.

Printempe verdas arboj en Parizo,
Bluetajn ombrojn jetas NOTRE
DAME,
Kaj kajoj malvarmetaj de Parizo
Dormetas sub karesa suna flam',
Ĝis brilos lampoj sub krepuska grizo.

Tre belaj estas Moskvo kaj Kadizo,
Berlino, Buda, Romo kaj Vien';
Pli bela estas urbo sur Tamizo;
Sed ravas min nur franca la siren':
Min sorĉos ĝis la morto nur Parizo.

Da rimoj elĉerpiĝis la provizo:
Mi finu. Sed komprenu anĝelar':
Post morto min atendas Paradizo,
Sed iros al ĉiel nur ŝelo—ĉar . . .
Mi lasos mian koron en Parizo.
(L. N. M. Newell, "Dekdu Poetoj"; 1934.)

CZECHOSLOVAKIA

Using the translation of an Esperanto letter received from Czechoslovakia, Mr. I. Maddern contested remarks by the Russian ambassador, Mr. N. Tarakanov, who had addressed Traralgon Rotary on Russia's invasion of that country.

The Morwell "Express", 26/2, featured this story, giving the full translation.

This appeal by Czechoslovak Esperantists has been sent world-wide. We have a copy.—Editor.

Australia Kroniko

PERTH: Unu el niaj plej malnovaj membroj, S-ino Gertrude Pollard, veturos per ŝipo "Iberia", 24/3, al Skotlando. De tie ŝi iros al Helsinko por partopreni la ĉi-jaran Universalan Kongreson. Ŝi esperas reveni per ŝipo "Arcadia", ĝustatempe por partopreni nian Aŭstralian E - Kongreson en Perth.

MELBOURNE: La kluba agado, post la ferioj, komenciĝis, 20/1, kiam klubanoj rakontis pri siaj ferioj. S-ro H. Koppel rakontis iom pri vojaĝo al kaj vizito en Nov-Zelando, dum lia edzino rakontis pri renkontiĝoj kun Esperantistoj en Adelaide.

Nia japana amiko en Manly, S-ro S. Issobe, 3/2, priparolis siajn impresojn pri la Nov-Zelanda Kongreso, kiun li kun familio partoprenis. Samvespere S-ino F. Koppel legis leterojn de S-ro Len Newell, kiujn tiu sendis el Eŭropo antaŭ sia morto. Pola mondvojaĝanto, geografo kaj verkisto, S-ro W. Dworczyk, vizitis la klubejon, 10/2, sed bedaŭrinde malmulte informis pri siaj observoj pri alilandaj scenoj kaj kutimoj—nur emfazis kiom da helpo li esperas por vagadi tra Aŭstralio, serĉante materialon por nova libro.

Okaze de dua vizito de S-ro Dworczyk, S-ro H. Koppel, 17/2, ripetis prelegon li faris ĉe la Nov-Zelanda E-Kongreso pri la temo "Aŭstralio konstruas novan ĉefurbon", kun 70 belaj diapozitivoj. Ĉe la societa vespero, 24/2, S-ro James Rae parolis (anglalingve) pri "Karnavalo en Rio". Li montris kolorplenajn diapozitivojn kaj aŭdigis brazilan muzikon. S-ro F. R. Banham, 3/3, vigle prezentis aron da pensinstigaj eseoj. "La arto grumbli" emfazis la malsaĝon kaj senutilon pri la neeviteblo, la pasinteco kaj la malgravaĵo, sed atentigis ke sen ia grumblado en la formo de konstrua kritikemo, okazus nenia progreso en la mondo. Aliaj eroj temis pri metapsikaj incidentoj el la vivo de Rektoro Emile Boirac kaj la embarasoj de pipfumanto inter cigaredadepoj.

Spite de fervoĵista striko okazis la januara RENDEUVUO (31/1). La parolanto estis Herbert Koppel, kiu

priskribis flugvojaĝon al kaj partoprenon en la 34-a Nov-Zelanda E-Kongreso en Blenheim. Helpe de diapozitivoj li ankaŭ priskribis vizitojn al urboj Christchurch, Queens-town kaj Dunedin sur la Suda Insulo. Li daŭrigos sian prelegon pri vojaĝo tra la Norda Insulo en Aprilo. Kristnaska ferio sur insulo Brampton, apud Mackay, estis ĝuplena kaj ripoziga travivaĝo por A.E.A. Prez. Ken Linton. Al la brile pitoreskaj scenoj pri tropikaj akvoj, montetaj insuloj kaj luksaj hoteloj, diapozitive prezentitaj ĉe la februara kunveno, S-ro Linton aldonis informan komenton.

EASTERN SUBURBS: 13 membroj ĉestis la jaran kunvenon, 5/2. La Prezidanto (S-ino I. Fallu) bonvenigis S-inon Sanders kaj F-ino Margaret Sanders, kiuj revenis de mondvojaĝo. Elektiĝis: Prez.: S-ino I. Fallu; Sekr.: S-ro R. Reed; Kasisto: S-ino Herta Koppel; Publikaj Rilatoj: S-ino M. B. Smith.

ORRONG E-GRUPO havis sian jarkunvenon en Februaro. Elektiĝis: Prez.: S-ino Adrienne Paling; Sekr.: F-ino Lydie Hooper; Kasisto: S-ino Mary Halliday. La ĉefparolanto por la vespero estis S-ino Valda King, de la Melburna E-Societo, kiu parolis pri siaj spertoj kun Esperanto.

SYDNEY: "La vojaĝanta avino", S-ino De Cleene el Auckland, vizitis nian societion, 20/1, kiam S-ro J. Matasin montris lumbildojn pri Norvegujo kaj Svedujo La jara kunveno okazis, 3/2. Elektiĝis: Prez.: S-ro J. Matasin; Vic-Prez.: S-ro F. Mueller-Sorau, F-ino R. V. Rijswijk; Sekretario: S-ro T. Elliott; 2-a Sekr.: S-ino E. Brandman; Kasisto: vakas; Bibliotekisto: F-ino R. V. Rijswijk; Interilataj aferoj: S-ino M. Chaldercott; Kasrevizoroj: S-ino M. Parker, S-ro W. Chandler. Programojn arangos: S-ino E. Matasin, S-ino E. Brandmann. (Demando: Kiun kontrolos 2 kasrevizoroj, se ne ekzistas Kasisto).

Nia blinda nederlanda s-ano Verlinde prelegis pri la historio de Nederlando, 17/1. Li preparis sian prelegon en brajla skribo kaj legis la paroladon. Okazis nova speco de diskut-vespero, 24/2, arangita de V. Gueltling. Ni formis grandan rondon kaj laŭvice ĉiu rajtas paroli. Oni ne rajtas interrompi aŭ paroli ekstervice. Ĉestis la vesperon S-ino Skodova,

kiu alvenis en Sydney antaŭ 2 monatoj el Prago kun sia afilo por resti dum unu jaro en Aŭstralio antaŭ ol reveturi al Prago. Si parolis pri diversaj aferoj pri Ĉeĥoslovakio. S-ro Brown, 3/3, parolis pri aŭtomobiloj kaj vojoj en la estonteco. Lian paroladon sekvis la lasta parolado de S-ro Verlinde, antaŭ lia revojaĝo al Nederlando. Li parolis pri la skribmaniero de blinduloj.—VOLO.

BRISBANE: Bonvenon al Karl Guenster, kiu revenis de vojaĝo tra Eŭropo, kie li partoprenis la Univ. Kongreson en Madrid. Ankaŭ al Nellie Callaghan, kun ni denove, post vojaĝo al Nov-Zelando, kie ŝi partoprenis la 34-an N.Z. Kongreson. Revenis ankaŭ Irene kaj Reg. Pomfrett kaj S-ino Bracegirdle. Membroj gastigis D-ron Ross Robbins dum ties vizito al Brisbane.

Ni aranĝis bonvenesperon, 3/2, por Ges-roj K. Guenster kaj, bedaŭrinde, adiaŭon al Margaret Patterson. Nia komitato nun estas: Prez.: S-ro Karl Guenster; Sekretario: S-ro Tom Donnelly; Kasisto kaj sociaj aferoj: S-ino V. Yowe; Libro-Peranto: S-ino Greenhalgh.—Tom Donnelly.

REDCLIFFE: En la hejmo de Ges-roj Clarke okazis, 4/2, la jarkunveno. Elektigis: Prez.: S-ino A. Pritchard; Vic-Prez.: S-ino B. Clark; Sekretario: S-ino V. C. Clarke; Help-Sekretario: F-ino B. Kent; Kasisto: S-ro V. C. Clarke; Publikaj Aferoj: F-ino A. Gilles. Ni dankas nian prezidanton, S-ino Pritchard, pro ŝia servpreto konduki E-klason, merkrede matene.

Klasoj rekomenciĝis. Tre plaĉis al ni ke klubanoj de 1968 revenis. Ni prezentis 18/2 diapozitivajn pri Perth, senditajn de la tiea E-Ligo. Vizitis nin D-ro Ross Robbins el Port Moresby, Ges-roj K. Guenster, revene el Eŭropo, S-ino Webster el Kilcoy, kaj S-ino N. Callaghan, kiu prelegis pri la 34-a Novzelanda Kongreso.

La infana grupo ekscitiĝis pro vizito de la T.V. Stacio 7, kiu filmis kaj registris la voĉojn de la infanoj kiam ili parolis kaj kantis en Esperanto.

NAMBOUR: Okazis 6/12 en la urbdomo granda ekspozicio de la Plenkreskula Edukado. S-ino Doris Sinclair insistis ke ankaŭ Esperanto estu reprezentata kaj finfine sukcesis

starigi montrotabulon. Rezulte de tiu elmontró pli ol 100 personoj petis pluajn informojn pri Esperanto. La loka gazeto "Nambour Chronicle" raportis ĉiusemajne pri nia lingvo kaj kiam, pro malsano de S-ino Sinclair, ne aperis artikoloj dum mallonga tempo, multaj legantoj demandis la redaktoron pri la kialo.

NEW SOUTH WALES ESPERANTO FEDERATION

La 8-a Konferenco kaj 2-a Jarkunveno okazis 19/1 en la hejmo de Ges-roj Matasin ĉe Northbridge. Tiu-ĉi ĉarma domo rigardas de supre la marbordon kaj naĝejon en Taylor's Bay, kie ni renkontiĝis je 11-a a.t.m. por naĝado kaj piknika manĝo. La aferkunveno okazis je la 2.30a atm. La sekretario raportis ke 29 novaj membroj aliĝis en 1968 kaj la Federacio nun havas 4 grupojn kaj 92 membrojn.

Nova estraro por 1969: Prez.: S-ro R. G. Robertson; Vic-Prez.: E. W. Chandler; Sekr./Kas.: Geo Thatcher; Kontkontrolisto: Ald. F. S. Preacher; ~~Jurnalisto:~~ S-ino E. Graham; Publikrilatoj: S-ino T. Richmond. La venonta konferenco okazos 17/18 Majo, espereble ĉe Civic Hotelo, Canberra, sed ni ankoraŭ atendas kontentigan respondon de la hotelo.

—George Thatcher.

LA 34-a NOV-ZELANDA ESPERANTO-KONGRESO

Partopreni Esperanto-Kongreson en transmara lando estas iom neordinara sperto kaj estis do kun emocio ke mi transflugis la maron Tasman por partopreni la 34-an Nov-Zelandan E-Kongreson, kiel delegito de la Aŭstralio E-Asocio. Jam ĉe la internacia aerodromo en Christchurch atendis min la lokaj delegitoj F-ino E. McGifford, S-ro B. Clarke kaj Vilĉjo Wyber kaj ek de tiu momento mi ĉiam troviĝis inter afablaj gesamideanoj.

La kongreso okazis inter la 2-a kaj 6-a de Jan. 1969 en Blenheim, ĉefurbo de la distrikto Marlborough, sur la Suda Insulo. Gi estis t.n. "kunviva kongreso", nome ke ĉiuj kongresanoj loĝis, manĝis kaj kongresis kune en la samá loko, ĉe "Innes House"; la moderna loĝloko por studentoj de la

"Marlborough Kolegio" por geknaboj. La manĝoj estis bonegaj kaj la prezoj tre malaltaj. Regis vere samideana etoso dum la tuta kongreso.

Rimarkinde estis ke nur 2 komencintoj faris ĉiujn lokajn preparlaborojn, pruvo do, ke kun entuziasmo kongresoj povas okazi eĉ en lokoj sen E-Societoj. Ceestis 77 gesamideanoj el ĉiuj partoj de ambaŭ insuloj de Nov-Zelando kaj eksterlandaj gastoj: D-ro S. Hori, profesoro de la Gunma Universitato (Japanujo), Ges-roj Issobe kun 2 filinoj (Tokyo-Manly) kaj S-ino A. M. Callaghan de la Brisbana E-Societo.

Samtempe kongresis E-JANZ, la E-junulara Asocio de N.Z., kaj estis plezuro vidi kiel lerte kaj energie tiuj junuloj kapablas labori por Esperanto. Ili prezentis koncerton, faris kolorfilmon kaj kolektis multe da mono por "Agado E 3", por la Zamenhof-Kliniko por afrikaj blinduloj.

La unua Di-Servo iam aranĝita ĉe N.Z. Esperanto - Kongreso okazis, gvidita de Pastro Graham Bell el Christchurch. Malfermis la kongreson la urbestro de ~~Blenheim~~, S-ro S. F. Harling. Kutima ero ĉe N.Z.-Kongresoj estas drama konkurso inter la diversaj kluboj. Gajnis la "Drama-Sildon" la Auckland E-Societo, kiu prezentis la konatan skeĉon de Ĉehov "La Edziĝpropono".

Sperte gvidis la kongreson Prof. C. J. Adcock, profesoro de Psikologio de la Victoria Universitato en Wellington. La kongreso reelektis Prof-on Adcock, kune kun S-ro Ralph Dearnley (Vic-Prez.), S-ino Mary Richardson (Sekretario/Kasisto), F-ino Agnes Bray (Vic-Sekr.) kaj S-ino Lucia Bruce (Informa Oficisto). Interesaj prelegoj abundis: S-ino J. Issobe prezentis, vestita en ĉarma kimono, la japanan arton de floraranĝo (Ikebano); S-ro Issobe prelegis pri la japana lingvo; F-ino Agnes Bray, ĵurnalistino kaj raportistino de la "N.Z. Brodkasta Komisiono", prelegis pri la vivo en 2 israelaj kibucoj. Mi mem kontribuis 3 erojn al la kongresa programo: Lumbildparoladon pri "Aŭstralio konstruas novan ĉefurbon", prelegon pri la "Historio de la aŭstria E-movado" kaj prezenton de la E-filmo "Aŭstralio, Lando de ĉiama ŝanĝiĝo". La ankaŭ en Aŭstralio

bone konata Bertram Potts (Wellington) gvidis lingvan seminarion kaj ĉe la fino de la kongreso prezentis amuzegan monologon.

La kongreso akceptis mian proponon al pli intima kunlaboro inter A.E.A. kaj N.Z.E.A. Ni interŝanĝos ek de nun 5 ekzemplerojn de niaj organoj por ke kluboj en ambaŭ landoj povu legi pri la agado en la alia lando. S-ro W. H. King (27 Norfolk Street, Whangarei) agos kiel interrilata oficisto en Nov-Zelando kun Aŭstralio, dum AEA elektos en Perth similan oficiston por Aŭstralio. (Intertempe mi agos en tiu posteno ĝis 1970). S-ro King sendos de tempo al tempo novaĵojn al nia gazeto, dum mi verkos aŭstrialajn novaĵojn por "N.Z. Esperantist".

La loka gazeto "Marlborough Express" raportis ĉiutage pri la kongreso, kaj tiujn raportojn transprenis la N.Z. Gazetara-Asocio kaj aperigis artikolojn en multaj gazetoj tra la tuta lando.

La 35-a N.Z. Kongreso okazos de la 3-a ĝis la 7-a Jan. 1970 en Napier, sur la Norda Insulo.

—Herbert Koppel, Melbourne.

Recenzoj

"Somermeznokta Sonĝo": William Shakespeare. El la angla tradukis Kalman Kalocsay kun aldono de komentario. 100 paĝoj. 1.50 Us. dol. Eldonis: Juan Regulo — STAFETO, Canary Islands.

La unua traduko, de Louisa Briggs, eldoniĝis en 1921. Post preskau duonjarcento jen aperas pli bona redonajo—la 16-a verko de Sekspiro en vesto E-a.

Komparinte en la du tradukoj la lertriman parolon de Puk (akto 3, sc. 2) kaj la Kanton-Danco (akto 5, sc. 2), oni certe rimarkus la neegalajn kapablojn de la du provincoj. Evidentaj tra la tuta teksto, la versa virtuoza kaj vortkrea genio de la Hungara poeto lokigas lian verkon al nivelo superanta tiun de la Anglino. Ekzemplo de rima, esprima trafo:—

Gis tagiĝ' ni restos, feoj,
en ĉi dom', en ĉiuj ejoj.
Por komenci nian riton,
benos li la ĉefan liton,
kaj la ido nun krea
vivu en fortun' beata.

La tri paroj, ĉiuj same,
ĝis la mort' feliĉu ame.
Kio ĝermos nun markote,
ja ne ĝermu brulstampote
per naskmarko, haŭtmakulo,
leporlipo, verukbulo,
kian naski estas honto,
ne divenu el ĉi fonto . . .

Simile al Zamenhof, kiu penis redoni la krudan parolon de la malklera Osip (en "La Revizoro"), Kalocsay devis barakti kun la kripla babilaĵo de bando da et-metiistoj, kies agado okupas iom multon de la komedio—tra kio ili misuzas vortojn, ŝerce vortuladas, inter alia lingva groteskaĵo.

Britoj profitus per lego de ĉi traduko. Por nesciantoj de la Angla, "estas pli facile rigardi kelkon da nekonataj vortoj en la Glosaro, ol lerni ne nur la Anglan, sed ankaŭ la Sekspiran lingvon".

Mondvasta Movado devus honton senti pro tio, ke la eldonisto, Juan Regulo, pensis prudente eldoni nur mil ekzemplerojn de verko tiel grande signifa, tiel inde merita.

The E.U.P. Esperanto and English Dictionary: J. C. Wells, M.A., L.B.-E.A., Lecturer in Phonetics at London University. The English Universities Press Ltd. 419 pages. 15/- English.

To meet the need for a comprehensive yet concise, compact two-way dictionary, the author has striven to incorporate with the general vocabulary as many as possible of the large number of technical terms that may meet the layman's eye. Certain words still largely restricted to specialists have also been included.

Some 9000 Esperanto roots are listed, and approximately 19,500 English words. This imbalance is explained by the fact that one Esperanto root may by affixation serve to render several English words: e.g., VIDI—see, sight, visible, visual, visibility, view, transparent, blind, spy-glass, &c.

Happily, many current and non-current words used every day are found here: drive-in, supermarket, wildcat (strike), jackpot, ball-point, cafeteria, dead-heat, jutebox, beatnik, all boxing weights.

Other common terms such as: comeback, inking-pad, "call-", chorus-

marching (girl), "kombi" (pluruza auto) would, one would think, be more useful to the ordinary user than grommet, mycelium, mullein, halation, psephologist, and others of similar remoteness to our everyday life.

Based on the "Plena Vortaro", the all-Esperanto dictionary that is used world over, this work is the fruit of wide collaboration by the author with several well-known authorities in different countries, East and West, and of close control and checking with many dictionaries — Waringhien, Leger/Albault, Wuester, Wingen, Bokarev, Kawasaki et. al.

On fine paper, size 4½ x 5½, it is very useful and should be owned by every Esperantist who strives to put the best into his work.

"Gepatra Bulteno", red. Derrick Faux. Eduk-idea, pensriĉa, poŝformata. 14 steloj; 4 numeroj jare. Peranto: J. B. Moore, 34 Hadgraft St., North Rockhampton.

"La Junaj Trezor-Serĉantoj" kaj **"La Longa Marŝo"**. Two new Esperanto readers in the Certificate of Secondary Education Series, by J. H. Sullivan, F.B.E.A., head of the Foreign Languages Dept., Egerton Park Secondary School, Denton, Lancs. 24 pages, 20c. each.

Ralf Markarian, headmaster at Chorley (Lancs.), recommends them as ideally suited to adult beginners and to pupils in their second or third year of Esperanto study. B.E.A. stocks them.

"Literatura Kajero": Presigu viajn verkaĵojn en tiu gazeto. Tradukojn kaj originalojn petas Henerik Kocher, Baltasar Lisboa 34, ZC-11 Rio de Janeiro, Brazil. Petu specimenon.

Prezidanto de la E-klubo petas pri korespondantoj. Diversaj temoj. Boris Kolner, Esperanto-Klubo, Abonkesto 162, Ufa 25, USSR.

New Address: Mr. A. C. Boyle, 4 Oxley Av., St. Ives, N.S.W., 2075.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription with membership: \$A3.00
(or 43 reply coupons).

Advertising: 10 lines: 1 dol.
(non-members).

Members: By arrangement.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084.
Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road,
Willoughby, N.S.W., 2068.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 88 Verney Rd. West, Graceville, Qld., 4075.
Address of A.E.A.: Box 415, P.O., Manly, N.S.W. 2095.

N-ro 74 (154).

MELBURNO.

Majo, 1969.

AŬSTRALIA ESPERANTO- ASOCIO

P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095.

OFICIALA INFORMILO

16an de Aprilo 1969

Novaj Individuaj Membroj:

Bell, S-ro D., Randwick, N.S.W.
Arney, S-ino J., Churchill, Vic.
Doherty, S-ino S., Morwell, Vic.
Gledhill, F-ino G., Moe, Vic.
Jackson, S-ino B., Churchill, Vic.
Jackson, S-ro L., Churchill, Vic.
Kelly, S-ro B., Morwell, Vic.
Martin, S-ro A. A., Morwell, Vic.
Miller, S-ino J., Morwell, Vic.
Mitchell, S-ino T., Morwell, Vic.
McCluskey, S-ino J., Traralgon, Vic.
McKenzie, S-ino J., Churchill, Vic.
Nunan, S-ro F. T., Morwell, Vic.
Placido, S-ino A., Churchill, Vic.
Wybenga, S-ino M., Morwell, Vic.
wankhuizen, S-ino R. Y., Yallourn,
Vic.
Jones, S-ino F. E., Traralgon, Vic.
Addie, S-ro J. W., Surrey Hills, Vic.
Clarke, S-ro V. C., Woody Point,
Qld.
Jones, S-ino B., Morwell, Vic.
Maddern, S-ino I. T., Morwell, Vic.
Maddern, F-ino D. S., Korumburra,
Vic.
Maddern, F-ino M. M., Parkville, Vic.
Maddern, F-ino P. C., Morwell, Vic.
Marsh, S-ino D., Brisbane, Qld.
Spencer, S-ro P., Manly Vale, N.S.W.
Blackwell, S-ino V., Sunnybank, Qld.
Kent, F-ino J. B., Margate, Qld.
Craney, S-ro E. J., Salisbury, Qld.

MacKenzie, S-ro J., Newcastle,
N.S.W.

Hanhiniemi, S-ro E., Ingham, Qld.
Gunning, D-ro J. P., Chatswood,
N.S.W.

Donacoj al la Publiciga Fonduso:

Jam anoncita	\$302.17
Moore, S-ro J., Qld.	10.00
Prewett, S-ro J. N., Vic.	2.00
Rymer, Pastro W. V., N.S.W.	1.00
McGrath, S-ino R., W.A.	2.00
Sinclair, S-ino D. M., Qld.	2.00
Hasluck, F-ino D., N.S.W.	2.00
Clarke, Ges. V. C., Qld.	2.00
McQueen, S-ro D., Vic. (2a)	2.10
Howard, S-ro W. H., W.A.	5.00
Threlfall, S-ino V. D., W.A.	10.00
May, S-ino R. I., N.S.W.	1.00
Towsey, S-ro A., N.S.W.	4.00
Lees, F-ino M., N.S.W.	1.00
Bennett, S-ino B., N.S.W.	2.00
Andrews, S-ino J., Vic.	1.40
Simpson, S-ro A., Vic.	10.00
McCrohan, S-ro F. R., Vic.	5.00
Maddern, S-ro I. T., Vic.	3.40
Boyle, S-ro A. C., N.S.W.	1.00
Harry, S-ro R. L., A.C.T.	7.00
Redcliffe Esp. Grupo	5.00
Vawser, S-ro F. D., S.A.	2.00
Goldsmith, S-ro C. C., N.S.W.	
(3a)	3.00

\$386.07

Sinceran dankon al ĉiu helpanto:

Ni esperas ricevi la subtenon de ĉiu, kiu povas helpi. Elspezoj ĝis nun por la publiciga kampanjo estas \$526. sed tiu enkalkulas la koston de 3,000 ekz.

de "Freedom of Speech", 15,000 verdajn kartojn "Facts About Esperanto", afrankon, kaj diversajn malgrandajn sumojn. La rezultoj estas bonaj kaj esperigaj; jam preskaŭ 500 verdaj kartoj alvenis, kaj ni ricevis multajn aliĝojn al la korespondaj kursoj; ni scias ke multaj aliĝis al lokaj klasoj. kaj la supra listo de novaj membroj parolas en si mem!

Interŝtata Konkurso

Poentoj donataj:

Nova individua membro	5
Nova Dumviva membro	50
Aliĝo al la Popular Corr. Course	2
Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso	1

Stato je le 16a le Aprilo 1969:

	Kvoto	Poentoj	%
Victoria	300	332	110.6
N.S.W. & A.C.T.	260	266	102.3
Queensland	130	133	102.3
W. Australia	80	55	68.7
Tasmania	30	12	40.0
S. Australia	40	2	5.0

Nova Loka Repezantanto:

Victoria: Dimboola: S-ro W. J. Scarfe.

Ekzamenaj Sukcesoj

A.E.A. Elementa Ekzameno:

*S-ino P. Ford Lewis, Dee Why, N.S.W.

*S-ino M. Allnut, Caulfield, Vic.

*F-ino L. Hooper, Glen Iris, Vic.

F-ino A. Hearn, Malvern, Vic.

S-ro R. E. Hortle, Wynyard, Tas.

S-ro G. H. Marshall, Wynyard, Tas.

F-ino J. Kelly, Launceston, Tas.

B.E.A. Elementa Ekzameno:

S-ino O. Bliesner, Narrabeen, N.S.W.

*F-ino F. Cardale, Balgowlah, N.S.W.

*S-ino B. Cleminson, Harbord, N.S.W.

*S-ino P. Cooper, Fairlight, N.S.W.

*F-ino A. Dennys, Willoughby, N.S.W.

*S-ino B. Forrest, Narrabeen, N.S.W.

S-ino K. Morrison, Manly, N.S.W.

*S-ro R. Robertson, Northbridge, N.S.W.

S-ino J. Sherwood, Chatswood, N.S.W.

*S-ro G. Thatcher, Fairlight, N.S.W.

*S-ino J. Clarke, Woody Point, Qld.

—C. C. Gollsmith, Sekretario.

*indikas kun honoro.

Demando: Ĉu vi disponas sufiĉe da kvalifikitaj instruistoj de Esp. se oni decidis enkonduki ĝin kiel lernobjektan samrajtan kiel aliaj fremdaj lingvoj?

Respondo: Mi kondukus Esperanto-lernejon por lingvo-instruistoj dum unu semajno, kaj tio sufiĉus komenci la instruadon de Esperanto en multaj lernejoj.—I. T. Maddern, Grupletero 19.

PERTH CONGRESS

From Western Australia:

15: S-ro W. L. Illingworth.

From Other States:

58: S-ro I. Maddern, Morwell, Vic.

59: F-ino V. Cox, Surrey Hills, Vic.

ESPERANTO LA SUPERA...

E-istoj admire strebas prui. ke E-o estas tiel egale bona, kiel iu ajn nacilingvo. Tamen, kiel natura rezulto de tio, la mondo restas indiferenta. Ĉar, informate, ke E-o estas samkvalita kiel la naciaj, homoj rigardas E-on kiel nur ankoraŭ unu lingvon alian. kiu ne prezentas en si apartan, rimarkindan plibonon. Se E-o estas nur **egala** al la naciaj, ĝi simple pligrandigas la lingvan haoson. Internacia lingvo devas esti ne egala, sed **supera**.

Ni do emfazas la elstarajn ecojn de E-o, por kiuj ĝi efektive superas la naciajn. Ekz-e, ke ĝi estas dinamika lingvo, kiu nutras la intelektan imagon per sia racia strukturo. lasante homojn inventi vortojn kaj esprimojn originalajn, kontraste al la statecaj lingvoj en kiuj ĉio estas pli-malpli rigida, senelasta.

Tiel esence diras "Lingvologia Revuo", n-ro 3.

Komente: Fundesciaj E-istoj povas demonstri la konstruan superecon de E-o, ekzemple per: ĝia facila, regula prononco; la vasta rekonebleco de multegaj radikoj; la mirinda simpleco de la konjugacio; la granda utileco de la unika sistemo de korelativoj; la per-afiksa vortfarado, kiu ebligas elastan flekseblecon por esprimi la subtilaĵojn de la homa penso.

Parolu Hinda studento. kiu preferis uzi E-on por verki tezon per kiu li gajnis doktorecon en Amsterdam (The A.E., 3/67):—"Esperanto, kiel esprimmedio, pli forte ol kiu ajn nacia lingvo kapabligis al mi klare pensi".

Australia Kroniko

PERTH: Pro la laŭdinda interesiĝo de S-ino D. Threlfall oni starigis duon-oficialan kurson de Esperanto ĉe la Supera Instruista Kolegio en Nedlands. Mi havas la plezuron funkcii kiel instruisto al grupo le 10 studentoj unufoje semajne. La temo estas elektable de la studentoj, sed ne deviga; tamen ĝis nun la grupo regule ĉeestas la lecionojn. Ni esperu pri sukceso.

Kontraste al tio, la kurso kiu okazis ĉe la Universitato la pasintan jaron, ne plu efektiviĝis cijare.

—D-ro C. J. Caldera.

S-ro W. Illingworth, kiu antaŭnelonge revenis de longa vojaĝo prezentis, 10/2, lumbildparoladon pri Tajlando, Hindujo, Pakistano, Nepalo, Turkujo kaj Grekujo. Kun intereso ni sekvis lian vojaĝon tra ne multe konataj regionoj. S-ro C. Dean estris 24/2 kunvenon de tradukado el la angla en Esperanton kaj inverse. Ĉe la kunveno de 10/3 F-ino Vera Egan regalis nin, rakontante pri sia libertempa vojaĝo en la orienta parto de Aŭstralio, speciale pri la vidindaĵoj de Sidnejo. Nia malnova membro S-ro E. Walker nun kuŝas en la Charles Gairdner Hospitalo.

MELBURNO: La Generala Kunveno de la Melburna E-Societo okazis 17/3. Laŭ raporto de la kasisto (S-ro H. M. Cohen) la elspezoj (\$355.78) superis la enspezojn (\$349.52) je \$6.26. Laŭ raporto de la sekretario (S-ro H. Koppel) la societo havis en 1968 36 ordinarajn membrojn kaj 5 kursanojn, entute do 41 (En 1967: 40 membrojn kaj 4 kursanojn). La biblioteka komitato klasifis kaj bindis entute 195 librojn. Elektigiĝis nova estraro: Prez.: S-ro E. McKenzie; Vic-Prez.: S-roj H. Rosengren kaj Kim Bastin; Kasisto: S-ro H. M. Cohen; Sekretario: S-ro H. Koppel kaj H. Beechey; Publikaj Rilatoj: S-ro A. Baldwin; Biblioteka Komitato: S-inoj M. Fordham, Fay Koppel kaj S-ro E. Thompson.

Recenzo pri "Vivo kaj Opinioj de Majstro M'Saud" estis la celo de parolado de S-ino F. Koppel (24.3), kiu prezentis ankaŭ faktojn pri la vivo de la aŭtoro Jean Ribillard kaj ties pli frua verko "Vagado sub

Palmoj". S-ro James Rae denove montris (31.3) bildojn kaj aŭdigis muzikon pri Brazilo, komentante pri la homoj kaj la vivo laŭ observoj kiujn li faris dum restado tie. Pri "Novajoj el Esperantujo" prelegis S-ro H. Koppel (14.6).

En la marta kunveno de la REN-DEVUO F-ino V. Cox prelegis pri "Famaj Diamantoj". Si informis pri la distribuo tra la mondo, pri lastatempa eltrovo de nova vasta kampo en Siberio, nun loko de nova urbo kaj vigla minado. Sekvis rakontoj pri pluraj elstaraj specimenoj jam famekonataj, kiel Koh-i-noor". "Grand Mogul", "Orloff", Regent k.a.

SYDNEY: S-ro W. Chandler, 10.3, rakontis pri siaj aventuroj antaŭ 40 jaroj, kiam li akcidente ĉirkaŭflugis la lunon, sur-"luniĝis" kaj registris la voĉojn de la lunaj birdoj. Diskut-vesperon pri tradukado kaj "Interna Ideo" (17.3) sekvis prelego de S-ro F. Mueller-Sorau pri "Julio Baghy". S-ino M. Skodova deklamis kelkajn poemojn, kaj S-ro F. M-S legis el diversaj verkoj. S-ino E. Brandmann aranĝis (31.3) antaŭpaskan ludon. Oni devis preni ĉokoladan ovon el korbko kaj agi laŭ ordonoj de ĉirkaŭvolvita banderolo, ĉu fari etan paroladon, ĉu kanti.

La Muzikstudio Brandmann 19/4 aranĝis teatran kunvenon kaj elaçetis la tutan teatron (270 sidlokoj). Klubanoj de Manly kaj Sydney ĉeestis tiun tre interesan posttagmezon. Kvankam okazis 3 murdoj sur la scenejo, la ĉeestintoj apenaŭ ĉesis ridi. Multon kontribuis 2 aktoroj kiuj sidis inter la vizitantoj, kiuj faris lertajn komentojn pri la ludo kaj poste mem kunludis kaj mortis sur la scenejo. S-ro V. Gueltling 14/4 parolis pri religio en la historio. Ekskurso de la N.S.W. Esperanto-Federacio al Ball's Head 20/4 estis favorata de varma vetero kun tuttaga sunbrilo. Partoprenintoj ĝuis agrablajn piknikojn sur la norda flanko de la rivero.—VOLO.

BRISBANE: S-ino Win Greenhalgh ekzercigis membrojn per amuzaj ludoj (24.3). Samvespere S-ino V. Yowe raportis pri vizito al la Radio Stacio 4BH, kie ŝi disaŭdigis E-salutojn. Naŭ anoj de nia societo ĉeestis koncerton (28/3) ĉe "The International Club" en la Germana Klubejo

en Brisbano. Diversaj naciaj grupoj prezentis dancojn kaj kantojn en siaj gepatraj lingvoj.

Revene de Malajzio alvenis S-ino Betty Cleminson (Manly) kaj vizitis 31/3 nian klubejon.—Tom Donnelly.

ELEMENTA AND SUPERA EXAMINATIONS OF THE A.E.A.

The Elementa consists of Written and Oral. The Written has six sections: simple grammatical tests; short translations from Esperanto into English; translations from English into Esperanto; ten brief phrases into Esperanto; five word-pairs (difference in meaning to be exemplified); translation into English of a short Esperanto verse (rhyming not necessary).

The Elementa approximately = the now lapsed Pyke Memorial Examination.

The Supera consists of four sections: questions on grammar; poem, Esperanto into English (rhyming not necessary); Esperanto science text into English; short English literary and scientific texts into Esperanto; original essay (1000 words) on one of six themes.

The Supera approximately = the B.E.A. Diploma (Atesto pri Kapableco).

It is not necessary to gain the Elementa before entering for the Supera.

These examinations are based on the principle of inducing students to study and research in all aspects of the language, rather than of testing their ability to cram and later merely recall more or less vaguely memories of their reading. For two months they are allowed free access to books, from which it is expected that they shall provide reasonably accurate answers to the questions set.

Success in either examination: 55 in Written and Oral. Honors: 80 in Written and Oral.

Fees: **Elementary** (Elementa) 2 dol. **Advanced** (Supera) 3 dol. This covers all. For the **Final** (Klereca): 2 dol. for examination of the thesis; 2 dol. for the Written; 2 dol. for the Oral, and 2 dol. for an eventual Diploma. Send fee to Miss A. Denny.

Examination results are given in the Oficiala Informilo in The A.E.

BRENDON CLARK; POETO

"Poezion oni ne kreas el nuraj teorioj—se jes, Brendon Clark, ekzemple, estus poeto". (Wm. Auld, en Heroldo de E., 16 Jan.)

Movis la verskreatan manon de Clark io pli spirite valora ol la nura teori-amo. Liaj poemoj evidentigas pli ol la sekan rutinecon de obeado al la propraj poeziaj principoj. Ni trovas en lia poemo "Malnovaj Lampoj" pli da absorbebla saĝo ol en la centpaĝa "Infana Raso". "Sen ideoj poemo nenium valoras". Ideoj praktike konstruaj.

Se Clark ne meritas la nomon "poeto", ankaŭ al tre granda proporcio de konataj E-aj versemuloj oni devus rifuzi ĝin, ĉar ili verkis ne tiel bone kiel la Nov-Zelandano.

Longestonte legos samensaj homoj kun admira kompreno la finan strofon de lia: "Memore le Zamenhof".

Jen! de Via genieco la centmil fajreroj

Falis, kaj flagris sur diversaj lokoj.
Iuj sufokiĝis en malpuraj atmosferoj,
Iuj estingiĝis sur la nudaj rokoj.

Tamen laŭ la nevidataj vojoj rampebrulos,

Kuniĝonte, la flametoj de l'espero—
Ĝis la finbriladon eĉ la steloj respiegulos,

Por konservi Vian lumon sur la tero.

Behold, a million sparks spring
from thy heart's warm fire.

They rise and fall; they glimmer
here and there.

Some ebb away, and, lacking breath,
expire

On dusty plain or rocky hillside
bare.

But others hold their light, expand
their flame,

Each in its own ordained and fitting
path.

They run to meet the ways the
others came,

And, joined in one grand star, shall
bless the earth.

—F.R.B.

INFORMA SERVO DE UEA

Ĉiu paŝo, ĉiu granda kampanjo en rilatoj de UEA kun Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj dum la lastaj jardekoj rezultigis pozitivan utilon por la Internacia Lingvo. Egale, kiel ajn oni klopodis sufoki la klopodojn favorajn al racia kaj justa solvo de la lingva problemo, egale, kian diskriminacion oni praktikis kontraŭ UEA kaj kontraŭ la Internacia Lingvo, ĉiufoje estis eble transformi negativan decidon en pozitivan avantaĝon por Esperanto.

Tiel konkludas la prez. de UEA, prof. Ivo Lapenna, en "Esperanto" (Jan.). Rigardante malantaŭen ĝis la fruaj klopodoj ĉe la Ligo de Nacioj en 1920-25 kaj analizante ĉiu postan provon atingi rekonon ĉe interŝtata organizaĵo, li konstatas, ke tiu kontinua agado havis grandegan informvaloron kaj efike diskonigis la Internacian Lingvon en monda skalo.

Por la Jaro de Homaj Rajtoj 1968 UEA ellaboris laborplanon, kiun ĝi komplete plenumis. Egale ĉu la laboroj faritaj laŭ tiu plano atingis iun konkretan plibonigon de la situacio rilate la homajn rajtojn en iu ajn lando, la kampanjo en si mem sukcesis gajni grandan simpatian por la Internacia Lingvo, precipe ĉe tiuj popoloj, kiuj sentas sin sub premo de lingva imperiismo. Lapenna: "... nia ribelo kontraŭ la kultura diskriminacion, kiu kelkfoje ricevas formojn de kultura genocido, kaj kontraŭ la instituciigitajn lingvajn privilegiojn de la potenculoj en internaciaj rilatoj, necese ĉiam pli inklinitas al la lingvo la favoron de tiuj kreskantaj ribelaj junaj fortoj, kiuj komprenas, eble ankoraŭ ne tute klare, ke la homaro ne povas plu longe vivi kun unu piedo—rilate la teknikan progreson—en la 21a jarcento, kaj kun la alia—rilate la politikajn, sociajn kaj kulturajn instituciojn—en la 19-a."

Plia ekzemplo estas la rezulto de la konata Propono al Unuiĝintaj Nacioj, prezentita al la Sekretariato por UN en oktobro 1966. La nura fakto, ke preskaŭ miliono da individuoj subskribis la Proponon, kune kun granda nombro da gravaj organizaĵoj, signifis samtempe tre vastan informadon pri la Internacia Lingvo dum la subskribo-kolektado kaj novan prestiĝon por la organizita movado pro tia atingo.

Ĉu UEA restos nur pasiva fronte al la sinteno de la Sekretariato de UN, kiu rifuzis komuniki la Proponon al la Statoj-Membroj aŭ alimaniere ĝin pritrakti? Nete respondas Lapenna: "... la afero rilate la Proponon neniel estas finita. Ni interrompis la planitan pluan agadon en majo, 1967, pro la eksplacita peto de la iniciatintoj de la Skandinavia Propono al Unesko. ĉar, laŭ ilia opinio, kia ajn nia plua paŝo en tiu afero estus povinta malutili al la entreprenitaj klopodoj ĉe Unesko. Nun, kiam montriĝis, ke la Sekretariato de Unesko sukcesis unue prokrasti kaj poste entombigi la Proponon, same kiel ili sukcesis komplete akvumi la Proponon de Hindujo al la lasta Konferenco ("Esperanto", novembro, 1968), **nenio plu ligas al ni la manojn.**"

Li konkludas: "La baldaŭa publikigo de la tuta intertraktado kun la Sekretariato de UN provokos indignon kaj havigos al ni novan apogon en ĉiuj kulturaj medioj".

GRUMBLI. PLENDI?

En iaj kuntekstoj la du radikoj estas preskaŭ sinonimaj. Tamen laŭ kelkies lingva sento oni povas ilin uzi kun aparta nuanco.

"Grumbli" signifas: Obtuze mururi pro malkontenteco (P.V.).

"Plendi"—(1) vorte esprimi sian doloron, ĉagrenon, pri kapdoloro, aŭ ia malsukceso k.s. (2) vorte esprimi pro malkontento.

Ĉu estas do konsilinde, uzi "grumbli", kiam temas pri situacio, cirkonstancoj, afero, ne plibonigebla per homa ago? Ekz-e, Li grumbli pro la veteraĉo. Male, ĉe "plendi" oni esperatendas, ke iu plibonigos la priplendatan aferon, objekton, situacion. Li plendis al kelnero pro malpura tablotuko, aŭ al kunfirmano pro ties mallaboremo.

Grumbli—Radiko de la Dua Aldono (1914) al la Universala Vortaro.

One of the three largest libraries of Esperanto in the world is The Hector Hodler in the Universal Esperanto Association's Centre in Rotterdam. Owing to the rarity and value of many of the books, they are not lent on issue.

Recenzoj

“La Vivo de Zamenhof” (E. Privat): 5-a eldono, 133 paĝoj. Eld. Esperanto Publishing Co. Prezo 10/- Angla. Ce nia Libroservo.

La biografio aperis en 1920, do antaŭ 48 jaroj. Siatempe A. E. W(arden) antaŭdiris, ke ĝi transvivos generaciojn. Ci-eldono ankoraŭ konfirmas lian fidon.

Ne simile al la pli granda verko de Marjorie Boulton (1962), kiu donas ankaŭ iom tre kompletan historion de nia movado, la verko de Privat celas doni impresan skizon pri la vivo, penso kaj personeco de L.L.Z. La fama oratoro plene sukcesis, pentrinte perfektan tributon al la viro, kiun li varme admiris kaj intense alfidelis.

De lia bebeco en Bjalistok (1859) ĝis lia morto en Varsovio (1917), legantoj sekvas la zigzagojn de ĝojo kaj ĝeno laŭ kiuj pene paŝadis la pacienca Pola Hebreo, kies lingvon homoj jam uzadas ĉie sur la civilizita tero.

Privat verkis laŭ stilo ne ofte imitata. Unu rara similtulo estus Jean Forge, kiu infuĝe montras komparindan amon al la kurta frazo, la literatura “stakato”. Male, iuj frazoj de Zamenhof estas paragrafe longaj (ekz. Originala Verkaro, p. 278; Fundamenta Krestomatio, 9-a eld., p. 271—132 vortoj sen punkto krom la fina.) Preskaŭ ĉiupaĝe Privat ekzempligas per drasta kontrasto.

Li ŝparemas je sufiksoj, prefiksoj (“translogi” anstataŭ “translogigi”); ne timas la “maskitan elizion de adjektivo” (“tutkoro”); libere apostrofas: lunuecon; pri l’unua fako; pri l’alia; de l’ (sendistinge de lia ankaŭ uzata “de la”). Apostrofado kongruas ne nur en poezio, sed ankaŭ en la majeste sonora prozo, sed Privat uzas ĝin en sobre simpla, ne ĉiam kun eufonio.

Li misuzas: 18, 10, 106: centjaro; x (17: la korekta miljaroj); 2, 22: mesiana (mesia). Fakta eraro: Buffon, ne Hugo, “kantis”, ke “genio estas longa pacienco”.

15 fotoj, ink. 2 novaj, el 1937. La teksto estas senŝanĝa. En redaktita eldono oni certe trovus notojn pri dubaj historiaj aferoj—ekz. la “bru-

ligo” de la mss., kaj la aserto, ke De Beaufront aŭtoris Idon.

Tre havinda verko por novaj E-istoj; nekredinde, ke ĝi mankas al la aliaj.

“Vivo de Gandhi” Edmond Privat. Originalaĵo en Esperanto. Eldonis Stafeto. 172 paĝoj. Prezo 2 Us. dol. Ce nia peranto.

Biografio de unu el la plej noblaj animoj de nia tempo, homo, kiu per la praktika realigo de sia alta moralo transformis grandan popolon kaj forte efikis la fluadon de l’historio. Lia celo estis ne nur la liberiĝo de Hindujo, sed ankaŭ la liberiĝo de la tuta homaro el la blinda kredo al armita potenco.

Privat rakontas la eventojn jam de 1869 ĝis 1948, en kiu jaro Gandhi martirigis, lasante post si inspirajn venkojn de l’paco super la perforto.

Forme de nelongaj prelegoj en Esperanto, Privat deklamis la verkon kurtonde per Svisa Radio. Simile li jam antaŭe faris per sia: Aventuroj de Pioniro.

La stilo estas simpla, do facile legata kaj . . . aŭdata. Esperantaj radiprelegistoj nepre atentu.

Lingvaj rimarkoj: centjaro (sed, 21, jarmilo); 48-9: magistrato (-ano); Sudafriko (1), sed Afriko, 51; 51: taksojn (impostojn?); 52: fabrikoj, -ejoj (sampuragrafe); 79, 86: pli poste (pleonasma); 114: postserĉantoj (posten-); 118: antaŭ plendi (antaŭ ol...); 61: sikoj (133: sikhoj).

134: “lia ĉeesto evitis terurajojn . . .” (“evitigis). 137: “li ĉiam insistis por ke ili laŭtleĝu nur . . .” (forstreku “por”).

Influo de la Franca: “mortsezono” (Fr. morte-saison), tempo de senokupo, deviga nenifaro. 106: “ne komedia aŭ duona” (Fr. comedie, a demi):—hipokrita aŭ ne-tutanima (t.e. senarda); ŝajniga aŭ malvolonta. Dutri preseraroj. Sur la dorsa kovrilo legu: Interpola Konduto!

“Esperanto: A Complete Grammar”: Dr. Ivy Kellerman Reed. Scarecrow Press, 52 Liberty St. (P.O. Box 656), Metuchen, N.J., U.S.A. 166 pages. 5 U.S. dol.

Prof. Mario Pei devotes a discerning Foreword; the authoress a short review of Esperanto history and the

present situation; Prof. Ralph Lewin a recommendation of the work, rightly mentioning its clear presentation.

Among observations not often found in textbooks are those on Cognate Accusatives—intransitive verbs used with accusative nouns of the same root as the verb: vivi bonan vivon; jeti belan jeton; kuri rapidan kuron, &c. The Esperanto Bible has several examples. Copulative Compounds such as “lan-dakva” (terraqueous); “tagnokta” (day-and-night). “Ambau” is here named the “dual pronoun” and the remark made that “there appear to be some forms for the dual number in verbs in certain very old manuscripts.” Setting aside the redundancy of the paragraph in such a book, it could have been mentioned that Sanscrit, early Greek, the English of Alfred among the ancient, and some yet living tongues, for example Icelandic, possessed or possess an inflected Dual Number. But such irrelevancies, together with the note (p. 77) on “ju” and “des”, could be omitted.

By running the vocabulary in two columns a page, much space could have been saved for incorporation of further material in the body of the book. As it is, as few as five, six or seven letters form some of the spaced lines in the word lists.

Thirty suffixes and 9 prefixes are given. Butler (“Step by Step”) gives 33 and 19.

It is a pity that the book could not be made available in a cheap edition. For the needs of beginners, and the more advanced, the U.E.A. Year Book lists eight textbooks in English, ranging from the small introductory to a complete survey of the language at prices: 1/- to less than a pound, English money.

Its price precludes general use of this book for beginners' classes. Few would pay it for what in many cases is a tentative trial at learning a language. Elementary tools, cheap, simple yet trustworthy, are what is needed for the first stages of instruction; for such there is a market.

RECENZOTAJ

“Paŝoj el Plena Posedo”: William Auld. Legolibro kun ekzercoj.

“Norda Naturo”: Hilda Dresen. Poemaro.

“Tri Homoj Flugis al Luno . . . sed Mondlingvanoj Kverelas”: Teo Jung. Prilingva polemiko.

“La Necenzurita Humoro”: D-ro H. Maschler. Sercoj.

ELSIE GODFREY

Nia karmemora samcelanino mortis en la 3-a de Aprilo. La kremacio okazis en la 8-a. Si, kun sia fratino, Amy, eklernis Esperanton sub gvido de M. C. Butler ĉirkaŭ 1909-10. Nian sinceran kondolencon.

SERCOJ

Skoto dividis kajuton kun fremdulo. Antaŭ ol enlitiĝi li brosis la dentojn. “He”, ekkriis la fremdulo, kion vi faras per mia broso?” “Oh!” respondis la Skoto, “mi kredis, ke ĝi apartenas al la ŝipo!”

La edzino de Sandi grave malsaniĝis. La kuracisto diris, ke ŝia fino proksimiĝas. Sandi sidigis ĉe ŝia lito kaj deĵoris ĉe kandellumo. Tamen li devis eliri kelkajn momentojn. “Kiel vi vin sentas, Magi?” li demandis. “Kiel kutime”, spiretis la masanulino. “Mi lasos vin sola dum tempeto, sed . . . Magi, se vi sentos, ke vi foriras de ĉi mondo, nepre estingu la kandelon”.

Bulgaro kondukis sian edzinon al kuracisto, por ke oni operaciuj ŝiajn buŝglandojn. “Tiujn tonsilojn oni devus esti eltrancinta jam kiam via edzino estis infano”, rimarkis la kuracisto post la operacio. “Ĉu jes?” diris la Bulgaro. “En tia okazo bonvolu sendi la kalkulon al mia bopatro”.

ESPERANTO-INSTRUADO

La ĉefdelegito de UEA en Germanujo, Reinhard Haupenthal, jam diplomigis pri la supera instruado de Esperanto.

Nur tri aliaj personoj atingis tiun altan kvalifikon, kiu atestas pri kapableco instrui la lingvon sur universitata nivelo. La Internacia Ekzameno de UEA estas la sola vere internacia rimedo por prijuĝi la kapablon instrui Esperanton. (Informservo de UEA.)

TRANSPLANTOJ: 1984

Tiel multe da homoj nun havas en si la koron, aŭ hepaton, aŭ pankreaton, aŭ timpanon k.c., ke viro kiel mi,

kiu ankoraŭ posedas ĉiujn denaskajn organojn, havas iom neagrablajn senton de seninteresa ordinareco. Mi ne povas reciproki babili pri la afero; mankas materialo por gaja organecito.

Jen grupo ĉe societa vespero. Ili flustras inter si per siaj poparte pagataj laringoj: "Li estas ulo sufiĉe bona, sed li suferas de P.K."

"P.K.? Kio estas?"

"Sciu, kara, ĝi signifas: Propra Korpo. Li ne apartenas al nia elito—la kunularo de transplantit-organuloj!

Tiu transplantado povas konduki nin ĝis situacio jena: Strata renkontiĝo: "Ĉu vi rememoras min?"

La demandito gratas sian novan makzelon. La originan li ne povis razi sufiĉe senhara; ĉiam ĝi aspektis nigre nebona. Li tiam murmuris: "Mi ne povas revoki al mi vian viz-aĝon, sed viajn ŝultrojn mi ja revidas!"

Simile, vi povus bonhumure frapilon sur la dorso, kriante: "Dio mia! Petro Pikulo, mi kredis vin mortinta jam de kelka tempo!" Li respondus: "Mi ne estas Petro—kion vi vidas, tio estas nur lia kapo. Li testamentis ĝin al mi pro tio, ke mi terure suferis de kapdoloro".

Oni vidas reklamanoncon presajn kiel ekzemple: Tri bone vejnitaj galŝtonoj, bele, facile polureblaj kaj munteblaj.

Ankoraŭ: Negocisto, ĉefstabano komerca, volas privatigi el aferoj. Li ofertas unu veran ulceron, bone funkciantan. Nur unu posedanto, do tute originala.

Kiel bone la scienco progresas, ĉu ne vere?

PICKED PARS

The Vatican has given permission for the use of Esperanto in the Mass and for the Canon. This is most significant, for the largest world-organisation is the first positively to introduce Esperanto into its international life. A photostat of the mandate appears in several Esperanto gazettes.

Saarbrücken Univ. Philosophy Faculty has introduced Esperanto as an official subject.

A ten-week course in Esperanto was

conducted in the Loyola Univ., Chicago.

In England 20 to 30 schools teach Esperanto and 1626 pupils learn it in school time; in New Zealand 28 schools teach the language. ("Worker Esperantist.")

An international dictionary of Tourism is being prepared, under patronage of Prince Ranier of Monaco. It is in seven languages, including Esperanto. The International Academy of Tourism circularised agencies; 700 replied that they publish guide booklets in Esperanto. ("Svisa Espero.")

The most widely sold books in Esperanto for 1968: "La Spleno de Parizo" (Baudelaire); "Okuloj" (Marjorie Boulton); "Privilegia Vojo" (textbook by Vilho Setälä) in the three categories: belles-lettres, fiction, education. "La Feliciĝo", a disc by Dutch singer, Ramona van Dalsen, heard on Swedish Radio, topped the list.—Informa Servo de UEA.

France has the most Esperanto "consuls", followed by Germany, Britain, Sweden, Holland. (Informservo U.E.A.)

The 57th Universal Esperanto Congress will be held in Portland, Oregon, in 1972. It will be the third such to have venue in the U.S.A. The first was in 1910 at Washington; the second at San Francisco in 1915. To prepare the public for the event 25,000 copies of a 32-page booklet by Prof. Mario Pei will be issued. It deals with the problem of modern communication and the need for an international language.

The Spanish Esperanto Museum offers secure curatorship for material sent to it for conservation. A branch of the Spanish Esperanto Institute, it seeks co-operation from those interested.—Jorge Castel Gil, Ap 2428, Barcelona.

PRI HOMA RAJTO

"Ĉiu homo havas la rajton libere esprimi siajn opiniojn, sen malhelpo, kaj serĉi, ricevi kaj disdoni informojn kaj ideojn pere de kiu ajn medio, neĝenata de landlimoj".—Artikolo 19, Deklaracio de Homaj Rajtoj.

En kiom da landoj kaj lokoj tio estas ankoraŭ nur himera surpaperaĵo?

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription with membership: \$A3.00
(or 43 reply coupons).

Advertising: 10 lines: 1 dol.
(non-members).

Members: By arrangement.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084.
Treasurer (Kasisto): F.ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road,
Willoughby, N.S.W., 2068.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 88 Verney Rd. West, Graceville, Qld., 4075.
Address of A.E.A.: Box 415, P.O., Manly, N.S.W. 2095.

No. 75 (155)

MELBURNO.

Jun. 7 Julio, 1969

ESPERANTO EN NOV-ZELANDO

de Wm. H. King, F.N.Z.E.A., D.B.E.A.

Esperanto alvenis al Nov-Zelando frue en la nuna jarcento, kiam individuoj ĝin studis per lernolibroj iele akiritaj, verŝajne el Britujo. Antaŭ 50 jaroj iuj samideanoj deklaris, ke ili unuafoje renkontis Esperanton en "Stead's Review", tre populara, internacia revuo eldonita en Britujo.

La studentoj estis disigitaj tra la lando, probable pro la agado de S-ro Roland St. Clair kaj helpantoj en Auckland; ankaŭ de S-roj James Hampton kaj Cedric F. White kaj ties kunlaborantoj en Christchurch. En Balfour, apud Invercargill, kaj en Westport, S-roj J. L. Field kaj E. Young, respektive, vigle propagandis la Internacian Lingvon sialoke.

Organizado Komencis.

En Novembro 23, 1904, S-ro St. Clair dissendis cirkuler-leteron por anonci publikan kunvenon por starigi Esperanto-societon. En Decembro 1 "The Auckland Star" presigis reklaman inviton al interesatoj kunveni post kvar tagoj. Dek sep personoj ĉeestis kaj decidis fondi la Nov-Zelandan Esperanto-Societon, la unuan en la lando.

Post Auckland, oni organizis en Christchurch, kie S-roj Hampton kaj White okazigis kunvenon (Feb. 20, 1906) kaj starigis Esperanto-Societon tie, la unuan esperantistan en la Suda Insulo—la unuan en Nov-Zelando kiu filiigis al la Brita Esperantista Asocio—en Junio, 1906. Sammonate starigis la Southland Esperanto-Klubo ĉe

Invercargill. Unu el la fidelaj fondintoj, S-ro C. R. S. Barrett, mortis en Christchurch en 1967, daŭriginte sian por-esperantan laboron ĝis preskaŭ la vivfino. Li estis la unua UEA-delegito en Nov-Zelando (ekde 1909).

Nov-Zelandaj samideanoj havis intereson en la fruaj Universalaj Kongresoj de Esperanto. S-ro St. Clair ĉeestis la Unuan (Boulogne-sur-Mer 1905) kaj la Trian (Cambridge 1907). Li konatiĝis kun D-ro L. L. Zamenhof ĉe la Unua, kie la Doktoro partoprenis kun 688 kongresanoj. Paren-teze, el la 53 U.K.E. jam okazintaj, Nov-Zelando estis reprezentita en 31. Dek du Nov-Zelandaj Esperantistoj ĉeestis la 44-an (Varsovio) kaj 50-an (Tokio).

Frua Aktiveco.

Fruaj 'verdstelanoj' ankaŭ pensis pri la enkonduko de Esperanto en Nov-Zelandajn lernejojn. En Marto 1905 deputato de tri samideanoj vizitis la Cefministron kaj Ministron por Edukado. La petskribo ne sukcesis, sed oni gajnis multe da publikeco por Esperanto; same per la starigo de budo ĉe la grava Internacia Ekspozicio en Christchurch, Nov. 1906-Aprilo 1907. Tiutempe la tiea societo havis 120 geanojn en diversaj partoj de Nov-Zelando. La societo en Auckland aranĝis, ke "The British Esperantist" estu sendata regule al la loka publika biblioteko. Notinde estas, ke la Registara Turisma Oficejo en

Christchurch reklamis en Esperanto en tiu revuo. Dum 1908 la Nov-Zelanda Esperanto-Societo (Auckland) eldonis "Adresaron" de Nov-Zelandaj Esperantistoj (230 nomoj). En sia raporto por 1909 al la Parlamento, la Turisma Departamento sciigis, ke pluraj oficistoj jam lernis Esperanton kaj ke "leteroj kaj poŝtkartoj estis ricevita en tiu lingvo el transmaraj landoj tiel vaste apartaj, kiel Rusujo, Hispanujo, Svislando, Malto kaj Bulgarujo". (Dum kelkaj lastaj jaroj la Turisma Departamento prezentis bonegajn filmojn kun Esperantaj komentoj, kiuj gajnis aplaudon en multaj landoj kaj ĉe Universalaj Kongresoj de Esp.)

En 1909. S-ro H. A. Epstein (kiu mortis en Londono en Feb., 1961), forte antaŭen-puŝis la Internacian Lingvon en Wellington. Tie li starigis grupon kaj instruis ses klasojn ĝis sia transloĝiĝo al Invercargill, kie li daŭrigis sian por-Esperantan laboron per kursoj kaj ĵurnaloj, kies favoron li gajnis. Li ankaŭ fondis "La Nov-Zelanda Rondiranton" kun 30 interstatoj. En la sama jaro, novaj kluboj starigis en Whangarei kaj Gisborne. En 1910 fondiĝis en Auckland la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Jen la fonto de tre utila laborado por Esperanto en N.Z. Tia grava agado daŭris ĝis 1917, kiam la Unua Mondmilito, bedaŭrinde, ĝin kripligis. (daurigota.)

("La Esp. Enciklopedio" mencias ankaŭ Pastron Aldridge, unu el la plej fruaj pioniroj, ankaŭ la subtenon de ĉefministro Ward kaj ties ministro de popola klerigo, en 1907. Ward "faris bonegan paroladon favore al E. kaj konsilis instrui ĝin en popolaj lernejoj". La Encik. ankaŭ informas, ke en 1906—tiu sama jaro en kiu fondiĝis la societo en Christchurch "kun pli ol 100 membroj"—aperis E-kluboj ankaŭ en Dunedin kaj Invercargill. Precizaj datoj mankas.—Red.)

ESPERANTO EN DISERVO

Episkopo kaj 12 pastroj faris Paskan Diservon en la Ĉefeklezio de Bukareŝto kaj la evangelion legis en 12 lingvoj inklude Esperanton. La E-a legado belsone impresis grandamasan adorantaron.—N. Bulencea, Bd. de Baleescu 3, Bucharest, Rumania.

17th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4th to 9th January, 1970, Perth, W.A.

Congress Secretary: Mr. W. H. Howard, 31 Donegal Road, Floreat Park, W.A., 6014. Congress Fees: A.E.A. Member, \$5.00; non-A.E.A. Member, \$6.00; non-attending Member, \$2.00. Half these rates apply for those staying at Forrest House (add \$5.00 hotel deposit).

3rd List of Enrolments:

From Western Australia—

- No.
- 16. Dr. C. J. Caldera.
- 17. Mrs. I. H. Caldera.
- 18. Miss J. S. Lindsay.

From other States—

- No.
- 60. F-ino F. Dennys, N.S.W. (non-attending).
- 61. S-ino V. Yowe, Queensland.
- 62. S-ro V. J. Timmins, N.S.W.
- 63. Mr. V. Guelting, N.S.W.
- 64. Miss W. Addis, S.A.
- 65. Miss R. G. Telfer, S.A.
- 66. Mrs. I. M. Fallu, Vic.
- 67. Mr. F. J. Fallu, Vic.
- 68. Mr. F. R. Banham, Vic. (non-attending).
- 69. Mr. E. C. Tronerud, Vic.
- 70. Mrs. E. C. Tronerud, Vic.
- 71. Mr. E. W. Chandler, N.S.W.

Book immediately to avoid disappointment. If you wish to benefit by reduced rail-travel join a Group by contacting immediately Mr. W. Chandler, 57 Northcote Street, Crow's Nest, N.S.W., 2065, or Mr. Herbert Koppel, 41 Byfield Street, Reservoir, Vic., 3073. (Enclose stamped addressed envelope.)

TUTTAGA EKSKURSO

Tiuj kiuj ĉeestos la 17an A.E.A. Kongreson ĉe Perth povos partopreni tre ĝuidan tuttagan ekskurson.

Li klimatizita aŭtobuso ekiros je 8.45 atm. Dum la dekdu-mejla vojaĝo al Fremantle la pasaĝeroj trafos pitoreskajn vidaĵojn trans la rivero Swan.

Postlasante Fremantle-on, la buso iros suden kaj ni trapasos la industriaran regionon Kwinana, kiu tiel nomiĝas pro la ŝipo "Kwinana"—malgranda ŝipo de nur 3295 tunoj kiu transportadis komercaĵojn laŭlonge de la okcidenta marbordo antaŭ 50 jaroj.

Gi ekbruliĝis ĉe Carnarvon en la jaro 1920. Post la fajro la ŝipo re-

venis suden kaj restadis kelktempe apud la Insulo Gardeno—Garden Island. Tamen, post du jaroj—en Majo, 1922—ĝi ekliberiĝis el la aligilo kaj surteriĝis tie kie la restaĵo nun troviĝas—sur la strando de la urbo Kwinana. Preskaŭ nenio estas videbla sed la nomo “Kwinana” daŭros dum multmultjaroj kiel longdaŭra memorigo de la ŝipo mem.

Nia vojo sekvas la bordon de markolo nomata Cockburn Sound, kiu fariĝas granda ŝiphaveno por la oleorafinejo, la ŝtalfabrikejo, la alumina fabrikejo kaj aliaj entreprenoj.

Baldaŭ ekvidiĝas la urbo Rockingham. Komence oni eksportis de tie lignajn transportitan per fervojo el la postregiono. Unu el la malgrandaj lokomotivoj elmontriĝas en parko. Poste, Rockingham estis libertempa vizitejo kaj nun fariĝas la loĝloko de multaj laboristoj kaj emeritoj. La vojo daŭras preter allogaj strandoj kaj laŭtempe atingas la urbon Mandurah—kiu estas alia populara vizitejo de feriuoj kaj “fiŝkaptantoj” kaj la loĝloko de emeritoj kaj pensiuloj.

Tie la rivero Murray renkontas la maron; tie ankaŭ troviĝas la boato “River Queen” per kiu kongresanoj esploras la golfeton Peel (Peel Inlet) kaj la riveron Murray, kiu estas tre pitoreska.

Kelkaj insuletoj kiujn ni preterpasas estas rifuĝejoj de pelikanoj kaj aliaj akvobirdoj. Kredeble oni vidos defenojn kiuj ludnaĝas proksime al la boato. Atinginte lokon nomatan “Ravenswood”, la pasaĝeroj surteriĝos por partopreni lunĉon sur herbejo apud la hotelo.

Posttagmeze ni esploras alian riveron (Serpentine) antaŭ la reiro al Mandurah por komenci la 50-mejlan vojaĝon hejmen.

HOBART PRIZE-WINNER

Hobart “Mercury” (3/6) reports that Mr. Eino Looorits has won a prize in a competition run by the Polish Radio, Warsaw. The competition was globally publicised in Esperanto; entries came from 50 countries and 110 Australians entered for it.

Mr. Looorits is delegate for Philately in the Universal Esperanto Association. Exchanging stamps with children in many lands, he always includes advice on the learning of the international language.

Australia Kroniko

PERTH: Niaj kunvenoj en Aprilo kaj Majo konsistis ĉefe el tradukado kaj konversacio. Multaj membroj iris, 24/4, al Fremantle por adiaŭi S-inojn Pollard kaj Duggan (Albany), kiuj partoprenos la Univ. Kongreson en Helsinki kaj F-inon Garrow, kiu reveturas al Skotlando.

F-ino O. Strempel alvenis en la Novhebridoj, kie ŝi laboros kiel mi-siisto dum unu jaro. Survoje de Nov-Zelando al Anglujo vizitis nin S-ano Dennis Pease, 2-8/5, Esperantisto kiu ankaŭ multe interesiĝas pri la Skolta Movado. Kelkaj el niaj membroj montris al li viĉindaĵojn de nia urbo kaj de ĝia ĉirkaŭaĵo.

En Aŭgusto ni atendas la viziton de Ges-roj P. Schwerin, kiuj, revene de Eŭropo, restos dum 3 tagoj en nia urbo.

MELBOURNE: Tre utila kaj multflanka programo okazis, 21/4, kiam klubanoj rakontis laŭvice pri libro, kiu plej forte impresis ilin. S-ro Jim Daniel, ne-Esperantista amiko de S-ro H. M. Cohen, montris okaze de la monata amuzvespero, 28/4, diapozitiv-ojn kaj priskribis viziton al Nova Kalendonio. Vere profesiaj estis pluraj bildoj kapitaj el aeroplano.

S-ro F. R. Banham, 5/5, ĉiam gajhumora prezentis denove mikspoton de pensoj, konsiloj kaj informoj. Rakonto pri ministra patro, kiu per propra sango savis filon de subtera morto, pensoj pri “La epoko de la transplantitaj organoj”, pri “kapablo de angloj lerni lingvojn”, pri “neceso manskribi klare en la korespondado” estis nur kelkaj el la legitaj historietoj. Por instigi partoprenon en la kongreso en Perth, S-ro Linton prezentis, 12/5, diapozitivajn kaj sonbendon alsenditan de S-ro Howard. Poste S-ro Koppel informis pri vojaĝkostoj kaj arangota karavano.

Pri la “Kalevala”, eposa poemo de la Finnoj, parolis Kim Bastin (19/5). La sola inter ni, kiu kapablas kompari tiun mamutan tradukaĵon kun la originalo, Kim klarigis ke ĝi ne estas vera epopeo, ĉar ĝi prezentas ne nur unu longan rakonton, sed serion da rakontoj. “Vizito al Kambodio” estis la temo de prelego kun belegaj kolorbildoj de S-ro Jim Daniel (26/5).

Pro la ANZAC-tago ne okazis la RENDEUVUO en Aprilo. En majo,

spite de tre mizera vetero, ĉeestis sufiĉe kontentiga ĉeestantaro por aŭskulti al S-ro Ken Linton, kiu gajigis siajn aŭskultantojn, legante aron da amuzaj rakontoj, kiujn li tradukis.

Eastern Suburbs (Melbourne): Ni ricevis, tute senkoste, novan belan ejon en la biblioteko de Oakleigh. "Bonvenon" ni diras al ĉiu samideano kiu deziras viziti nin en nia nova klubejo. Ni kunvenas ĉiun 1-an kaj 3-an merkredon, de la 8-a ĝis la 9.30-a, en la Biblioteko de Oakleigh, unua etaĝo. (Atherton Road.)

SYDNEY: S-ro Frank Dunn parolis pri la Duko de Wellington, 21/4. Vortludojn lerte aranĝis F-ino Rita van Rijswijk, 28/4, kaj elementojn en lumbildoj montris S-ino Chaldecott, 5/5. Pro la "Patrina Tago" okazis, 12/5, diskuto kaj rakontoj de historietoj pri tiu tago.

Malnova amiko, S-ro W. L. Simpkins, angla mondvojaĝanto, vizitis nin, 19/5, kaj iom parolis pri siaj spertoj kiel Esperantista mondvojaĝanto. Samvespere S-ro W. Chandler montris lumbildojn pri sovaĝaj floroj de Aŭstralio. S-ino V. Schlesinger legis, 26/5, historion de Axel Munthe kaj, 2/6, S-ro W. Chandler gvidis vortludojn.—VOLO.

REDCLIFFE: Nia grupo nun havas 27 plenkreskulojn kaj 24 infanojn. S-ino Veronica Clarke, F-inoj Shirley Nielsen kaj Brenda Kent kaj Ges-roj V. C. Clarke instruas. Ĉiuj ĝuas la lecionojn kaj dum ni trinkas kafon ni penas paroli aŭ kanti en Esperanto aŭ aŭskulti al diskoj.

Ni nun havas 2 kursojn por infanoj: 12 progresintoj kaj 12 komencantoj, inter ili 5 etuloj de nur 6 ĝis 8 jaroj. Dankon al S-ino Hurford, kiu donas al ni la uzon de sia domo kaj al F-inoj Arlette Gilles kaj Alexia Joyner, kiuj instruas. Ni esperas partopreni en Julio en la Redcliffe Ekspozicio. Krom libroj, afiŝoj kaj poŝtmarkoj ni esperas prezenti nian infanan grupon, kiu demontros ludojn kaj kantadojn de E-kantoj. V. Clarke.

N.S.W. Esperanto-Federacio

Nia 9-a Konferenco okazis dum la semajnfino 17/18 Majo en **Canberra** en la hotelo Ainslie-Rex. La Canberra Grupo gastigis nin tre kore, kaj la tuta kunveno estis granda sukceso, vere ĝuinda laŭ la 27 membroj ĉeestantaj.

Vespere vendredon, la Canberra Grupo distris nin ĉe la domo de Ges. Amies; gaja komenco de nia vizito al la Cefurbo.

Matene sabaton, ni dise veturis por rigardi la vidindaĵojn, kaj posttagmeze okazis aferkunveno en la hotelo; poste la Kanberanoj prezentis kolorfilmon "Aŭstralio Hodiaŭ", kun komentario de Ralph Harry, lumbildojn pri Canberra, kaj amuzan skeĉon Cinan, nome "Taso de Teo".

Post vespermanĝo, Manly-a Drama Kurso prezentis tri ridindigajn skeĉojn, nome "Observu dieton", "Por prokrasti", kaj "La onklo estas bonhumora", kiujn preparadis S-ino M. Liston. Poste, S-ro Fritz Mueller-Soraŭ amuze kantis kaj anekdotis.

Fine, dimanĉon matene ni aŭdis sonbendon faritan de Ralph Harry ĉe la Zamenhofa Vespere en Rotterdam 1967. Li sendis tiun interesan raporton por la AEA Kongreso 1968, sed pro teknika malfacilaĵo ĝi nur nun rondiras inter la ŝtataj grupoj.

Nia Venonta Konferenco kaj 2-a Jarĉefmanĝo okazos en la Hotelo Manly 18-10-69. La aferkunveno komencos je 2h ptm, kaj la ĉefmanĝo je 7.30h ptm.

De post la lasta raporto, la **Monataj Piknikoj** estis bone vizitataj:—16/2, Shelley Beach, 22 membroj; 16/3, Parsley Bay, 16; 20/4, Balls Head, 27.

Venontaj Piknikoj:—15/6, Botanika Ĝardeno; 20/7, Church Point; 17/8, National Park, Audley; 21/9, Warrimbirra Wild Life Sanctuary, Bargo (on Hume Highway); 19/10, Cheltenham Reserve.—George Thatcher.

MARK TWAIN OPINIAS

"Talenta homo devus kapabli la Anglan lerni (se ne enkalkuli li literadon kaj la prononcon) en tridek horoj; kaj la Francan en tridek tagoj; kaj la Germanan en tridek jaroj. El tio sekvas, ke la Germana bezonas simpligan riparon. Se ĝi devas resti en sia nuna formo, oni lasu ĝin iri inter la mortajn lingvojn, ĉar nur mortintoj havus sufiĉan tempon ĝin lerni".

"Per la boneco de Dio ni havas en nia lando tri valoregajn aferojn: liberecon de l'parolo, liberecon de l'konscienco, kaj la prudenton neniam ilin praktiki".

AŬSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095
OFICIALA INFORMILO
28an de Majo, 1969

Novaj Individuaj Membroj:

Smith, S-ro M., N. Essendon, Vic.
Lipski, F-ino E., Hawthorn, Vic.
Johnston, S-ino I., Morwell, Vic.
Love, S-ino K., Morwell, Vic.
Macreadie, S-ro D., Cowwarr, Vic.
Murfett, S-ino J., Morwell, Vic.
Neave, S-ino J., Traralgon, Vic.
O'Neill, S-ino F., Yallourn, Vic.
Spencer, S-ino B., Yallourn N., Vic.
Wybenga, S-ro W., Morwell, Vic.
Johnston, S-ro J. D., Caloundra, Qld.
Turner, S-ino C., Morwell, Vic.
Wickford, F-ino S., Robinvale, Vic.
Cordery, S-ro B. H., Mapleton, Qld.
Muller, S-ino W. J., Woombye, Qld.

Donacoj al la Publiciga Fonduso:

Jam anoncita	\$386.07
Timmins, S-ro V. J., N.S.W.	2.00
Brodie, S-ro N., N.S.W.	2.00
Sennomulo, N.S.W.	14.50
N.S.W. Federacio	10.00
Hanks, S-ro E. S., Vic.	2.00
Goldsmith, S-ro C., N.S.W. (4a)	3.00
	<hr/>
	\$419.57

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Interŝtata Konkurso

Poentoj donataj:

Nova Individua Membro	5
Nova Dumviva Membro	50
Aliĝo al Populara Kurso	2
Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso	1

Stato je la 27a de Majo, 1969:

	Kvoto		Poentoj	%
Victoria	300	400	133.3	
Queensland	130	154	118.4	
N.S.W. & A.C.T.	260	301	115.8	
W. Australia	80	55	68.7	
Tasmania	30	12	40.0	
S. Australia	40	2	5.0	

Ekzamena Sukceso

B.E.A. Elementa: S-ino V. Yowe,
Brisbane.

—C. C. Goldsmith, Sekretario.

Niko, kiu frekventas elementan lernejon, ricevis alvokon por esti fizike ekzamenata rilate al sporto-partopreno. Li devis porti el sia hejmo boteton da urino (inter aliaj aĵoj).

Diris la panjo: "En la medicina ŝranko vi trovas malplenan boteton".
"Bone, panjo", respondis Niko, "sed ĉu ni havas urinon hejme?"

A.E.A. BOOK SERVICE

"Vivo de Gandhi" (by Privat)	\$2.00
"Vivo de Zamenhof" (by Privat)	\$1.30
"Life of Zamenhof (by Privat)	\$1.25
"Proverbaro Esperanto" (Zamenhof)	\$1.50
"The E.U.P. Esperanto and English Dictionary" (by J. C. Wells)	\$2.15
"Okuloj" (by M. Boulton)	\$1.95
"Somermeznokte Songo" (Shakespeare)	\$1.45
(translated by K. Kalocsay)	
For Children:	
"Negulino"	32 cents
Vortludoj	28 cents

Order from:

A.E.A. Book Service,
10 Sumersett Avenue,
Oakleigh South, Vic., 3167.

ELSIE GODFREY (vidu: p. 255)

La redakcio ricevis leteron de ŝia fratino Amy. Sekvas el ĝi kelkaj notoj.

La fratinoj lernis E-on sub gvido de M. C. Butler en Londono ĉ. 1908-10. Elsie estis gramatikeme talenta kaj faris rapidan progreson, gajninte la Diplomon de B.E.A. kelkajn monatojn post ekstudo. Ŝi fekunde tradukis poemojn, kantojn kaj teatraĵojn, kiuj damaĝe jam de longe plejparte perdis.

En 1913 ili venis en Aŭstralion, kie la traduka kapablo de Amy ankoraŭ trovis esprimon. La duo aliĝis en 1913-14 al la Melburna E-Klubo en Strato Elizabeth. Tie tiame instruis S-roj M. Hyde, J. Drummond kaj aliaj, kiuj jam ne plu estas inter ni. John Glaisher tajpadis la teatraĵojn. Antaŭ tiu klubejo estis surpavime enĉizita Verda Stelo.

Poste kun Amy ŝi gvidis teatran grupon — "Frenezajo" — en la ĉambro de la Aŭstralia Eklezio (seкто fondita de D-ro C. Strong ĉirkaŭ 1884). Ili grupo daŭris tri jarojn. Inter la aktoroj rolis S-roj R. Rawson, G. Hussey, K. Linton, E. McKenzie kaj B. Brentwood.

Elsie havis kapablon trafe traduki idiotismajn esprimojn, kiaj troviĝas ekzemple en poemoj de Lawson; ankaŭ el A. Milne, Shaw, Blake kaj Shakespeare ŝi elektis preferitajn pec-

ojn por revesti en E-o. Si ne timis "fronti la nefareblan".

Jam de la frua tempo ŝi kaj ŝia mentoro Butler korespondis—iris tien-reen centoj da leteroj pri ĉiaj temoj, tute en E-o. Ĝis du jaroj antaŭ sia morto, ŝi instruis E-on koresponde, kaj en la finiĝantaj jaroj de vivo estis studenta la Francan lingvon, sam-energie kiel ŝi en la antaŭa tempo studis E-on.

Vee ni vidas ankoraŭ unu pason de pioniro. Multaj ŝin memoros kun amo kaj admiro.

MANSKRIBU KLARE!

Latinliteraj E-korespondemuloj foje plendas pri nerespondo al siaj leteroj. Povas esti, ke ili kulpas pro sia skribaĉo. Multaj milionoj da homoj nur malfamiliare uzas la Latinan skribalfabeton, sekve ili trovas nelegebla la rapide faritan kokografion de siaj Okcidentaj "plumamikoj" kaj ĉagrene lasas fali la manojn, nerespondonte.

Pri tio plendas Japanoj kaj Ĉinoj, kiuj uzas ideografian skribon inter si. Ordinare tiuj naciĉoj, uzante strangan skribsistemon, ĝentile, pacience zorgas skribi Latinlitere; iliaj leteroj ĝenerale estas facile legeblaj.

Okcidentanoj, skribante al homoj komune uzantaj la Latinan alfabeton, ofte trosupozas, ke la adresatoj povas deĉifri ilian skribaĉon. Ilia supozo ne ĉiam validas!

Tiu diro ankoraŭ pli forte aplikigas al homoj por kiuj la Latinskribo estas fremda, stranga, malnatura.

Tial, al viaj Aziaj amikoj skribu kaligrafie, ne kakografie! Per tio la korespondado pli glate iros. Tiu konsilo meritas ankaŭ pli vastan obeon!

SUPPRAJA LINGVOSCIO

Oni povas trompiĝi per la centoj da informkartoj en bankoj, oficejoj, magazenoj, kiuj anoncas, ke en ili estas parolata la Itala, la Greka aŭ la Germana. Verdire, multaj el tiuj tiel-nomataj plurlingvuloj bone parolas nur la Anglan kaj havas nur elementan scion de tiu Eŭropa lingvo pri kiu ili pretendas. Tre ofte okazas, ke enmigrinto, demandinte pri afero, estas miskomprenata, ĉar la interpretisto nur mezbone scias tiun lingvon.

—"Age", 27/5.

Recenzoj

"Tri Homoj Flugis al Luno . . . sed Mondlingvanoj Kverelas.

Teo Jung. 24 paĝegoj. 2.50 guld. Eld. Heroldo de E.

La aŭtoro pledas por ŝanĝo en la sinteno de E-istoj interkverelantaj, ĉeso de rivalado inter ĉiuj "interlingvanoj" kun celo "kunlabori por la komuna idealo" kaj plisimpligon de E-o, por kio li konstrueme sugestas vojojn direkte al eventuala "solvo" de la "participa problemoj".

La verko estas interesa ankaŭ por generalaj legantoj. Oni povas ne nur lerni multon pri la Zamenhofa lingvouzo, sed ankaŭ enrigardon akiri en la menson kaj penson de honoro eminenta E-isto, kiu jam preskaŭ 60 jarojn sin donis al la movado.

"Realisto" kuraĝa, neniam mankis sincera elesprimado al la aŭtoro, kies kritikoj stimule servus kiel duŝo al la tro-memfiduloj kaj memvolaj blinduloj antaŭ situacio ne en ĉiu rilato ĝojiga.

Kune estas Aldono de Paul Lobut, juristo, pri la Akademia Decido de 11/67. Li invitas legantojn traduki: "Mi juras, ke hieraŭ la fenestro estis fermita". Ĉu via respondo estus: (a) hieraŭ la fenestro estis en stato de fermiteco; aŭ (b) hieraŭ la fenestro estis en stato de malfermiteco, kaj oni fermis ĝin.

Entute lego de la elkore ŝirita traktaĵo similas al gluto de amara pilolo kaj lasas seriozan leganton kun emo preĝi, ke baldaŭ la niarondaj disputantoj premos unu al la alia la manon en firma konsento. Vee, en la nuna momento tiu deziro ŝajnas aparteni al la utopia kategorio de la pledoj en ĉi-unua paragrafo.

"Paŝoj al Plena Posedo": progresiga legolibro kun lingvaj ekzercoj. Wm. Auld, L.A. 238 paĝoj. 2 U.S. dol. aŭ egala. Eldonis ĝin Heroldo de Esperanto.

Kompilis ĝin elstara prozisto kaj poeto. Ĝi bone servas al homoj jam studintaj lian: "Esperanto—A New Approach". Egale taŭga por memlernantoj kaj por kursanoj, la libro estas bazita sur la principo: Oni plej bone lernas Esperanton per studado de bona Esperantaĵo. Evitu la nacian lingvon, komprenu en Esperanto-kaj

vi pensos en Esperanto". Tial, el 30 legajoj, nur kvin estas de Britoj: tri originalaj, du tradukaj.

145: atompeso (-pezo). La aŭtoro provizas nur sep solvojn al la 173 ekzercoj. Mankas solvo al la 112-a, kiu prezentas: "Ĉiu el vi ricevos (LIAN, VIAN, SIAN?) monon". "Neniu el ni evitos (NIAN, SIAN, LIAN?) sorton".

Rekomendinda al amantoj de bona prozo kaj strebantoj al esprime fleksebla lingvouzo.

Mendantoj rajtas rabaton de 0.40 U.S. dol. validan por aĉeto de la Unua Volumo de la "Fabeloj" de Andersen.

"CENT HIMNOJ": Tradukis Hans A. Rosbach, Nergt 37c, 6500 Kristiansund N., Norway. 61 pagoj.

Kun escepto de 6 Germanaj, 2 Anglaj, 1 Itala kaj 1 Finna, la kolekto estas verkitaj de Skandinavo, kaj per tio malfermas al Britoj novan terenon de la himnologio. En tio ĝi estas aparte valora.

La tradukinto libere apostrofis, precipe ĉe partikoloj pro rimbezono: nun, pun'; jam, voluptem'; vi, eklezi'; ni, Di'; jam, flam' k.m.a.

S-ro Rosbach proprakoste faris admirindan laboron. La kosto estas modesta — 20 steloj; 5-ekzemplera mendo je duona prezo, plus sendkosto. Je deko, li liveros, mem paginte afrankon.

Estas supozinde, ke Kristanoj volonte mendus ĉi tiun versan ateston al sia propra fido.

"Esperanto por Infanoj": G. Gladstone Solomon. Sesa eldono Eld. E.P.C. 68 paĝoj.

La unua eldono aperis en 1930. La sesa atestas ĝian daŭran utilon, ja bezonatecon. Proze, verse, bilde ĝi celas interesi infanojn sub instruado, sed ankaŭ memlernantoj ĉiuagaj povas tiri lingvan scion, inter lima kadro, se ili krome uzas gramatikon.

Influis la aŭtoron vortoj de Anatole France (1884-1924): "La infanoj de la mondo povus fini militon". Ni ankoraŭ atendas venon de tiu mirakla generacio.

24 ĉapitroj pri hejmscenoj familiaraj por infanoj; trakto pri sep sufiksoj. Li evitas uzon de kunmetitaj verbttempoj. Sekve ĝi prezentas nur elementan enkondukon en la lingvon.

La teksto estas nerevizita. 46: "J. lernis . . . poemeton post 5 minutoj" (en la daŭro de; antaŭ ol pasis pli ol . . .). 67: "Kial J. devas ne iri hodiaŭ al la lernejo?" (. . . "ne devas" havus diferencon sencon ol la tie ĉi supozata).

Al etuloj la ĉarme naivaj skribbildetoj sendube plaĉas la okuletojn.

Ĉi pruvita instruilo helpus interatojn pri infaneduko; eventuale, malgrandajn modifojn ili povus fari laŭ apartaj situacioj.

La Necenzurita Humoro: Kolektita de D-ro H. Maschler. 89 paĝoj; 14 steloj. Esperanto-Ligo, Bank Leumi, Kikar Malkej Israel, Tel Aviv.

Kiuj volonte legas ŝercojn kontraŭ la komunismo, tiuj mendu la libreton. Enkondukas la ridregalon interesa parolo pri la kaŝata, subvoĉa ŝercmokado en popoldemokratiaj landoj. Li povus aldoni, ke tia situacio troveblas ankaŭ en aliaj landoj, kie indignaj homoj devas direti diskrete.

Specimene: "Dum venontaj kvin jaroj ni devas kuntiri la zonon!"

"Kie oni povas aĉeti zonon?"

Laŭ humora valoro — tro ofte torporo. Ĉe kelkaj la senca kerno kuŝas sub ŝelo multe tro malmola.

"**BIBLIA REVUO**", nova serio, n-ro 5. Dumonata revuo: Redaktoro, D. Broadribb (Melburno); Direkcio, A. Duranti, Piazza Duomo 4, Ravenna. Jare: 6 U.S. dol.

Tute en E-o, la Revuo precipe celas homojn jam progresintajn en tekstkritiko pri la Biblio, ĝia kultura fono kaj historia evoluado. Ĝi prezentas en si provon meti E-on sur gravan nivelon de la sciencfaka mondo. Sekve ĝi ne pretendas esti populare literatura.

La redaktoro esais pri la koncepto: Mesio kaj Kristo. D. B. Gregor analizas la tekston de Genezo 1-3. Aliaj artikoloj temas pri Bibliaj Fundamentoj de Ekuamenismo; pri La Unua Kristana Preĝejo — la Sankta Mangejo. Ĉio estas dokumentita. Valoraj notoj pri kuranta literaturo priliblia.

La Revuo meritas subtenon de ĉiu E-isto, kiu fakstude kompetentas absorbi ĝian kleran enhavon.

La sekvinta n-ro (Jan.-Feb.) atendas nian recenzon.

LA KAOSO: Domenico Pastorello. 73 paĝoj. Mil ekzempleroj senpage. 13 Fos sur Mer, France.

La aŭtoro estas 87-jara, bravulo kiu penas kompaktigi en libreton siajn pensojn pri preskaŭ ĉia -ologio jam de geologio ĝis socia scienco, ne timante apopleksion.

Au lia Itallingva originalo estas malbone esprimita, aŭ la tradukinto mise prezentis liajn profundajn frazojn — ĉiuokaze la tekston oni legas nur malfacile. Se la originalo estas eĉ modere klareprima, la traduko ne konfirmas la diron, ke "Esperanto kapablas ĉion", almenaŭ ne per ĉies mano. Al la verketo evidente mankis kontrolo de ne-Itala E-isto.

Tamen la libreto enhavas da valoro; precipe tenas atenton la ĉapitro pri la evoluo de la homo tra la miljaroj, kaj pri la teraj epokoj.

"Norda Prismo", n-ro 3-4, 1968. 60 Paĝoj. 43 steloj. Mendu ĉe K. Linton.

Denove fasko da altnivela legaĵo, proza, poema. Cefredaktoras ĝin Wm. Auld, kiu kontribuas du poemojn kaj proztradukon el verko de A. Saroyan. Aliaj verkistoj familiaraj al legantoj: M. Boulton, A. Styler, Kalocsay, H. Tonkin, P. Thorsen... Entute 28 eroj.

Necesas legadi ĉi-revuon por scie kaj sente sekvi la fluadon de nia evoluanta beletro.

ĈEĤOSLOVAKIO

En centro de Eŭropo
Landeto trovis sin . . .
Nun eĉ per mikroskopo
Vi ne plu vidas ĝin.
Nur epitaj' atestas
En la geografi',
Ke plu nenio restas
De Ĉeĥoslovakio!

Sed iam ĝi revivos
El cindro kaj ruin',
Kaj tio ĉi signifas
La venĝon de l'destin'.
Vi povas korpojn ligi,
Eĉ venki per pistol'
Sed ne enkatenigi
L'animon de popol'!

—Raymond Schwartz, "La Goja Podio", 1949.

"Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj": 150 paĝoj plus multe da statistikaj tabeloj. Riĉe ilustrita per fotoj de Polujo en detruo kaj rekonstruo. Kompleta analizo de la Pola socio ĉiuspekta. Ricevebla **senpage** ĉe Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Box 46, Warsaw.

MISTERA PARODIO

Sur p. 322 de "Lingvo kaj Vivo" Prof-o Waringhien mencias tradukitan parodion laŭ teksto Hamleta: Monologo de Komizino. Ĝi kiel unua aperis en La Suda Kruco (Julio 1933)—"Tradukis A.E.M.B., Brisbane". Kiu estis tiu nekonato?

Ĝi aperis reviziita en The British E-ist, Sept. 1934; ankoraŭfoje en Majo, 1947.

CENTRE OF ESPERANTO DOCUMENTATION

Issues "La Monda Lingvo-Problemo", a New Periodical.

The firm Mouton & Co. at The Hague publishes this revue, which contains articles in English, French and German, with notes in Italian and Spanish. Editorship comprises Professors Pei, Lapenna, Bokarev, Migliorni, Waringhien, Capell and others. V. Sadler, R. L. Harry (English), and I. Lapenna (French) are among the first six contributors to No. 1 (Jan. 1969).

It aims to awaken interest in the problem of language diversity in the important fields of science, administration, education, industry and politics. Chief emphasis is on the problem rather than the solution, but fitting attention is given to this subordinate aspect. Reasonably detailed resumes in Esperanto are given after each article; this enables any reader in that tongue to draw from the text its essential message, even though he be ignorant of the national language in which it is written.

The regular appearance of the revue three times a year is guaranteed, and in many countries universities, libraries, linguists and others are subscribing to it.

Contact our agent.

Subscription is £2/18/- English.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084.
Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road,
Willoughby, N.S.W., 2068.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 88 Verney Rd. West, Graceville, Qld., 4075.
Address of A.E.A.: Box 415, P.O., Manly, N.S.W. 2095.

N-ro 76 (156)

MELBURNO.

Aŭgusto, 1969

LA KAMPANJO SUKCESAS

Je la 28a de Junio kunvenis en Melburno la Prezidanto, S-ro K. G. Linton, la Sekretario, S-ro C. C. Goldsmith, kaj la Vic-Sekretario, S-ro H. Koppel, por diskuti la nunan staton de la Asocio. Le Sekretario prezentis la jenajn ciferojn.

1969 kotizoj ricevitaj ĝis la 27a de Junio	\$798
1968 kotizoj ricevitaj dum la tuta jaro	\$639
Donacoj al la Publiciga Fonduso	\$455
Informpetoj ricevitaj Januaro - Junio	745
Dum la sama periodo aliĝis	
al la Populara Koresponda Kurso	43 personoj
al la Mezgrada Koresponda Kurso	25 „
al la Altgrada Koresponda Kurso	5 „

Interŝtata Konkurso. Oni decidis doni poentojn en tiu konkurso ankaŭ por aliĝo al la Mezgrada Kurso 5, kaj por la Altgrada Kurso 10. Krome, ankaŭ por sukcese en la Ekzamenoj, 2 poentoj por la Elementa, 5 por la Supera, kaj 10 por la Klereca. Tiuj validas de la komenco de la nuna jaro, kaj ĝisdataj ciferoj, enkalkulinte tiujn, troviĝas en la Oficiala Informilo sur alia paĝo.

Ni esperas, ke tiuj planoj kuraĝigos membrojn, kies scio de Esperanto ne estas tre bona, aliĝi al la Mezgrada aŭ Altgrada Kurso, ĉar ambaŭ estas bonaj kaj la instruantoj lertaj.

Simile, ni deziras kuraĝigi tiun, kiu jam havas bonan scion de la lingvo, entrepreni unu el la ekzamenoj por pruvi al si, ĉu li (aŭ ŝi) estas tiel lerta kiel li esperas! Lerta Esperantisto estas la plej bona reklamo por la lingvo. La oficejo volonte sendos al vi informilon pri la kursoj aŭ ekzamenoj kontraŭ peto.

The Australian Esperantist. Pro la bona rikolto de novaj membroj, kaj sekve la pli bona financa situacio de la Asocio, post la nuna Aŭgusto la gazeto aperos ĉiumonate (krom ke estos unu numero por Jan.-Feb.) je la unua de la monato. Tio signifas 11 numerojn en la jaro anstataŭ la ĝisnuna 8. Krome, se la varbado de novaj membroj daŭras esti bona, kaj se niaj nunaj membroj restas fidelaj, ni esperas ekde Januaro eldoni numerojn kun pli da paĝoj. Ni tre esperas, ke ĉiu klopodos varbi kiel membrojn tiujn Esperantistojn, kiuj ne estas membroj. Aliĝiloj estas haveblaj kontraŭ peto.

Publicigo. La granda plimulto de la informpetoj kaj la aliĝoj al la kursoj venis pro la verdaj kartoj, sed mi opinias, ke ne pli ol kvarono de niaj membroj helpis la kampanojn per ilia distribu. Evidentiĝis, ke la plej taŭga metodo tion fari estas aranĝi, ke estu kvanto en loka publika biblioteko, por ke klientoj forprenu ilin. Kompreneble oni devas unue havigi permeson de la bibliotekestro, kaj preskaŭ ĉiu volonte donis tion. Alia metodo kiu pruviĝis taŭga estas la sendo de karto en leteroj al konatoj, sed kutime tio pli bone sukcesas kiam oni simple enmetas la karton kaj ne mencias ĝin en la letero. Vi povas ricevi tiom

da kartoj kiom vi deziras de la oficejo, sed **nepre** indiku la nombron; donu ciferon, ne diru 'kelkajn'.

Antaŭ kelkaj monatoj mi skribis "Advance Australia", kaj nun evidentiĝas ke Aŭstralio antaŭeniras. Mi tutkore dankas al ĉiu, kiu helpis atingi tiun sukceson, sed se ĉiu membro same farus la sukceson estus multe pli granda. Do, bonvolu fari tion, kion vi povas en via regiono.—Etulo.

OFICIALA INFORMILO 9an de Julio 1969.

Novaj Individuaj Membroj:

Hirstgood, S-ro B. E., Morwell, Vic.
Heldzingen, S-ino H. I., Boronia, Vic.
Ritchie, S-ro R. A., Nambour, Qld.
Minton, F-ino E. C., Launceston, Tas.
Shikano, F-ino M., Morwell, Vic.
King, F-ino K., Morwell, Vic.
Winslow, F-ino P., Morwell, Vic.
Webb, S-ro J. H., Coorparoo, Qld.
Gordon, S-ro T., Traralgon, Vic.
Howarth, S-ro C. C., Morwell, Vic.

Junulaj Membroj:

Caprara, F-ino A., Morwell, Vic.
Caprara, F-ino G., Morwell, Vic.
D'Amato, F-ino E., Morwell, Vic.
Guarascio, F-ino R., Morwell, Vic.
Henderson, F-ino K., Morwell, Vic.
Jacobs, F-ino S., Yinnar, Vic.
Millen, F-ino N., Churchill, Vic.
Perkins, F-ino G., Morwell, Vic.
Purss, F-ino S., Morwell, Vic.

Donacoj al la Publiciga Fonduso:

Jam anoncita	\$419.57
Olson, S-ino R. W., N.S.W.	0.50
Kemp, F-ino F. H., Vic.	2.00
Kelly, S-ro S. J., Vic.	0.20
Morrison, S-ro R., Vic.	5.00
Towsey, S-ro A., N.S.W.	2.00
Wall, S-ro F. G., Vic.	2.00
Brisbane Esp. Soc., Qld.	5.00
Robertson, S-ro R., N.S.W.	15.00
Thorp, S-ro D., W.A.	2.00
Hill, S-ino E. M., N.S.W.	1.70
Crane, S-ro D., Qld.	2.00
Bennett, S-ino B., N.S.W.	1.00
C.C.G., N.S.W.	2.00
Iu, N.S.W.	0.40
	<hr/>
	\$460.37

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Interŝtata Konkurso Poentoj donataj:

Nova Individua Membro	5
Nova Dumviva Membro	50
Aliĝo al la Populara Kurso	2
Aliĝo al la Mezgrada Kurso	5
Aliĝo al la Altgrada Kurso	10
Sukceso ĉe la Elementa Ekzameno	2
Sukceso ĉe la Altgrada Ekzameno	5

Sukceso ĉe la Klereca Ekzameno 10
Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso 1
Stato je la 9a de Julio 1969:

	Kvoto	Poentoj	\$
Queensland	130	258	198.5
Victoria	300	479	159.6
N.S.W. & A.C.T.	260	401	154.3
W. Australia	80	77	96.2
Tasmania	30	17	56.7
S. Australia	40	4	10.0

Ekzamenaj sukcesoj:

A.E.A. Elementa:

*F-ino J. Turner, Rockhampton, Qld.

*S-ino I. Fallu, Oakleigh S., Vic.
S-ro L. Buchanan, Eltham, Vic.

*indikas kun honoro.

C. C. GOLDSMITH,
Sekretario.

17th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4th to 9th January, 1970, Perth, W.A.

Congress Secretary: Mr. W. H. Howard, 31 Donegal Road, Floreat Park, W.A., 6014. Congress Fees: A.E.A. Member, \$5.00; non-A.E.A. Member, \$6.00; non-attending Member, \$2.00. Half these rates apply for those staying at Forrest House (add \$5.00 hotel deposit).

4th LIST OF ENROLMENTS

From Western Australia—

- No.
19. Mrs. A. B. Sedgley.
20. Miss V. Egan.
21. Mrs. S. Blockley.
22. Miss O. Hunt.
23. Miss E. I. Bryant.
24. F-ino M. A. Smith.
25. S-ino V. D. Threlfall.

From other States—

72. Miss A. Godfrey, Vic.
73. Miss E. C. Minton, Tas.
74. Mrs. B. Thomas, Vic.
75. Mr. L. C. Willis, N.S.W. (non-attending).
76. Mr. A. C. Heathfield, Vic.
77. Mr. R. S. P. Reed, Vic.
78. Mrs. E. Reed, Vic.
79. S-ro A. J. Baldwin, Vic.

80. S-ro A. L. McLochlan, Vic.
 81. S-ino McLochlan, Vic.
 82. S-ro N. Brodie, N.S.W. (non-attending).
 83. S-ino D. M. Sinclair, Q'land.
 84. S-ino K. Morrison, N.S.W.

Book immediately, to avoid disappointment. Combine the holiday of a lifetime with participation in the congress.

A.E.A. BOOK SERVICE

"Gaja Leganto" (by P. E. Schwerin), featuring jokes, games, plays, advice for group leaders. Only 35c.
 (Postage 9c)

The ideal "reader" for classes.

"La Papalagoj" (trans. by F. Faulhaber). Impressions of an Oceanic tribal leader of white civilization. 60c.
 (Postage 9c.)

"Infanoj ne konas limojn", features over 100 enchanting photos of children from countries throughout the world. 80c.
 (Postage 17c.)

Order from

A.E.A. BOOK SERVICE
 10 Sumersett Avenue,
 Oakleigh South, Vic., 3167.

Dez. kor. pri div. temoj, interŝanĝi Poŝtmarkojn, bildkartojn. Robert Dannenberg, 42 Merseburg 1, Postfach 3, Germany.—D.D.R.

PEDAGOGIA REVUO

De Helmut Sonnabend venis arda alvoko al instruistoj, ke ili lin helpu al fondo de **Internacia Pedagogia Revuo**. Fakrevuo tiunoma aperis en 1910. Post sortaj fluktuajoj ĝi denove fondiĝis en 1956, sed ĝia nomo ne plu aperis en la UEA-jarlibro post 1959. Estas ja strange, ke ankoraŭ mankas internacia instruista revuo al nia moderna mondo, en kiu Esperanto supozinde jam akiris relative altan prestiĝon. Guste en pedagogiaj rondoj centriĝas la plej signifa batalloko en kiu la sorto de nia lingvo fine decidiĝos. Por detaloj interesatoj vin turnu al: H. Sonnabend, Im Ecker-skampsfeld 11a, 3161 Dollbergen, Germany.

Sunsubiro

Krepusko aspergis delikate siajn ombrojn super la rivero, kaj, kiel bela virino en la lumo de kandelo, arboj kaj akvo fariĝis luksaj en la karmezina lumado de la sunsubiro.

La arboj tualetis antaŭ la speguleca fluaĵo. Nur okaze la reflektajon ĝenis serio de ringoj. Tiuj ringoj estis monumento starigita far la naturo al la memoro de muŝo, kiun surprizis truto. Estis momento paca, kiam suferoj malaperas kaj la ĉeesto de Dio estas preskaŭ tuŝebla.

Iom fore almonten la solenan momenton tute ignoris anaro de junaj fiŝantoj, kies sola intenco estis kapti truton, sed ĉe maljunulo sidanta ĉe la bordo ekzistis nenia sakrilegio, ĉar al li restis tro malmulte da sunsubiroj. Tian malŝparon li ne povis toleri.

Li sidis tute senmova kun arba stumpo por apogi la dorson, lia kapo supren levita kiel preĝe. La nuran moviĝon faris fumo supren kirliĝanta el lia pipo. La fiŝtango kuŝis tute neglektita. Lia vetertuŝita vizaĝo estis krispa kaj hardita pro la ŝarĝo de la vivo, sed liaj mildaj okuloj briletis. Tiomomente li estis tute kontenta.

La flosaĵo balanciĝis neatendite. Gi mergiĝis kaj kuregis. Gi iris la stangon. La maljunulo entiris la fadenon. Bruna truto ornamis la hokon. La malglata mano hezitis antaŭ ol meti la fiŝon en la korbbon. Penseme li rigardis la kaptajon kaj grimacis al si. "Ho, nun ne estas tempo por mortigi", li diris, tute aŭdeble, dum li remetis la truton en la akvon. "Nenio devus morti dum sunsubiro".

La maljunulo ne repretigis la hokon —mankis al li la tempo, ĉar la suno tro baldaŭ malaperos.

En tiu momento knabo vadis tra la akvo kaj ekgrimpis la bordon. "Kvar tutaj horoj sen ia ajn mordo," li diris. "Kia perdo de tempo."

"Jes, mia filo", mole respondis la maljunulo. "Estas nur perdo de tempo, se vi fiŝas nur por fiŝoj. Prenu iom da konsilo. Ripozigu vian stangon sufiĉe longe por ĉirkaŭrigardi; observu la cervon dum li trinkas el la rivero; rimarku la ekflugantan anason; flaru floron, aŭ eĉ pli bone, observu sunsubiron. La kreitaĵoj de Dio estas tute ĉirkaŭ vi, mia filo, kaj kiam Dio faras ion, ĉiam tio estas observinda."

Etendante faskon el kvar trutoj, li diris: "Jen, filo, se fiŝojn vi deziras, prenu ĉi tiujn. Por tiaj aferoj mi ne venis."

Mirego kaj iomeĉe da kompreno lumigis la knaban vizaĝon. Tiam ankaŭ li grimacis kaj komencis grimpi la bordon, sed li paŭzis sufiĉe longe por pluki sovaĝan floreteton.—El la angla tradukis Ken G. Linton.

LIBERA FORUMO

Pupitro por Plendantoj.

S-ro I. Seriŝev, 8 Russell St., Strathfield, 2135, en letero al la redakcio kontestas la kvinan Fakton pri Esperanto, kiu troviĝas sur verda karto de la Asocio—nome, ke "Esperanto havas . . . pli ol 100 gazetojn". Li demandas: Kiu povas nomi la centon da gazetoj? Li argumentas, ke ekzistas certe ne pli ol dek "veraj gazetoj"—inter ili Heroldo de E-o, El Popola Ĉinio, Nova Bulgario kaj Oomoto. Kelkaj aliaj estas nur "mizeraj folioj", inter kiuj havas lokon nia Asocia organo.

Li revokas en memoron la fruan tempon de Esperanto, kiam aperadis la dikaj Lingvo Internacia, La Revuo, Japana E-isto, Verda Utopio kaj aliaj simile impresaj.

Li opinias, ke en la kampo de gazeteldonado E-o fakte regresas, sed bone progresas en aliaj agmedioj. Lia finvorta konsilo: "Neniam troigu!"

Sur aparta folio li laŭdas la redaktoron de La Biblia Revuo (Prof-o D. Broadribb): "Sendepende de ajna religia aŭ malreligia vidpunkto, apero de tia serioza internacia dumonatulo estas, de Esperantisma vidpunkto, tre grava afero. Nia movado urĝe bezonas aperon de tiaj periodaĵoj en kaj por diversaj branĉoj de la homara kulturo, sed bedaŭrinde post 70-jara ekzisto de E-o ni povas prezenti al la neesperanta publiko ne pli ol dekduon—certe ne "pli ol 100".

(Komento de la Red.—Estas klare, ke entute la gazeta literaturo E-a de la nuna tempo malfavore kompariĝas kun tiu de la jaroj antaŭ la mondkrizo en la finiĝanta jardeko 1930-40. En la plej bela tempo aperis vere impresaj gazetoj, ekz. Amerika E-isto, Franca E-isto, Literatura Mondo, International Language, American Esp-o Magazine. Hodiaŭ ne aperas E-gazeto en Nordameriko, 183-miliona popolo.

La degeneriĝon kauzis diversaj faktoroj, ĉefe la kreskanta haoso mondpolitika (kiu efikis ekstere kaj interne sur la E-movadon), la ŝanĝoj en socia vivo ĝenerala pro la moderna tekniko de amasamuzado per radio kaj televido, kaj, grave, la tre alta preskosto de gazetoj, kies mendo estis sur vastaj areoj de la tero neniel farebla. Tiu dolora stato ankoraŭ senteble daŭras. . .

Seriŝev devus nomi la imponan revuon Norda Prismo inter la nun vivantaj "veraj gazetoj".

Australia Kroniko

PERTH: Membroj kunvenis el la klubĉambro (9/6 kaj 23/6) por ekzerci en konversacio kaj tradukado.

Kondolencon al F-ino Alice Longson, kies fratino Hilda mortis antaŭ nelonge. S-ino G. Pollard raportas el Skotlando ke gripo atakis ŝin en Capetown, survoje al Anglujo, kaj ŝi ankoraŭ ne tute resaniĝis.

MELBOURNE: Tre informan skizon pri la konsisto de plastoĵon historio pri la evoluado de tiu rapide kreskanta industrio donis S-ro A. Heathfield (2/6). Jam forte konkurante kun pluraj naturaj materialoj, la plastoĵon estas nun multspecaj, ĉiu kun propra nomo kaj utilo. S-ro H. Beechey, homo kiu interesiĝas pri ĉio, parolis pri la hipnotismo (9/6), kies origino, li klarigis, estas perdita en la mezepoko. Nova parolanto, S-ro Arnold Baldwin (23/6), parolante pri la temo "Krampetoj pli ol paperligiloj", montris multajn krampilojn kaj klarigis ĉies funkcion kaj utilon en oficejoj kaj industrio ("Krampeto"—Staple; "Krampiloj"—Stapling Machines).

S-ino M. Frogley pruvis, 30/6, ke vojaĝo ĉirkaŭ Aŭstralio povas malkovri multajn vidindaĵojn kiujn ŝi montris per diapozitivaj kune kun informplena komentario. Prezentante ankoraŭ unu el siaj utilaj mikspotoj, S-ro F. R. Banham, 7/7, parolis pri "vort-stumpigo", t.e. forlaso de silabo: de unua silabo ("Aferozo") ekz. (tele) fono, de meza silabo ("Sinkopo") ekz. "kondol(enc)i", de ĉio krom la unua parto ("Apokopo") ekz. "aŭto (mobilo)". Tiun principon D-ro Zamenhof multe aplikis, kompilante sian vortaron. "Ekscentraj Libro kolektantoj" kaj la "Por kaj kontraŭ pri neesperantistoj ĉe E-kongresoj", estis

aliaj temoj.

Bonvena gasto ĉe la junia REN-DEVUO estis "Tiny" Goldsmith. Li parolis pri lastatempa agado de A.E.A. kaj progreso en la diversaj aŭstraliaj ŝtatoj. Poste S-ro Herbert Koppel daŭrigis sian priskribon pri vizito al Novzelando, parolante ĉifoje pri la Norda Insulo, kies vidindaĵojn li montris per diapozitivoj.

Boronia (Vic.): Ĵus atingis nin novaĵo ke en tiu antaŭurbo, 20 mejlojn for de Melbourne, fondiĝis nova Esperanto-Grupo, kiu kunvenas dimanĉvespere en la hejmo de Ges-roj I. Heldzingen. Ĝi nun nombras 9 anojn.

MANLY: Nia prezidanto, S-ino M. Duncan, kiu fidiĝe skribis nian kronikon dum la tuta vivo de la klubo, enŝipiĝis la 15an de Marto kaj vojaĝis al sia hejmlando Anglujo. Ni ricevis kelkajn interesajn leterojn pri ŝia libertempo kaj agado.

Dum la aŭtuna trimestro de la vespera kolegio, tri kursoj daŭre progresis, kaj denove estas starigitaj en la nuna trimestro. Ĉiujaŭde S-ro C. C. Goldsmith instruas la komencantojn, S-ro R. G. Robertson instruas la progresantojn, kaj F-ino F. Cardale deĵoras kiel gvidistino de la altgrada kurso.

Ses kursanoj ĉiulunde ĉeestas la kunvenojn de la drama grupo, kaj ludas diversajn rolojn. Je la fino de la unua trimestro ili prezentis tri teatraĵojn; "Observu dieton!", "La onklo estas bonhumora", kaj "Por protesti", de Raymond Schwartz. S-ino M. Liston gvidas la kurson kaj estas lerta registoro.

Post la lecionoj ĉiusemajne okazas kunveno. S-ro Wre Chandler (20/2) parolis al ni pri la indiĝenaj floroj de nia regiono, kaj montris multajn belajn bildojn. La sekvantaŭ jaudon, S-ro Robby Robertson prezentis per nova metodo kelkajn interesajn leterojn de siaj multaj eksterlandaj korespondantoj, montrante la originalajn skribaĵojn sur granda ekrano per epidiaskopoj.

En la unua semajno de Marto, S-ino M. Duncan montris lumbildojn kaj parolis pri sia vojaĝo al Anglujo, Tel Aviv, kaj Hindujo; dum la dua semajno S-ro P. E. Schwerin projekciis diapozitivojn de Eŭropaj landoj, kun interesa komentario.

En Aprilo, S-ino M. Parker prelegis pri siaj veturadoj ĉirkaŭ la kontinento Aŭstralio, kaj per la projekciilo montris multajn vidindaĵojn preskaŭ nekonatajn al ni urbegojn. S-ino A. Brown rakontis la historion de "La plej neforgesebla homo de mia tuta vivo". Si parolis pri sia kuraĝa kaj karega patrino. F-ino A. Dennis aranĝis programon de poemoj, kantoj, kaj salutoj, prezentitaj buŝe kaj per sonbendo. La plej preferata poemo estis sendube la Zamenhofa "Ho mia kor'."

Dum la Majaj kunvenoj sonbendigitaj estis tre utilaj. Unue ni aŭskultis prelegon de S-ro R. Markarian, kaj raporton de S-ro R. Harry, per ĝentileco de S-ro G. Thatcher, kiu ricevis la sonbendojn antaŭ kelkaj semajnoj. Alian fojon, S-ro K. Smith klarigis al ni modernan instrumentodon, per antaŭe sonbendigitaj lecionoj kaj multobligitaj kursnotoj. Post kelkaj semajnoj li denove vizitis la klubon kaj montris al ni la diversecon inter kelkaj tradukaĵoj de la Sankta Biblio, klarigante per klera komentario la kialojn.

Nia samideano el Japanujo, S-ro S. Issobe, prelegis (12/6) pri japanaj kaj ĉinaj ideografoj, desegnante sur la nigra tabulo multajn frazojn per la ĉina alfabeto, la pli nova japana alfabeto, kaj Esperanto. Li ankaŭ klarigis al ni la malfacilaĵojn de la angla elparolmaniero kaj literumado. Por eksterlandanoj Esperanto estas kompreneble pli facila.

Ni esprimas nian sinceran kondolencon al S-ino B. Cleminson, nia ekssekretario, kies edzo mortis kelkaj semajnoj post ilia reveno al Aŭstralio.

—R. G. Robertson.

SYDNEY: Speciala kunveno okazis 5/6 por renkonti S-ron Otto Haszpra, kiu dum unu jaro studis en Usono sian specialan fakon, hidraŭlikon. Li vizitis nin, revojaĝante al Hungario, kaj montris bildojn pri Budapeŝto kaj parolis iom pri la historio de Hungario kaj Budapeŝto. Li konfesis ke li preskaŭ neniam vizitas la klubon en Budapeŝto, tamen li tre bone kaj flue parolis Esperanton. S-ro F. Mueller-Soraŭ (23/6) legis poemojn kaj prozon de Marjorie Boulton.

F-ino R. van Rijswijk laborigis nin, 7/7, per transitivaj kaj ne-transitivaj verboj. Krome la vespero havis

grandan surprizon por ni, ĉar S-ino Katarina Smith revenis el Jugoslavio kun sia edzo por resti en Aŭstralio. Montriĝis ke ŝia edzo ne povis lerni la jugoslavlan lingvon.—VOLO.

BRISBANE: S-ro Simon Bracegirdle montris, 19/5, diapozitivajn faritajn dum sia mondvojaĝo. Li klarigis al ni morojn de fremdaj popoloj. 26/5 ni kantis E-kantojn kaj 2/6 S-ino W. Greenhalgh gvidis interesajn ludojn. Poste, S-ino Gibbs de la "International Club of Brisbane" parolis pri la nacia "Paradprezentado", kiu okazos ĉe la urbdomo en Oktobro, okaze de la Warana Festo. Nia klubo intencos partopreni en la paradprezentado.

Je 9/6 post la lecionoj kaj vespermanĝeto, nia prezidanto S-ro Karl Guenster estris komunan kantadon de E-kantoj. S-ro Simon Bracegirdle, 23/6, montris lumbildojn pri pitoreskaj urboj en Aŭstrio, Germanujo, Ĉeĥoslovakujo, Pollando kaj Rusujo. S-ino W. Greenhalgh informis nin ke la Direktoro de la Instituto por Modernaj Lingvoj de nia Universitato interesiĝis pri Esperanto, kaj ke ŝi donacis al li la libron "Zamenhof, Creator of Esperanto" de Marjorie Boulton.

La prezidanto (S-ro Karl Guenster) informis nin pri letero de A.E.A. koncerne eblan kongreson en 1972 en Brisbano. Ni diskutis la aferon kaj ni donos nian decidon en Perth. El la libro "La Profeto", S-ro Guenster, 14/7, prelegis. S-ino V. Yowe kaj S-ro T. Donnelly, 15/7, ĉestis kunvenon ĉe la polica ĉefsido por ricevi sugestojn pri la aranĝado de la proponita "float" en la baldaŭa Warana procesio.—Tom Donnelly.

ROCKHAMPTON: Nia nova sekretario: F-ino Desley Davies, Bouldercombe, via Rockhampton, 4702. Telefono Bouldercombe 17.

Nia societo nun vendas bumerangojn. Faritaj de kriptuloj en "Sirmata Laborejo" en Rockhampton, ili estas tre bonaspektaj, cetere GARANTIA-TAJ REVENI. Malpezaj (kvankam faritaj el ligno) ili estas facile poŝteblaj kaj tre taŭgas kiel donacoj kaj enlande kaj eksterlande. Unu klubano, kiu jam aĉetis 14, povas atesti ke ili vere revenas. Li havas difektitan fingron por pruvi tion! Sed, serioze, oni ja povas, post iom da ekzerco, kapti la revenintan bumerangon (foje!)

per la propra mano. Vere, sorĉa ludilo.

Nia nove elektita Stata Parlamentano, S-ro Wright, sendis al ni cirkuleron (kiu kompreneble ankaŭ iris al ĉiu alia klubo en la distrikto). Li petis detalojn pri nia klubo kaj ĝia celo. Kompreneble, ni jam respondis laŭ nia plej bona ebleco.

Ni ricevis 20 ekzemplerojn de la nova lernolibro por Skoltoj, nome "Jamborea Lingvo" kiun, la Skolta Esperantista Ligo petas, ĉiu Esperanto-grupo en la mondo donu al la loka Skolta grupo je la 1-a de Septembro 1969. Ĝi aspektas bone, laŭ la kovrilo kaj ankaŭ la enhavo. Kun multaj bonaj desegnaĵoj, ĝi estas facile legebla eĉ por ne-esperantistoj. Ĝi bezonas tamen iom da helpejo pri prononco. Ni intencas donaci ekzemplerojn de tiu libro al la loka Skolta grupo kaj ankaŭ al tiu en Mackay, je la ĝusta tago. ESTU PRETA! Prezo proksimume 70c Aust.

—John Moore.

UNIVERSITIES

In the philological faculty of Hungarian universities one may acquire a professorial diploma of Esperanto. ("Kajeroj", no. 16, Jugoslavia.)

VIENNA — 1970!

The Universal Esperanto Congress will be in the Austrian capital in 1970, under the patronage of the President of the Republic, Herr Franz Jonas, who speaks Esperanto fluently.

BIBLIOGRAPHY OF INT. LANGUAGE

The firm Georg Olms, D-32 Hildesheim, Am Dammtor, Germany, in collaboration with U.E.A., will reprint photopress "Bibliografio de Internacia Lingvo" (P. Stojan: 1929) if enough orders are obtained. To 31 December, 1970, the price of this 560-page inventory of planned languages is 56 German marks, after which date it will be 68 G.m.

This work, covering a vast field, is basic for all students of international language in its widest connotation. Each work listed is described in detail, resumes and comment are given for the more important of them, and an article introduces each chapter.

"PAŝOJ AL PLENA POSEDO"

En tiu legolibro (p. 148) Wm. Auld metas la jenajn demandojn: "Elektu la ĝustan vorton el tiuj inter krampoj: Ĉiu el vi ricevos (LIAN, VIAN, SIAN) monon.

Neniu el ni evitos (NIAN, SIAN, LIAN) sorton.

Sur. p. 272 vi trovos helpon al ilia solvo.

Jen taŭga donaco por viaj eksterlandaj amikoj, cetere sorĉa ludilo por via tuta familio kaj ornamo por via muro! **AŬSTRALIAJ BUMERANG-OJ: GARANTIATAJ REVENI** kaj tre ornamecaj. Faras ilin kripluloj ĉiurasaj, ĉiukredaj en "ŝirmata laborejo". Lignaj sed malpezaj, afranko eksterlanden proks. 20 cendoj al la plimulto da landoj.

PREZO poŝtita al vi, \$2 por unu, du por \$3.50, kun instrukcio pri korekta jetado.

Mendu ĉe **Rockhampton Esperanto Society**, 34 Hadgraft Street, Rockhampton - North, Qld., Aŭst., 4701.

Recenzoj

"**Biblia Revuo**", Jan. - Feb. 64 p. Jarabono 6 dol. U.S. Ce D. Broadribb, Dept. of Eastern Studies, Univ. of Melbourne, 3052.

Jen denove materialo por legantoj kun faka mensekipo. Scienca revuo, ĝi celas, per teknikaj artikoloj, esplorantojn en teologio, arkeologio, tekstkritiko, orientalismo kaj rilataj aferoj. Ĝi staras ekster la "kutima fermita rondo literatura", sin dediĉinte al la scienca priserĉo. Al la elito por kiu ĝi estas eldonata, ĝi certe estas rekomendinda.

Trin ĉefartikoloj: Donald Broadribb detaliĉe ekzamenas: La Biblio Moderne Tradukita. Por funde ĝin elstudi nepras scio de la Itala, lingvo el kiu li iom multe pricitas.

Muslima kolego en Melburno kontribuas: Oferritoj en Islamo, kaj Jerusalemano prezentas arkeologian esploron apud Kapernaum. La ceteron de la revuo okupas citoj kaj informoj el la pribiblia gazetaro kaj libraro tutmonda.

"**Norda Naturo**": Hilda Dresen. Eld. Stafeto, La Laguna, Tenerife. 144 paĝoj; 1.50 U.S. dol.

Estonino, ŝi naskiĝis 1896 kaj E-igis 1913. Per E-tradukoj ŝi diskonigis verkojn de ĉ. 50 samlandaj aŭtoroj kaj per Esperanto "pontlingve" helpis alilandanojn E-ajn en ilia traduklaboro. Bonaj E-gazetoj aperigis ŝiajn poemojn, originalajn kaj tradukitajn, jam de 1922. Laŭdante perceptis ŝian talenton elstaraj poetoj, inter ili Kalocsay kaj Auld.

En ĉi libro elstaras sincere simpla poemo pri Zamenhof kaj humure moka memkritiko, Verdaj Plendoj, trakte al niaj E-aj malfortoj. Tribut-oj al Baghy: "Pri la vera Homo Homa sangas lia kant'," kaj al Kalocsay:

"Enpenetris ĉiun sferon
via Muzo temerare;
bombardANTE eĉ Inferon,
venkis vi miraklofare".

Si vidas belon en ĉiu sezono: printempigo ĝis venta vintro. Ankaŭ la floroj inspiras ŝian poezion. Si meditas la mutajn mesaĝojn de la diversaj specoj—jam de la blua hepato ĝis la modesta eriko.

Poste pelas ŝian plumon la humoroj de l'animo, la problemoj de la homa destino, alceleco viva. "Preĝo" sintezas la puran aspiradon de ŝia nobla spirito.

Mankas avangardisma eksperimento pri versformo; regas ŝian verkstilon esprimado klara, strukturado simpla.

Mil amantoj de ĉi bravulino, voĉo de lingve izolita popolo, elĉerpigis la ekzemplerojn presitajn de la simile brava eldonisto, se ili mendus ŝian literaturan testamenton.

PRI LIBROJ

"Mondo de Esperanto", 220-paĝa Japanlingva verko pri Eŭropa vojaĝo de la aŭtorino, Namiko Isiguro, eldonita en Marto, elĉerpigis kaj dua eldono aperos.

"La Lasta Altaĵo" estas la kvara verko el la Vjetnama tradukita en la Japanan—pere de Esperanto, tre taŭga pontlingvo.

"La Suferoj de Werther" aperos en traduko de R. Hauptenthal. Verko de Goethe.

"The History of Morwell High School, 1968 and 1958," is available

from its Principal and Editor, Mr. I. Maddern. 51 pages on art paper, large format. Richly illustrated and with an article on Esperanto. One dollar. A further dollar buys the three earlier volumes, which complete the set.

"Multe el vi portas en **sia** koro la samajn idealojn" (Originala Verkaro 410).

"Tiam vi reiros ĉiu al **sia** posedaĵo" (Readmono (3/20)).

"Ĉiu el ni agos laŭ la obstineco de **sia** malbona koro" (Jeremia 18/12).

"Multaj el ni audis tiun fabelon en **sia** infaneco" (Fab. de A., 111/99).

"Ĉiu el ni", "multaj (multe) el vi" kaj similaj frazeroj estas rigardataj kiel de la tria personeco.

Sed notu la jenan ekzemplon: "La mono de ĉiu el ni estas en la aperturo de lia sako." (Genezo 43/21).

KIO ESTAS OKSIMORONO?

Butler ("Klasifo") difinas ĝin per "saĝmalsaĝo: saĝa diro aspekte mal-saĝa; kunigo de ŝajnaj maloj."

Jen ekzemploj: "Se la lumo . . . estas malluma" (Mateo 6/23); "sed kiu ajn ne havas, for de tiu estos prenita eĉ tio, kion li havas" (Mateo 13/12); "kiam mi estas malforta, tiam mi estas forta" (2 Kor. 12/10); "mi, kiu estas malpli ol la malpeje granda" (Efes. 3/8); "scii la amon, kiu superas scion" (Efes. 3/19); "ankoraŭ vivante, malvivas" (1 Tim. 5/6).

La oksimoronon ĉe Ijob 22/6 Zamenhof forigis per sia: "De preskandululoj vi deprenis la vestojn". Vidu en Anglan Bibliion. J. B. Priestley: "senkulpa pekeco" (innocent wickedness; T. Hardy: "aŭdaca modesteco" (daring bashfulness).

"Rigardadi per senvidantaj okuloj", t.e. ne efektive vidante (gaze with sightless eyes). "Harmonia malakordo"; "gaja pesimisto".

SIMPATIAŬTOJ ESPERANTAJ

Tra la mondo multaj homoj jam lernas Esperanton. Multe pli da homoj forte sentas la bezonon de internacia lingvo kaj plene konvinkigis, ke Esp-o ĉiukampe plenumas tiun funkcion. Tamen, pro bonaj kaŭzoj — premodo de akademia, komerca, kariera, oficiala aferado kaj aliaj devoj — ili ne disponas pri la tempo necesa al adeptiĝo, aktiva uzado de la lingvo.

Jen estas vasta kampo de simpatiantoj, kiuj estas varme pretaj helpi la movadon per registriĝo en organizon.

"Germana E-Revuo", 5/69, artikolas pri tia, jam fondita — Fordererkreis im Deutschen Esperanto-Bund — kun minimuma kotizo 5 g.m. kaj esperas pri frukta helpo el tiu riĉa tereno. Adreso, Jarlibro UEA, p. 109.

HOMAMEMO

La Ligo por Progresigi Aborigenojn en Melburno sendis leterojn al 800 firmoj, petante monhelpon por sia filantropa laboro. Unu el la firmoj havis jaran profiton de dek milionoj da dolaroj. La Ligo ricevis tri donacojn — 5, 3 kaj 2 dol., kiu kvaronkovris la koston de la afranko.

— "Age", Melb., 24/7/69.

SENSENCAJO

"The war in Vietnam is inevitably moving towards an unpredictable end at an indefinite date." — Ministro por Nacia Defendo, S-ro Fairhall, "Age", 8 Julio.

Traduko: La Vjetnama milito estas nehaltigeble moviĝanta al neprognozebla fino je nedifinebla dato.

Jan ekzemplo de la ventvorta, sen-signifa galimatio, kiu fluas el la buŝo de alte pagataj politikistoj.

SVISA RADIO

Ĝi ricevis en 1968 dudek mil leterojn pri siaj internaciaj brodkastoj. El ili: 12 mil Angle; unu mil Hispanie; 300 Esperante. Ĉu mizera tiu lasta cifero? Nu, laŭ la kvanto da tempo difinita por la brodkastoj jen la pri-kalkulo: Angla: Po malpli ol 3 leteroj por ĉiu program-minuto en semajno; Hispana: 3 leteroj; Esperanto — 7 leteroj! (The British E-ist, 6/69.)

PROFETAJO: EL 1872

"... ĉar la Tero estas malgranda, la homoj formigros en spacon kaj transiros la senaerajn Saharojn, kiuj apartigas planedon de planedo, sunon de suno. La Tero fariĝos Sankta Lando, vizitataj de pilgrimoj el la tuta universo. La homoj venkos la Naturon. . . . tamen, pri la Unua Kaŭzo, la Nekonebla Mistero — DIO, eĉ tiam ili ne pli funde scios ol ili nun scias". — Winwood Reade, "La Martirado de la Homaro": 1872.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084.
Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road,
Willoughby, N.S.W., 2068.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 88 Verney Rd. West, Graceville, Qld., 4075.
Address of A.E.A.: Box 415, P.O., Manly, N.S.W. 2095.

N-ro 157.

MELBURNO.

Septembro, 1969.

NEED MAN STAND MUTE THROUGH LANGUAGE DIVERSITY?

No! Esperanto DOES Breach the Barrier of Babel.

Is an international language really required? The question will, by its simplemindedness, evoke a laugh from later generations, in the same way as our contemporaries would laugh for example at the question: "Is a postal service required?" The greater part of the intellectual world, even now, will rather consider the query: "Is it possible?" It is obviously and absolutely a clamant need in the field of the sciences, and for the literary folk it would be a boon in correspondence with foreign colleagues on matters of textual interpretation, the structures and peculiarities of language, &c. For the man in the street it would enable free intercourse and open his mind and heart to the similarities of their common aspirations and their common humanity.

Yet there are those who say: "An international language would destroy the national tongues." One may dispute whether it would be a misfortune for the world if it should one day appear that nations and national language no longer existed, and that in their place was one common idiom. But the notion surely is purely academic. Let it be clear that Esperanto desires only to afford to persons of different nations, who now stand like mutes in each other's presence, the power of understanding what each wishes to impart. The possession of language distinguishes man from the beast. It renders possible the interchange of thought. But if the very incomplete ability we possess has had such enormous significance for the race, what incomparable advantage would accrue if all men could readily converse in terms of mutual understanding!

Take translation. Just fancy one edition for the whole world. Take international congresses. They are at the mercy of him who can chatter in several tongues—often the man with something pregnant to say must keep quiet. Passive reception by means of earphoned translations is no substitute for the free give and take of response or debate. One receives, but cannot give out. Here we have a striking example of language discrimination, contrary to the Charter of Human Rights. Just think of the handicap to those of little known minority languages.

Now take the precious years of youth given to the unproductive work of acquiring languages, often with such bleak result. How much better to devote that time to the study of positive arts and sciences. Think of the scientists who must learn other tongues to pursue their own work and keep abreast of progress in other countries. And the duplication of labor in the field of literature and art. Professor Todhunter of Cambridge was driven to learning Russian for mathematical purposes. He managed to learn enough to enable him to read such treatises, but surely his time could have been better spent. A writer was

dealing with the influence of Byron on the Continent. He found that the biggest and most important work on the subject was in Polish. It remained inaccessible to him.

Mr. Ralph Harry, when Australian ambassador to Belgium, spoke freely with the Russian ambassador in Rio de Janeiro. The North Vietnamese ambassador also speaks Esperanto, as do a dozen diplomats in different countries. Now ambassador in Saigon, he lectured on Esperanto to some 100 persons and 60 of them are following a course in the language.

In translation an experiment was held by a French newspaper, "Excelsior". A text in French was translated into German, English, Spanish, Italian, Russian and Esperanto. It was then re-translated back into French by a second group. Of the three judges, two crowned the version translated from Esperanto; a third very narrowly favored the Italian. Both versions almost exactly reproduced the French.

ESPERANTO IN EDUCATION

At least 16 Universities ran official courses in Esperanto in 1965-6 or had chairs or lectureships in the language. Austria, Poland, Bulgaria, Jugoslavia and Holland have State examinations in Esperanto parallel with those in other languages. In Amsterdam, as at Liverpool university, Esperanto may be taken as part of a degree course; not yet as a full course on its own. In Amsterdam a Hindu student gained a doctorate with a thesis originally written in Esperanto. He held that this speech medium favored his clear thinking, although he speaks Hindi, Dutch and English. The English text was, however, provided to conform with university regulations. At Utrecht Dr. Manders gained his degree with a detailed work on planned languages; Vijf Kunststalen. He is a fluent Esperantist.

The Royal Society of Arts in Britain offers examinations at three levels and has done so for many years. Esperanto this year with 84 candidates ranks fifth after French, Spanish, German and Italian.

The number of Philologists who approve or practice Esperanto is increasing. Max Muller, professor of philology at Oxford, became a believer in Esperanto 40 years before the word "Esperanto" appeared in the Oxford English Dictionary. In a lecture to the Royal Institution of Great Britain he said: "To people acquainted with a real language, the invention of an artificial language is by no means an impossibility. Nay, such a language might be more perfect, more regular, more easy to learn than any of the spoken tongues of men". Esperanto has borne out this statement.

Professor Meillet (College de France): "The possibility of creating an artificial language, easy to learn, and the fact that such a language is usable, have been demonstrated in practice. **All theorising is vain. Esperanto has functioned**".

Drs. Bovet, Collinson, Bjorn Collinder, eminent philologists, have written books in Esperanto. Charles Baudouin, a French professor, attested that: "Having finished my translation of the work of Goethe, I am not ashamed to confess that the translation in Esperanto of the Iphigenia was one of my most useful aid in my work."

These men and many such would affirm that Esperanto is indeed "made with art, artistic", rather than in the sense of the loaded word, "artificial". And so today, after 80 years of intense proving in all fields, Esperanto, which has no rival in the area of planned languages, slowly but surely makes impress on the world. Slowly, because despite the modern miracle of Pentecost, repeated wherever Esperantists communicate with one another, men fail to grasp this blessing. It was said of old: "E'en were one to rise from the dead, they would not believe". The patient, mild-natured Zamenhof suffered much in body, mind and spirit; he died before the final victory:

Saints and saviours to the scaffold—
Rack and gallows for the good;
Steep the path of human progress—
Freedom's ever bought with blood.

Thus it has ever been. But ere long may it be that the curse of Babel shall be lifted, and man, his tongue set free, go forth to ever greater conquests.

Australia Kroniko

PERTH: Multaj membroj suferis la gripon, inkluzive de nia Prezidanto Chris Dean. Du klubkunvenoj okazis (14 kaj 28/7), kaj la programo estis ekzercado traduka kaj kantado.

MELBOURNE: Nia pola amiko T. Pics (21/7) prelegis pri la rusa esploristo kaj sciencisto Mikluĥo Maklay, kiu faris kelkajn esplorvojaĝojn ĉirkaŭ Nov-Gvineo, tamen estas nuntempe preskaŭ forgesita. Samvespere ni havis la plezuron saluti S-inon Betty Cleminson (revene de Malajzio). Semajnon poste, S-ro Terry Davidson parolis pri sia laboro kiel instruisto ĉe lernejo por blinduloj kaj montris diversajn instru-hepilojn.

S-ro Arthur Heathfield, 4/8, donis ampleksan historian skizon pri la kreskanta diverseco kaj multiĝo de la religioj dum jarcentoj ĝis la nuna movado al Ekumenismo. Homo kun multaj interesoj, S-ro H. Beechey, malkovris al ni (11/8) ankoraŭ unu flankokupon, kiam, helpate de S-ro T. Davidson, li prelegis kaj demonstris iom pri la judoarto, kiu evoluis el Jiu-Jitsu kaj baziĝas sur la ideo sindefendo sen atako. S-ro Herbert Koppel (18/8) parolis pri "Kio nova en la E-mondo". Li legis el plej novaj E-gazetoj interesajn novaĵojn kaj humorajn poemetojn.

Nia societo ĵus aĉetis malnovan pianon per mono speciale kolektita por tiu celo. Okaze de la Societa Vespere (25/8) ni kolektiĝis ĉirkaŭ la piano por kantado kaj adiaŭi al Ges-roj T. Davidson. S-ro Davidson ricevis stipendion por plua studado ĉe la Universitato de Virginia (Charlottesville) rilate instruadon de blinduloj.

Ce la julia RENDEVUO S-ro E. Hearne prezentis belajn kolorbildojn kaj parolis pri vagado en Kimrujo dum parto de sia restado en Britujo.

MORWELL (Vic.): Ni daŭrigas instruadon de Esperanto per intensaj kursoj. La 3-a kurso finiĝis en Aŭgusto kaj ni esperas komenci 4-an kurson en Septembro kaj 5-an en Novembro. Sekve de ĉi tiuj kursoj kaj la kreskanta nombro da E-istoj en nia urbo, stariĝis antaŭ 2 monatoj nova E-klubo, la Esperanto-Societo de Morwell, kies sekretario estas S-ro W. Wybenga, 30 Butters St., Morwell, 3840.—I. T. Maddern.

SYDNEY: Ĵus antaŭ la surlunigo de la astronautoj, 14/7, nia sekretario S-ro Tom Elliott faris paroladon pri la luno kun lumbildoj faritaj sur la luno per aŭtomataj aparatoj senditaj al la luno. Samvespere, S-ro V. Gueltling montris filmojn pri la luno, faritan dum la ĉirkaŭflugo de la luno pasintan Kristnaskon. S-ino V. Schlesinger legis la fabelon "La Feliĉo", de Johan H. Rosbach. Je konvena momento ŝi interrompis la legadon kaj demandis nin kiel finiĝos la rakonto. Poste ŝi finlegis ĝin por montri al ni kiel la aŭtoro finis ĝin.

Dimanĉon, 3/8, kelkaj membroj de S.E.S. ĉeestis la jaran koncerton de la Brandman Muziklernejo, kiu havis la titolon "Kosma Koncerto". La biletoj estis senpagaj por Esperantistoj. S-ro V. Bourlin, 28/7, prezentis lumbildparoladon "la grimacoj de la mondo". La komentario li antaŭe surbendigis kun muziko kaj aliaj efikaj sonoj kaj aŭdigis ĝin kune kun la lumbildoj. S-ro T. Elliott, 4/8, rakontis al ni legendon pri la Koalo kaj, 11/8, S-ino E. Matasin amuzis nin per ludoj; etaj premioj estis disdonitaj al la gajnintoj de la diversaj ludoj. S-ino M. Chaldecott lumbildparoladis pri "Kion viaj songoj signifas".

—VOLO.

BRISBANE: Konversacia ekzercado post la kutimaj lecionoj okazis 21/7. Semajnon poste ni legis el la interesa kaj edukplena filozofia libro "La Profeto". Ni diskutis 4/8 klubaferojn kaj S-ino V. Yowe raportis pri la stato de la kaso. La membroj konsentis ke la povespera kotizo estu altigota al 30 cendoj. Konversacia vespero okazis ankaŭ je 11/8.

—Tom Donnelly.

REDCLIFFE: La TV-Stacio "Channel 7" bonkore pruntis al ni sonfilmon kiun Fratino Eugenie, la lernejestrino de St. Bernardam, prezentis en sia lernejo. Kvankam nur klubanoj kaj iliaj familianoj kaj Ges-roj Gunster el Brisbano estis invitataj, ĉeestis ĉirkaŭ 120 personoj.

La Redcliffe Terkultura kaj Hortikultura Ekspozicio okazis 18 kaj 19/7, kaj nia klubo havis elmontradon en la ĉefsalono. Ni ekspoziciis librojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn, ludojn kaj pupojn. Multaj personoj demandis pri nia movado, kaj denove ni havas nomojn sur nia atendliste. En la lerneja sekcio Jill Forsdike kaj Karen

Hurford (ambaŭ 11-jaraj, ekspoziciis pri Esperanto. Ni gratulas ilin!

Spite de la vintraj malsanoj niaj kunvenoj estis bone vizititaj. Ni pli kaj pli parolas nur Esperanton ĉe niaj kunvenoj. Plaĉis al ni ricevi sonbendojn de S-ro Maddern. Ni ĝuis ilin tre multe. Multe da intereso estis montrata pri la AEA-Libroservo. Nia grupo elspezis en ĉi tiu jaro jam \$100.—Jessie Clarke.

A.E.A. BOOK SERVICE

"**Kanako el Kananam**" (by K. G. Linton).

Interesting account of the author's experiences in New Guinea during the war years. \$2.00.

(Postage 21c.)

"**La Mirinda Eliksiro**" (by J. H. Rosbach).

14 noveloj. "Neniu estas feliĉa. kiu ne konsideras sin mem feliĉa." \$1.35.

(Postage 17c.)

"**Pli ol Fantazio**" (by Agnes Bogh-Hogsted).

5 Short Stories. The author possesses a profound understanding of human nature. \$1.00

(Postage 17c.)

Order from:

A.E.A. BOOK SERVICE
10 Sumersett Avenue
Oakleigh South, Vic., 3167.

BONVOLU PARDONI ERAROJN

Do you sometimes have to write that when corresponding in Esperanto? Don't you wish you did not need to do so? In that case you are one of those for whom the Progressive Intermediate Correspondence Course was prepared. We now have a staff of good tutors, who are waiting to help you become a competent Esperantist.

Send today for details of the Course to THE AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION
P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095.

Recenzoj

"**Sennacieca Revuo**", N-ro 97; 57 paĝoj. 1 dol. U.S. Peranto: V. Gueltling, 5/21 A'Beckett Av., Ashfield, 2131.

Rasismo, Koscia kaj Nekoscia; enketoj pri Nia Mono, ekonomia studo digestebla nur por fakuloj; Usona Mozaiko, bildo politika kun flankaj observoj pri UNO, lingvoj ktp. Jugoslavio Hodiaŭ, iom turismeca; Situacio en Azio estas pli politike informa. Verkis ĝin Japano. Johano-Maria Guyau (1854-87), elrigardo de Franca filozofo, kies nomon verŝajne ne konas la filozofoj e' Aŭstralio.

Elstaras 11-paĝa detala kaj iom drasta kritiko pri Julio Baghy. V. Benczik ne nomas lin mondliteratura giganto; li kredas, ke en nia literaturo troviĝas ne malmultaj, kies talento superas tiun de la amata "Paĉjo". Baghy aperis en decida historia momento, fandiĝis kun la spirito de la epoko; sekve fariĝis la dua fondinto (post Zamenhof) de nia literaturo. La vendusukceso de liaj libroj atribuiĝis al lia kapablo esprimi la esencan Esperantismon. Miloj da E-istoj komencis legadi en E-o per liaj (plejparte jam elĉerpitaj) verkoj.

Diskutinda estas diro, ke, principe verkante por simpluloj, Baghy maltrafis kreon de vere valoraj verkoj, pro sia lingva konservatismo, kiu cetere estis utila, ĉar ĝi iel kompensis la troan neologismemon de Kalocsay kaj ties skolo. Sen helpo de postparta "glosaro" Baghy vortuze virtuozis per "Songe Sub Pomarbo", "Mirinda fortostreĉo 221-paĝa (1). Tiun verkon Benczik nomas entute ne multvalora, malnovmoda kaj -forma, ankaŭ arkaika.

Eldonistoj reeldonu la verkojn de Baghy, kaj kiel inda monumento aperu kritika serio de lia Plena Verkaro. Jen la justa pledo de tiu ĉi senflata kritikisto.

S. Szathmari frontas la problemon de la teknikaj vortaroj. Li asertas avantaĝojn de E-o sur tiu kampo, sed avertas pri la plursenceco de afiksoj kaj prepozicioj, kion tamen la vivo iom post iom forigas. Pensiga, eĉ helpa kontribuo.

Schwartz denove punktas sian tekston per ridoj, lerte vortludante.

Cielo, kiel tiu Franco amas dancigi la alfabeterojn en komikajn mislokojn!

Poemo pri Rembrant evidente ne sukcesas atingi klaran sencesperimon. Kio signifas: "multiujn postmalsatajn nutras vi; firman filon"? Penu traduki ĝin en vian nacian lingvon, ne vidinte la Nederlandan originalon.

(1) Vidu: La Rondo, 12/58.

"OOMOTO"

En tiu dumonata gazeto (Maj-Junio) aperas leginda artikolo de David Mac-Gill pri Esperanto en Nov-Zelandaj Lernejoj. Abono estas nur 1.60. Peranto: F. R. Banham.

"Biblia Revuo", n-ro 2, Mar-Apr. 60 p. Dumonata. 6 U.S. dol. Ĉe Prof-o D. Broadribb, Univ. de Melbourne, Victoria, 3052.

Ankoraŭ regule ĉi-elita fakrevuo prezentas materialon por homoj, kies mensoj maturiĝis en specifa medio. La redaktoro, D.B., detale katalogas la antikvan mitologion pre-Romanian, do la Mez-Orientan.

H. Tonkin pritraktas: La Biblio kaj la Okcidenta Historiista Tradicio —erudicia studkampo. Sekvas arkeologia priskribo pri Cezarea kaj komentoj pri stranga teorio, kiu celas supozigi similecon inter Kristo kaj Heraklo.

La finaj dekse paĝoj registras kurantan literaturon pri-Biblian kaj donas informojn rilate al aktualaj aspektoj de la esplorado rilate la Sanktan Libron.

"LA NOBLA KORANO"

preskaŭ elĉerpigis. Oni konsideras duan eldonon.

"LA PLENA ILUSTRITA VORTARO"

sendiĝos al mendintoj antaŭ la fino de 1969.—S.A.T., Parizo.

"PAŬOJ AL PLENA POSEDO"

(Wm. Auld) mendigis je 1200 ekzempleroj 4 monatojn post apero. Laŭ tiu vendoritmo ĝi elĉerpigis en la daŭro de unu jaro. Lia "Esperanto—A New Approach" (1965) elvendigis. Nova eldono en preparo.

LA PLEJ MALJUNA E-ISTO?

Mary Luplau, Strato Luplau, Auckland, N.Z., 104-jara, "aktive informadis" raportiston pri la valoro de Esperanto.—"Esperanto", 6/69.

DISKUTINDA DIRO

"La du plej grandaj stilistoj post la Majstro — Kabe kaj Grabowski" — Prof-o G. Waringhien, "Monda Kulturo", Aŭtuno, 1964.

Tiu aserto estas diskutinda, ĉar dubinda. Ĉu vere W. volas diri, ke de post la unua periodo de E-o ne aperis E-verkisto rivalanta aŭ superanta la du nomitojn? — post pasus de proksimume ok jardekoj? Iuj legamantoj verŝajne nomus kelkajn—Schwartz, Eggleton, H. M. Scott, la fratojn Rossetti, Newell, A. Fiŝer, Sidlovskaja, kaj certe Waringhien mem, se nomi nur kelketon, kies stilo kaj esprimkapablo rivalus eĉ tiujn de Kabe.

Pri Grabowski, lia stilo malsuperas la Kabe-an, kiel oni povas vidi per komparo de la du tradukoj: La Simo de la Mondo. (Pola Antologio: Kabe. Kondukanto, Antologio Internacia: Grabowski) Cetere (La Revuo, Sept. 1908; The A.E., 9/62). Kabe ricevis 194 el 267 voĉoj; Grabowski . . . 3. Tiel la tiamaj aprezantoj rigardis la aferon.

Pri la Majstro legiĝis, ke ekzistas verkistoj stile pli Zamenhofeca ol Z. mem!

Cetere estas strange, kompari du homojn, unu el kiuj estas nur proza tradukinto (KABE), kaj la alia (Grabowski) poeto, kiu precipe tradukis kaj originalis poemojn. Lia proza verkaĵo ne evidente elstaras. Lia ĉefmonumento estas la (tr.) eposo "Sinjoro Tadeo"—tiu de Kabe, la (tr.) romano "La Faraono". Originala prozo de Kabe maloftas, sed neniam dubo ekzistas pri lia klare impresa kapablo kiel oratoro. Tion atestas lia prelego ĉe la Unua Kongreso 1905. Tie li parolis el la koro, varme, fervore pri amata afero. Supozinde mankis al li ideoj kaj entuziasmo necesaj por kreado de pure literatura verkaĵo.

RETROVITA—PER ESPERANTO

"Ĉu vi povus helpi?" skribis esperantistino en Estonio al sia korespondantino en Perth. "La ĉeflegistino en la hospitala fako en kiu mi laboras serĉas sian fratinton kiu lasis Estonion jam dum la milito kaj oni ne plu povis kontakti ŝin. Oni kredas ke ŝi iris al Dusseldorf, Germanujo, tie

edziniĝis al latvo kaj poste foriris al Aŭstralio. Ŝian edzinan nomon ni ja ne scias. Ĉu vi povus informiĝi pri ŝi?

La tasko ne estis malfacila. Letero al la estona gazeto en Sydney petanta informojn pri ŝi enhavis la ĉi-suprajn detalojn, kune kun la aĝo kaj fraŭlina nomo de la serĉato.

Sekvis iom longa silento kaj poste ĝojiga novaĵo. En Tallinn pasintmonate alvenis letero de la serĉato. Ŝi ja loĝas en Aŭstralio kaj mem legis la informpeton en la estona gazeto. La ĝojon de la ĉeflegistino kaj ties 86-jara patrino oni bone povas imagi.

Skribis la estona E-istino: "Dank' al nia karega lingvo internacia Esperanto homoj sin feliĉaj senti povas."

Postnoto al tiu historio: La letero raportanta pri la retrovo de la longe serĉata fratino alvenis en Perth en ĝuste tiu tago en kiu oni povis vidi per la televido homojn paŝi sur la lunon. Kia kontrasto en rapideco de komunikado!—Ruth McGrath.

HELSINGOR, DANUJO

Internaciaj Feriaj Kursoj (20 - 26 Julio). Ili okazis en la belĝardena Internacia Altlernejo apud la urbo. La vizitantoj loĝis en tre moderna konstruaĵo. Jen la programo de plena semajno:

Matene: Lecionoj. P.t.m. Ekskursoj kaj promenoj. Vespere: Div. programeroj. Transdoninte salutojn de Aŭstralio al la aliaj kluboj, mi montris lumbildojn de Aŭstralio.

Naŭdek unu ĉeestis el Danujo, Svedujo, Nederlando, Kanado, Skotlando, Francujo, Usono, Anglujo, Japanujo, Ganao—mi la sola el Aŭstralio.

Aŭskultante al la bruo babilada en la sidejo, mi memorinde impresiĝis: "Kiele mirinda lingvo estas Esperanto!"

Post la kursfino Ges-roj Friis, niaj afablaj gvidantoj, kaj multo el la vizitantoj flugveturis al la Kongreso en Helsinki. (Raporto de Ann Hearn.)

Si faris la Konversacian Kurson tie, sentas ĝin tre sukcesa kaj rekomendinda kaj entuziasmas pro sia plezura sperto renkonti "tiom da gesam-oj alilandaj". Si revenos al Melburno en Okt.

OFICIALA INFORMILO

19an de Aŭgusto 1969

Novaj Individuaj Membroj:

Cooney, F-ino E. M., Yeronga, Qld.	
Clarke, S-ino M. L., Manly, N.S.W.	
McLochlan, S-ro A. L., Syndal, Vic.	
Donacoj al la Publiciga Fonduso:	
Jam anoncita	\$460.37
Hawks, S-ro J., W.A.	2.00
Russell, S-ino O., N.S.W.	3.00
Chaldecott, S-ino M., N.S.W.	2.00
Marshall, S-ro H., Vic.	3.00
	<hr/>
	\$470.37

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Interŝtata Konkurso Poentoj donataj:

Nova Individua Membro	5
Nova Dumviva Membro	50
Aliĝo al la Populara Kurso	2
Aliĝo al la Mezgrada Kurso	5
Aliĝo al la Altgrada Kurso	10
Sukceso ĉe la Elementa Ekzameno	2
Sukceso ĉe la Altgrada Ekzameno	5
Sukceso ĉe la Klereca Ekzameno	10
Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso	1

Stato je la 19a de Aŭgusto, 1969:

	Kvoto	Poentoj	%
Queensland	130	278	214.0
Victoria	300	487	162.3
N.S.W. & A.C.T.	260	415	160.0
W. Australia	80	79	98.7
Tasmania	30	19	63.3
S. Australia	40	4	10.0

Informpetoj ricevitaj en la nuna jaro, 889.

Kiom da verdaj kartoj vi deziras ricevi por distribuo?

—C. C. Goldsmith, Sekretario.

LIBERA FORUMO: p. 268

S-ro Goldsmith atentigas, ke S-ro Seiŝev kalkulas nur E-gazetojn tut-E-ajn, sed eĉ en la fruaj jaroj ne troviĝis pli ol dekdouo da tiaj. La plimulto da niaj gazetoj estas asoci-organoj, kiuj pro publikinforma celo estas parte presataj nacilingve. Li sendis al S-ro S. aktualan liston de 36 tut-E-aj, 19 parte E-aj, kaj menciis proks. 40 ofsete aŭ bele multobligite presatajn.

La ĉefaj bariloj kontraŭ plibonaj presataj E-gazetoj estas (a) la preskosto dekoble pli alta ol en la tempo, kiun S. havas en penso. (b) en pli ol duono de la mondo oni ne povas

aboni gazetojn alilandajn pro rigora ŝtatlĝo. Nome la tuta komunisma landaro, preskaŭ tuta Sudameriko, granda parto de Afriko, Azio. Se tiel ne estus, la membronombro UEA kaj aliaj organizoj, kaj abonantoj al gazetoj, duobliĝus. Per tio ebligis eldonado de pli impresaj revuoj.

Atendante pli feliĉan mondsituacion, ni varbu anojn al AEA kaj sekve ebligu pli belan A.E.

PUBLICITY: URGENT CALL

I need, between now and December, as many reports, news cuttings, &c., as possible so that I may publish a full report for presentation to the Perth Congress. Anything at all relating to publicity is welcome. Thanks to all who have sent material and to those who will, I am sure, respond to this appeal.

—H. V. Petley, P.R.O.

PARALLEL TRANSLATION

(Elementary)

There was once a decrepit old man whose eyes blinked and whose hands trembled through age. He dribbled his food on the table cloth. He lived with his married son, and his son's wife was irritably impatient with him.

One day he dropped his earthenware bowl. "You are a pig!" cried the woman, "so you must eat out of a trough". She therefore made him a little wooden trough for him to eat from.

These two had a four-year-old son. His father noticed that he was playing with some pieces of wood and asked him what he was doing. "I am making a trough for you and mother to eat from when you are old and I get big," answered the lad.

The man and his wife said nothing but cried a little. They gently led the old man back to the table, set him in a comfortable chair and gave him his food on a plate. From then on they never scolded him when he accidentally spilt his food or broke something.

Iam estis kaduka maljunulo, kies okuloj proaĝe palpebrumadis kaj manoj tremadis. Mangante, li salivumadis sur tablotukon. Li loĝis kun sia edza filo, kaj ties edzino estis al li kolerete senpacienca.

Unu tagon li lasis fali sian argilajan mangĉelvon. "Vi estas porko!" kriis la virino; "sekve vi de nun mangos el trogeto!" Ŝi do faris lignan trogeton el kiu li devis mangi.

La geedza paro havis kvarjaragan filon. Lia patro, rimarkante, ke li ludas kun lignopecoj, demandis al li: kion li faras? Respondis la fileto: "Mi faras por vi kaj la patrino trogeton, el kiu vi mangos, kiam vi estos jam maljunaj kaj mi plenkreska viro".

La viro kaj lia edzino diris nenion, sed iom ploretis. Ili milde kondukis la maljunulon al la tablo, sidigis lin sur komfortan seĝon, donis al li mangajon sur telero kaj neniam plu insultis lin, kiam li senintence lasis misfali mangajon aŭ rompis objekton.

Advanced

"WUTHERING HEIGHTS".—Of all the books of all the Brontes, this one is the supreme masterpiece. Charlotte had genius and imagination; she had passion, too. But there is a certain demonic violence about Emily which carried her work into a region of high and desperate beauty forbidden to the gentler spirit of her sister. The love of Heathcliff and Catherine breaks the bonds of ordinary sensual or sentimental relationship and hurls itself into that darker, stranger, more unearthly air wherein one hears the voices of the great lovers, and where Sappho and Michaelangelo and Swift

and Shelley and Nietzsche gasp forth their imprecations and their terrible ecstasies.

Crude and rough and jagged and pitiless, the style of this astounding book seems to rend and tear, like a broken saw, at the very roots of existence. The smell of rain-drenched moor, the crying of the wind in the Scotch firs, the long lines of black rocks drifting across the twilight—these things become, in the savage style of this extraordinary girl, the very symbols and tokens of the power that rends her spirit—J. C. Powys.

El ĉiuj libroj, kiujn verkis la fratinoj Bronte, tiu estas la plejsupera majstrajo. Charlotte havis genion kaj imagon. Ankaŭ pasion. Sed en Emily estas ia demona perforto, kiu portas ŝian verkadon en sferon de alta kaj angora beleco neebila por la milda spirito de ŝia fraterno. La amo de Heathcliff kaj Catherine rompas la ligilojn de ordinara volupta aŭ sentimentala rilato kaj jetas sin en tiun pli malluman, pli strangan, pli ekstermondecan aeron en kiu ni aŭdas la voĉojn de la grandaj amantoj—kie Sappho, Michaelangelo, Swift,

Shelley kaj Nietzsche stertore elpuŝas siajn blasfemojn kaj terurajn ekstazojn.

Kruda, malglata, akra kaj senindulga, la stilo de tiu miriga libro, kvazaŭ rompenta segilo, ŝajnas ŝiri je la efektivaj radikoj de la vivo. Laodoro de pluvsaturo erikejo, la hurlado de la vento en la Skotaj abioj, la longaj linioj da nigraj frugilegoj pasantaj trans la krepuskan ĉielon—tiuj farigis, en la sovaĝa stilo de tiu ĉi eksterordinara junulino, la efektivaj simboloj kaj indikajoj de tiu potenco, kiu ŝiras al ŝi la animon.

PERTH CONGRESS, JAN., 1970

Other States:

85. S-ro G. S. Thatcher, N.S.W.

86. F-ino A. Curtis, Q., non-attending.

Accommodation still available at Forrest House. Please contact W. H. Howard, 31 Donegal Road, Floreat Park, W.A., 6014. He trusts that anyone concerned may regard his call as urgent.

NIA GAZETA HISTORIO

La U.E.A.-Jarlibro 1969, p. 497, tekstas: "Australian Esperantist, The (1940)". Tio povus erarigi bibliografojn.

Tiu gazeto estas samformata, samspice enhava kiel "La Suda Kruco" kaj poste "La Rondo" (presita serio). La tri titoloj donas nomon al unusama Australia landasocia gazeto. Okazis nur nomŝanĝoj.

LA SUDA KRUCO—Julio 1920-Okt. 1934 (165 numeroj).

LA RONDO (mimeografe)—Okt. 1940-Dec. 1944; Feb. 1946 ĝis la Unua Jarkvarono 1947 (80 numeroj).

LA RONDO—Jan. 1947-Dec. 1957 (53 numeroj).

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST—Jan. 1958 ĝis nun.

Redaktoroj: Arthur M. Hyde, Julio 1920-Junio 1921; C. W. Ballard, Julio 1921-Aprilo 1927; P. Hudson, Majo 1927-Marto 1929; Frank R. Banham, Aprilo, 1929-.

SIDU SUR ILIN!

Oni povas skribi tute korektan E-on, sed nekompreneblan. Juna instruisto korespondis kun Japana in-

struisto. Li plendis pri bruema klaso kaj aldonis, ke li "devis sidi sur ilin" (Angla idiomo: I had to sit on them). La Japano respondis: "Ne digna, sed tre efika estas via disciplino!"

TORUN UNIVERSITY

This Polish university, which has a lectureship in E-o, has taken over the administration of the rich Esp. library of the Internacia Scienca Asocio Esperantista. It has added some 200 books and magazines to its stock. Scientists world-over may borrow any of these through normal exchange service operated at the university's expense.

MAJUSKLOJ

Konsiderinda punkto: Majuskloj faciligas serĉon en densa presteksto kaj krome teknikarte malpliigas preslitan monotonon. Ekzemple, serĉante al cito pri "Malta produktaĵo" la elstare distinga majusklo helpas la okulojn, kaj cetere evitigas dusencecon!

IN TRIBUTE . . .

The A.E.A. warmly thanks Mr. Norman Johnson, our compositor, who for so many years has so ably, and so kindly, given us of his best—from September, 1929, to this, his final number. For all concerned it has been a happy association, now regretfully dissolved through circumstances beyond his control or ours.

We ask indulgence in any eventual delay or other difficulty because of this change. We are stabilising the situation.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road
Willoughby, N.S.W., 2068
A.E.A. Press Office: H. V. Petley, 88 Verney Road West, Graceville, Qld., 4075
Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 78(158)

MELBURNO

Oktobro, 1969

PRI NIA GAZETO

Rimarkoj de Redaktoro



Motivate de idealismo kaj servovolo, E-istoj povas fondi gazeton, sed tio estas nur komenco sur dorna vojo. Por povi ĝin regule aperigi kaj fari ĝin favore komparinda kun similcelaj presajoj necesas persisto, eltenavo.

De post 1927 manpleno da E-istoj Aŭstraliaj, malgraŭ malfaciloj, streĉis la eblon prezenti utilan presorganon al siaj samcelanoj. Nesufiĉa monsubteno kaŭzis paŭzon de 1934 ĝis 1940. En Oktobro 1940 aperis N-ro I de mimeografita "La Rondo", kaj ĝis Decembro 1946 F-inoj Bailey kaj Addis sinofere produktis tiun gazeton per propraj manoj. Espereble tom multaj kompletaj jarkolektoj ankoraŭ troviĝas ĉe homoj, kiuj rekonis ĝian signifon.

En 1947, pro instigo kaj helpo de Ges-roj Rawson, aperis "La Rondo" en presita formo. De tiu tempo ĝis nun — 22 jaroj — ĝi aliradis regule al abonontoj. Ritme daŭra eldonado dependas de ideala subteno de Asocioj. Pro la kampanjo sub gvido de "Tiny" Goldsmith, la bazo por tio estas kuragige plifirmigita.

Konservu viajn ekzemplerojn.

Bedaŭrinde, ne ĉiuj legantoj konservas la gazeton; iuj faras tion; kelketo bindigas la jarkolektojn kaj tiel savas ilin kontraŭ perdiĝo. La celoj kaj sukcesoj, la aspiroj kaj misfaroj, E-ismo en ĉiaj aspektoj, estas raportitaj en la paĝoj de La Suda Kruco, La Rondo kaj The Australian Esperantist.. Nia organo estas ligilo, kiu kuntiras samideanojn en komuna intereso kaj voĉo por ilin informi helpi kaj inspiri. Sen ĝi, nia Asocio tre povus malintegriĝi en izolitajn, indiferentajn, malvigilajn individuojn sen spirita kohereco.

"The A.E.", ĉefe, estas Asocia bulteno donanta preferu unuan lokon al Asocia planado kaj plenumado; al klub- kaj grupagado kaj sufiĉe signifaj personaj paragrafoj. La restanta spaco ricevas amuzan, kulturaran aŭ bibliografian materialon. Krome troviĝas mencioj pri pikantaj aŭ sciindaj aferoj el aliaj E-gazetoj.

La Fiksita kaj la Foriganta

Pasis la jaroj, kaj kun ili la homoj, kiuj en ili laboris, animpeleta de fido al tiu Pola ĝeniulo, kies dinamika forto vibrigis la mondon. Ilia memoro, ho ve, nebuliĝos en la menso de multaj el ni, sed por la okuloj de la estontaj E-istoj ilia vivo kaj verko restas atesto fiksita sur la paĝoj de nia gazeto.

Bedaŭre direndas, ke kelkaj homoj, plenaj de nedisciplinita fervoro, efemere raketis en la movado. Per malpraktika strategio kaj maltaŭga taktiko ili provis taskojn ne situacie fareblajn. Baldaŭ perdinte paciencon, ili paŭte pasis el la movado.

Aliaj, tamen, kvazaŭ "eterna flamo", ardis ade tra jardekoj, malgraŭ moko kaj ŝoko. Ankoraŭ iliaj nomoj facile flugas al niaj lipoj.

La E-isto ĝuas privilegion; sed devon ankaŭ li havas. Devo al Esperanto mem. Li do diru: "Nomante min E-isto, mi portu la nomon honore kaj E-on prezentu plejble bone laŭ mia kapablo". Li penu **perfektigi** sian scion skriban kaj parolan; **direkti** ĝian uzadon al praktikaj celoj, **projekti** en la socion — ĉe ĉiu alirebla loko — informojn pri la mirinda lingvo, kiun konfidis al li ĝia genia eltrovinto. —La Redaktoro.

Bibliografia Korekto !

P. 280 Legu: De Oktobro 1940 ĝis la Unua Jarkvarono de 1947 aperis 76 mimeografitaj numeroj de La Rondo (Ne, 80). La Rondo presita: Jan.—1947 - Dec. 1947: 80 numeroj (Ne, 53).

NUMER-ERARO

La Septembra numero. Legu: N-ro 77 (157). Signifo: la 80 numeroj de La Rondo + la 77 de la kuranta serio.

DIVID-STREKETOJ

Pro la aligo de multaj novaj membroj, ni de nun klopodos sekvi konsilon en "Esperanto", 764-5: uzi divid-strekojn en du-radikaj kaj pli ol du-radakaj vort-kunmetoj, por faciligi konsulton de vortaro. Ekzemple, kulp-atesto, komun-uza, sen-data, for-timigi, suk-riĉa, glit-iro, dis-ondo, di-servo, or-peco, leg-enda, lav-enda, domaĉ-erala, dom-aĉeto, grat-ulo, por-kongresa.

AŬSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095

OFICIALA INFORMILO

15an de Septembro 1969

Novaj Individuaj Membroj

Gardiner, S-ino E., Brisbane, Qld
McKenzie, F-ino O. M., Burnie, Tas.
Grant, S-ro E. T., Mackay, Qld.
Demovich, S-ro V., Summer Hill, N.S.W.
Bolton, S-ino N., S. Blackburn, Vic.
Griffin, S-ro L. S., Manly, N.S.W.
Maloney, S-ino E., Caloundra, Qld.

Donacoj al la Publiciga Fonduso

Jam anoncita	\$470.37
Grant, S-ro E. T., Qld.	0.50
Sunshine Coast Esp. Soc., Qld.	10.00
CCG	2.00
	<hr/>
	\$482.87

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Interŝtata Konkurso

Poentoj donataj

Nova Individua Membro	5
Nova Dumviva Membro	50
Aliĝo al la Populara Kurso	2
Aliĝo al la Mezgrada Kurso	5
Aliĝo al la Altgrada Kurso	10
Sukceso ĉe la Elementa Ekzameno	2
Sukceso ĉe la Altgrada Ekzameno	5
Sukceso ĉe la Klereca Ekzameno	10
Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso	1

Stato je la 15a Sept. 1969

	Kvoto	Poentoj	%
Queensland	130	317	243.0
N.S.W. & A.C.T.	260	436	167.7
Victoria	300	492	164.0
W. Australia	80	79	98.7
Tasmania	30	24	80.0
S. Australia	40	4	10.0

—C. C. GOLDSMITH, Sekretario.

PARTOPRENU!

Jen kelkaj rezultoj de nia agado en la nuna jaro ĝis la 15a de Septembro.

Novaj individuaj membroj pli ol 100

Infompetoj ricevitaj 953

La granda plimulto petis pere de la verdaj kartoj, sed ankaŭ tre multaj pro la bona laboro de nia Oficisto pri Publikaj Rilatoj, S-ro H. V. Petley, al kiu ni ŝuldas multajn dankojn.

Aliĝoj al la Populara Kurso 60

Aliĝoj al la Mezgrada Kurso 33

Aliĝoj al la Altgrada Kurso 5

El tiuj, kelkaj jam finis la Popularan Kurson, kaj preskaŭ ĉiu el tiuj nun traverkas la Mezgradan Kurson; unu jam finis ambaŭ tiujn kaj nun faras la Altgradan Kurson.

Donacoj al la Publiciga Fonduso \$482.

Ĉu mi estas tute kontenta? Bedaŭrinde ne, ĉar mi scias, ke la rikolto povus esti multe pli bona, se ĉiu membro iomete helpus. Ni ne petas multon — nur, ke vi disdonu kvanton de la verdaj kartoj laŭ la konsiloj jam donitaj; aŭ, se vi ne povas tion fari, ke vi faru malgrandan kontribuon al la Publiciga Fonduso por helpi al la kostoj. Nun, kiam vi povas vidi ke la agado alportas bonajn rezultojn, eble vi pli emos tion fari.

Post nelonge okazos nia 17a Kongreso en Perth, kaj ni esperas raporti tie, ke preskaŭ ĉiu membro partoprenis en la plifortigo de via Asocio. — C.C.G.

HUGO STEINER

La fondinto de la Internacia Muzeo en Vieno mortis la 1-an de Augusto en sia 92-a jaro. Saluton de Aŭstraliaj Esperantistoj al nevenkebla bravulo.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La konata E-mondvojaĝanto S-ro W. Simpkins alvenis en Perth en Aŭgusto. Kune kun S-ro J. Hawks li vizitis, 14/9. nian eksprezidanton S-ron Walker en la Charles Gairdner Hospitalo. La privatkomerca TV-Stacio 9, je 23/9, intervjuis S-ron Simpkins kaj S-ron Bill Howard, nian sekretarion, en la programo "24 Horoj". Tiu intervjuo estis bona reklamo por nia ideo.

MELBURNO: Trafan komparon de la vivo de D-ro Zamenhof kun tiu de Kristo prezentis, 1/9 S-ro F. R. Banham. La muziko de la 5-korda Banjo estis la temo de prelego de S-ro A. Baldwin, 8/9. Li skizis la devenon de la banjo (antaŭ 125 jaroj inter afrikaj negroj) kaj evoluadon, kun aldono de la 5-a kordo, en Usono. Li ankaŭ prezentis ekzemplojn de la 4 ludstiloj. S-ro H. Beechey, 15/9, prelegis pri "Vojoj al Liberiĝo". Li parolis pri Zen-kaj Taoisma Budaismo kaj demandis: ĉu ekzistas kontraŭveneno por nia freneza okcidenta kulturo?

Daŭrigante sian traktadon pri "Eku-menismo", S-ro A. Heathfield, 22/9, skizis la historion de la movado, kiu originis en 1910 en Skotlando. Evidentiĝis, ke el multaj provoj rezultis iom da progreso; la nuna stato ke la ĉefaj eklezioj en si mem unuigis, sed restas la neceso trovi ponton kiu fine unuigos tiujn.

La jusa surluniĝo fare de 3 usonaj astronautoj rememorigis 100-jaraĝan rakonton pri vojaĝo samcela, kaj provizis temon por parolado de S-ino Fay Koppel ĉe la aŭgusta RENDEVUO. Sia "Revo Realigis" inkludis ampleksan pritrakton pri la verkoj de Jules Verne, ties vivo kaj famiĝo kune kun historia skizo pri verkado pri interplaneda flugado ekde la dua jarcento p.K.

SYDNEY: S-ro Frank Dunn, 25/8, parolis pri siaj studoj post la milito kaj kiel li fariĝis bibliotekisto. S-ro D. Cook, E-isto el Christchurch (Nov-Zelando) vizitis nin, 1/9, kiam okazis diskutvespero. Tiun daŭrigis S-ro Matasin semajnon poste pri religio, politiko kaj interhomaj rilatoj. S-ino K. Smith, 15/9, montris lumbildojn kaj parolis pri "Mi preskaŭ perdis mian edzon en Tahiti".

S-ro Chandler parolis, 22/9, pri indiĝenaj legendoj. Li enkondukis sian temon per iom da historio pri la aŭstraliaj indiĝenoj. Bonvena gasto ĉe nia kunveno de 29/9, estis la redaktoro de "Australian Esperantist", S-ro F. R. Banham (Melbourne). Li faris prelegon pri la temo "La 3 doloroj de D-ro Zamenhof".—VOLO.

BRISBANE: Ni estis tre bonŝancaj ke oni invitis nin partopreni en la printempa festivalo "Warana". La anoj partoprenis en la Warana procesio kun Esperanto "Float" je 27-a de Sept, kaj en la "All Nations Pageant" je 4-a de Okt.

Telefon-numeroj de nia societo nun ankaŭ aperas en la ĉiumonata broŝuro "Welcome to Brisbane".—Violet YOWE

D-RO ANDREW FRIDENBERGS

Mi tre bedaŭras informi, ke nia amiko D-ro Andrew Fridenbergs mortis la 9-an de Septembro, 1969.

La 26-an de Aprilo li suferis apopleksion kaj estis transportita al Melbourne General Hospital, de kie, post kelkaj semajnoj, oni translokiĝis lin al Mount Royal Hospital for the Aged. Mi vizitis lin en la du hospitaloj trifoje, kaj ŝajne li iomete pliboniĝis, kvankam li ne povis paroli. Matene de la 9-a de Septembro flegistinoj trovis lin mortinta. Verŝajne en la nokto li havis duan apopleksion.

Post funebra servo en King's Memorial Chapel li estis kremaciita en Springvale Crematorium de Melbourne.

La sorto ne permesis al nia kara mortinto partopreni kun ĝojo la 17-an Esperanto-Kongreson. —Herbert Koppel, vicsekretario de Aŭstralia Esperanto Asocio.

D-ro Fridenbergs naskiĝis en Antverpeno da Latvaj gepatroj kaj, maturiĝinte, praktikis en Latvio kiel advokato. En la milito la Germanoj lokigis lin en Danujon, kie li instruadis. E-isto jam tiam de 30 jaroj, li migris en Aŭstralion en 1949. Baldaŭ li aktivis en la landa movado. Lia nomo jam aperis ĉe la 7-a E-Kongreso, al kies sukceso li helpe kontribuis (La Rondo, 1/50).

Ĝis lia subite mortiga malsano li estis bonvena persono en grup-ondoj. Dum konversacioj impresis min lia kapablo juĝi, aprezi, pens-pesi, saĝe opinii pri aferoj. Neniam mankis al li ideoj pri ekzemple la homoj kaj la socio — kaj la parol-fluo por ilin esprimi.

Mi ve-spiras foreston de aminda kolego.—F.R.B.

DIP. ESPERANTO

The style D.B.E.A. means nothing to the non-Esperantist, writes Raif Makarian in The British E-ist (June, 1969). He approves the suggestion that Dip. Esperanto is a better way of indicating this qualification where publicity among non-Esperantists is involved.

PARALLEL TRANSLATION

Advanced

I hear it said that our self, our self-consciousness, depends wholly on that piece of matter we call a brain, and that when the brain dissolves in death that signifies the complete disintegration of the human personality, of the man itself.

This does not worry me at all, because if it turns out that such is so after my death, I shall not be in a state to know that I have been wrong. I think that every single thing that I now know suggests the contrary, namely that I am more than my nervous system; and on that supposition I live. If it could be shown that I have been making an error, even then I should prefer to live on the basis of that mistake.

I shall never be able to reach a conclusion about this, but even if you could convince me that what you say might well be true, I would still think it better to live on the assumption that it was not. —M. Muggeridge.

Oni diras, ke nia memo, nia sinkonscio, tute dependas de tiu peco de materio, nomata cerbo, kaj ke kiam la cerbo diseriĝas en morto, tio signifas la tutan diserigon de la homa personeco, de la homo entuta.

Tio neniel min ĝenas, ĉar se montriĝos, ke tiel estas post mia morto, mi ne estos en stato scii, ke mi eraris. Mi pensas, ke ĉio, kion mi nun scias, signifas la malon, nome, ke mi estas io supera ol mia nervsistemo. Kaj, surbaze de tiu supozo, mi vivadas. Se estus eble, klare montri al mi, ke mi eraras, eĉ tiam mi preferus vivadi sur la bazo de tiu eraro.

Mi neniam povos atingi konkludon pri tiu demando, tamen, eĉ se vi povus konvinki min, ke via kredo tre verŝajne estas vera, mi ankoraŭ rigardus kiel preferindan: vivadi laŭ la supozo, ke ĝi ne estas vera.

ELEMENTARY

Two artisans were talking in an inn. They discussed a difference between gentility and tact. "They are identical", affirmed the tailor. "No", said the tinsmith, "there is a great difference". "What is it, then", asked the other.

"Well, here's an example. Last evening the doctor, who lives opposite me, asked me to repair a faulty shower-rose in his bathroom. I said I would come sometime before midday today. At about 9 o'clock I found my time free, so I went to his villa, found the door unlocked. The servant was absent in the garden. As I knew the layout, I went along the corridor to the bathroom and opened the door. And, the doctor's wife was just stepping out of the bath. I was not embarrassed. I bowed and said: 'Pardon, Herr Doctor' and closed the door. Now, you note: that I said 'Pardon' — that's gentility. When I added 'Herr Doctor' — that was tact".

Du metiistoj interparolis en drinkejo. Ili diskutis diferencon inter ĝentileco kaj takto. "Ambaŭ estas identaj", asertis la tajloro. "Ne", diris la ladisto, "estas granda diferenco". "Kiu do?" demandis la alia.

"Nu, jen ekzemplo. Hieraŭ vespere la doktoro, kiu loĝas kontraŭ mi, petis min ripari difektitan duŝilon en sia banĉambro. Mi diris, ke mi venos iam antaŭ tagmezo hodiaŭ. Ĉirkaŭ la naŭa horo mi trovis disponeblan tempon, do mi paŝis al lia vilao, trovis la pordon neŝlosita. La servisto estis fore en ĝardeno. Sciante la lokojn de la ĉambroj, mi iris laŭ la koridoro kaj malfermis la pordon. Jen la doktoredzino ĝuste tiam estis eliranta el la bankuvo. Mi ne embarasiĝis. Mi faris riverencon, dirante: 'Pardonu, Sinjoro Doktoro!' kaj fermis la pordon. Nun vi atentu: ke mi diris 'Pardonu!' — tio estas ĝentileco. Sed ke mi aldonis: 'Sinjoro doktoro!' — tio estas takto".

ESPERANTO — —

Pli simpla gramatike ol la Angla.
Pli logika vortkonstrue ol la Germana.
Ĝi havas la vokalpurecon de la Itala.
Ĝia akcento estas tiel regula kiel la Pola.
Perfekte fonetika ortografio.
Aqlutina naturo kaj
Logika vort—kaj fraz—konstruo faras ĝin ideala.

THE BRIDGE LANGUAGE

A representative of the U.E.A. in Poland has translated from Esperanto many short stories and sketches and had them accepted by a Polish journal, always with a tag-line: Translation from Esperanto. This is the kind of publicity that is favourably noticed.

DISKUTINDA DIRO

"Ĝis nun Esperanto havis minimume du geniulojn—Zamenhof kaj Kalocsay".—Wm. Auld, "Monda Kulturo", Vintro, 1962-3.

Tio bezonas analizon, ĉar ĝi levas malfacile solveblajn demandojn. En kio konsistas la genio? Kiam vi jam elforgis difinon kontentigan por vi, apliku ĝin al la nomitoj. Laŭ la komune akceptata koncepto de la genio, nome, "la kapablo **krei** au **fari** ion, kiun neniu alia homo iam kreis aŭ faris", Zamenhof estis geniulo, ĉar li unike **faris** aferon ĝis tiam ne faritan: krei vivantan lingvon. Mi supozas, ke li kreis ĝin el la propra koro kaj kapo, sendepende de la sugestaj pensoj de antaŭaj lingvemuloj. En la 18-a jarcento Maupertuis kaj Faiguet perceptis la principojn de sinteza gramatiko kaj lingvo (La Rondo, 9/47; La Espero (Svedujo), Junio-Julio, 1967; Lingvo Internacia, Julio, 1907), sur kiujn Zamenhof bazis Esperanton. Oni ne scias: ĉu li jam antaŭe sciis pri la laboro de tiuj du pioniroj.

La sistemo de Maupertuis restis nur papera disertacio; tiu de Faiguet nur skizo de gramatiko. Li ne provis ellabori vortaron. Drezen (Historio de la Mondolingvo) tamen asertas, ke "nia kono de la nuntempaj projektoj de artefarita lingvo konfirmas la vivkapablon kaj bazitecon de la konstatoj de Maupertuis".

Pri Kalocsay. En kio konsistas lia genio? Al li ni ne povas apliki la supre donitan difinon: "La kapablo krei aŭ fari ion, kion neniam antaŭe alia homo kreis aŭ faris", ĉar aliaj homoj ja faris similajn fortostreĉojn en la poemtraduka kompo kaj kreis gemojn de la poezio.

Ni serĉu alian, aplikeblan al li. "Genio estas pacienco", aŭ, "La genio estas nenio alia ol g:andega kapablo pacienci" . . . persista, eltenema, neelĉerpebla pacienco. Tio estas eble banala, neintelektala difino, tamen ĝi certe karakterizas la Hungaran majstron. Nur estas aldonende, ke ne maloftas tiaspecaj geniuloj, kiuj, cetere, ne kreis ion unikan.

Paŭzante en la diskuto, ni notu liajn farojn. Lia eterna monumento estas la terure malfacila rimtraduko de La Infero, lia plej amata tasko, kiu kostis al li "plej multe da peno kaj zorgo" (Argenta Duopo, p. 35).

Ne nur fekunda poemtradukinto li estas; ankaŭ kiel originala poeto li brile lumas. Krom liaj kolektitaj poemoj, troviĝas en la Parnasa Gvidlibro la ĉiam leginda kaj releginda: La Arto Poetika, kun kiu oni profite komparas la temrilatan

poemon: Malnovaj Lampoj, de Brendon Clark (Kien la Poezio?).

Finvorte, ne multaj, literaturamantoj konsentus al la diro de Prof-o Waringhien (vidu: The A.E., p. 277) pri stilmajstroj, ĉar al ĝi mankas la elementoj de aksiomeco, absoluteco. Krome ĝi estas diro neintence, nekonscie pesimisma. En pli ol sepdek jaroj da evoluenta esprimopovo certe kaj sendube aperis verkistoj—inter ili Karlo Bodo, Szilagyi, Forge, Privat—kies pensoj, priskriboj, plezure fluas en la kapon kaj koron de l'homoj tiel facile, eĉ pli facile, ol en la tempo jam longe forpasinta.

Kaj ĉi-artikole pri la "genio". En la diro de S-ro Auld kuŝas sufiĉe da vero, por ĝin akcepti, kun necesaj modifoj, kiujn tute prave vi kaj aliaj verŝajne prezentus. Tamen, se oni rajtas tributi al Kalocsay la nomon "geniulo", oni devos serĉi eĉ pli fortan titolon por Goethe, Da Vinci, Mikaelaĝeloj kaj Ŝekspiro.

—Farbo.

17th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4th to 9th January, 1970, Perth, W.A.

Congress Secretary. Mr. W. H. Howard, 31 Donegal Road, Floreat Park, W.A., 6014. Congress Fees. A.E.A. Member, \$5.00; non-A.E.A. Member, \$6.00; non-attending Member, \$2.00. Half these rates apply for those staying at Forrest House (add \$5.00 hotel deposit).

6th List of Enrolments

From other States:

87. S-ro R. G. Robertson, N.S.W.

Jes - Okcidenta Aŭstralio suferas pro senpluveco, sed la venonta kongreso NE estos "seka" afero. Kontraŭe, ni atendas ke la kongresanoj multe interesiĝos pri la kunsidoj kaj prelegoj. Ni atendas ankaŭ ke la partoprenantoj de la ekskursoj kaj distrajaj konsentos ke la vizito al Perth estis laŭdinda.

Ju pli do vizitantoj ĉeestos, des pli sukcesa fariĝos la tuta kongreso!

Kelkaj ĉambroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe Forrest House. Tiuj, kiuj devis prokrasti la decidan viziti Perth-on, agu nun! Sendu vian aliĝilon al la Kongres-Sekretario laŭ supra adreso.

"IBERIA" AERLINIARO

La mondkonata aerkompanio eldonis belan faldfolion en Esperanto, por prezenti pagsistemon "Credivuelo". Uzu ĝin en oportuna okazo, petinte ĝian informon ĉe Iberia Lineas Aereas de Espana, Calle Velazquez 130, Madrid 6.

KOMPLOTO KONTRAŬ LA HOMO

Senvivaj objektoj klasifiĝas en tri kategoriojn—tiuj, kiuj paneas, tiuj, kiuj perdiĝas, kaj tiuj, kiuj, ne funkcias.

La celo de ĉiuj senvivaj objektoj estas rezisti la homo kaj finfine venki lin, do la tri klasifoj baziĝas laŭ la metodo, kiun uzas la objekto por atingi tiun celon. Ordinare iu objekto, kiu kapablas panei je la momento kiam ĝi estas la plej multe bezonata, nepre tion faras. La aŭto estas tipa ekzemplo.

Pro la ruzo propra al sia raso la aŭto neniam paneas dum eniro al servostacio, kiu posedas grandan stabon de mekanikistoj. Tute nel Ĝi atendas ĝis vi atingos vojkrucejon je la zenito de la plej aferplena horo, aŭ kiam ĝi estas plene ŝargita per la tuta familio kun ties kompleta pakajaro sur la ĉefsosejo en la mezo de nenieslando. Nur tiel ĝi povas krei la maksimuman ĝenajon, vanigon, kolerigon, tiel malpliigante la vivekspekton de ĝia posedanto.

Lavmaŝinoj razenfalĉiloj, cambrohejtigiloj, televidaparatoj, magnetofonoj, kaj bildprojekciiloj — ĉiuj konspiras panei, kiam ajn ŝajnas, ke la vivo marŝas tro glate por ilia ĉefmalamiko.

Multaj senvivaj objektoj, kompreneble, trovas, ke estas ege malfacile panei. Marteloj, ekzemple, gantoj, kaj ŝlosiloj preskaŭ ne kapablas panei, do ili devis elpensi alian teknikon por spiti la homon. Kion ili do faras? Ili perdiĝas!

Scienco ankoraŭ ne solvis la misteron pri la metodo, laŭ kiu ili sukcesas perdiĝi, kaj ankoraŭ neniu kaptis senvivan objekton, dum la ĝusta ago perdiĝi. La plej akceptebla teorio estas, ke ili evoluigis sistemon de moviĝo tute neperceptebla al la homa okulo.

Ne estas malkutime, ke ŝraŭbturnilo grimpu la tutan vojon de la garaĝo ĝis la mansardo, simple pro sia intensa obstino altiĝi la sangopremon de sia posedanto.

Iuj personoj spertis, ke ŝlosiloj povas tuneli tutan metron sub matracoj. La virina mansako, malgraŭ ĝia kutime granda pezo, ofte vojaĝas tra ses aŭ sep ĉambroj por trovi kaŝejon sub kanapo aŭ fotelo.

Sciencistoj jam rimarkis, ke objektoj, kiuj paneas, neniam perdiĝas, dum objektoj, kiuj perdiĝas, apenaŭ iam ajn paneas. Cambrohejtigilo preskaŭ ĉiam paneas ĉe la unua ondo de vintra malvarmeco, sed ĉu ĝi perdiĝas? Preskaŭ neniam! Virina mansako apenaŭ kapablas panei, do ĝi perdiĝas.

Iuj personoj kredas, ke tio pruvas, ke senvivaj objektoj ne estas tute malamikaj al la homo. Ni devas konstati, ili

atentigas, ke ĉambrohejtigilo povus kolerigi homon pli komplete per perdiĝo ol per paneo, same kiel ganto povus ĉagreni per paneo pli ol per perdiĝo.

Ne ĉiuj konsentas, tamen, ke tio indikas malpliigon de la malamikeco. Ili asertas, ke ĝi simple pruvas, ke cambrohejtigiloj kaj gantoj estas nekredeble stultaj.

La tria klaso de objektoj — tiuj, kiuj ne funkcias — estas la plej stranga el ĉiuj. Ĉi tiu klaso inkludas barometrojn, aŭtohorloĝojn, cigared-bruligilojn, elektrajn torĉojn kaj ludilajn lokomotivojn. Ne estas tute vere, kompreneble, diri, ke ili neniam funkcias. Ili ja tion faras unufoje. Kutime dum la unuaj kelkaj horoj post aĉeto. Tiam ili ĉesas, kaj neniam denove funkcias. Efektive, ŝajnas, ke ili estas planitaj precipe por la celo ne funkcii! Mi konas kelkajn personojn, kiuj jam atingis tre maturan aĝon, sen vidi funkcii barometron.

Scienco estas absolute mistifikita per ĉi tiu kategorio. Ekzistas kelkaj interesaj teorioj. La plej interesa teorio estas, ke objektoj, kiuj ne funkcias, estas atingintaj la kiel eble plej altan staton por senvivaj objektoj, staton, al kiu objektoj, kiuj kapablas nur perdiĝi, povas nur aspiri.

Ili estas tiel venkintaj la homon, ke li tute perdas la esperon. Kiam la cigared-bruligilo rifuzas funkcii, aŭ la elektra torĉo paneas, la sangopremo de la posedanto neniam altiĝas, car li ne atendas ion alian. Objektoj, kiuj ne funkcias, donas al la homo la solan pacon, kiun li povas esperi el senvivaj objektoj. —El la angla tradukis Ken G. Linton.

IS YOUR ESPERANTO PERFECT?

If you are doubtful, send for particulars of our new Advanced Correspondence Course. It is a really good one, and is conducted by a staff of competent tutors, who would be pleased to help you.

You would find it both useful and interesting.

THE AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095

ZAMENHOF: SCHWEITZER

Jam kolektiĝis la sumo (25,000 guld.) necesa por starigi en Afriko veturantan klinikon "L. L. ZAMENHOF". Jen ankoraŭ similaĵo en la vivoj de Zamenhof kaj Schweitzer, la rimarkinda doktoro de Lambarene (Ekvatora Afriko).

RECENZOJ

Yearbook of U.E.A., 2nd part 1969. 64 p. and Statute and Rules of U.E.A. 74 p. Agent: Ken Linton.

The first-named gives a detailed yet compact account of the activities for the past year. First the balance sheet, then follow all the fields of organisational, cultural, inter-youth, literary and commercial endeavor, and much of interest besides.

No E-ist is fitly armed to meet public questioners unless he has the facts at his finger tips. This authoritative vademecum provides all that one must know of one if to fairly and firmly present the case for Esperanto and its standing in the world today. Issued to members only).

Kongresa Libro: Helsinki 1969. 144-paĝa. Prezindiko mankas.

Jen grandioza prezento forme de detala raporto pri la E-a Kongreso. Riĉe fotohava, ĝi estas valora memorlibro pri tiu evento. Resumoj de ĉiuj prelegoj; Finna-Esperanta frazaro, vortaro; kompleta listo de ĉiuj aliĝintoj, inter kiuj estas sep Aŭstralianoj. Krome troviĝas historiaj skizoj pri Finnlando kaj ĝia E-a movado.

La kompilintoj meritas gratulon el vasta rondo.

Verkaro de Hengwi Hong: Taegu, Koreujo. 265 paĝoj. Prof-o Chong Yoong Lee, 527-5, 4th St., Dongin-dong, Taegu. La aŭtoro, pioniro de E-o, mortis en Marto 1968. Liaj samlandanoj ame lin nomas "la Zamenhof de Koreujo". Kiel tributon la Koreaj E-istoj eldonis la libron. Enhavo: Kvin Korelingvaj artikoloj pri E-o kaj kvar en E-o.

Laŭ indikoj per latinliteraj vortoj sporadaj en la Korelingva teksto, la jenaj Studoj meritas tradukon an E-on. — Pri Modernaj Internaciaj Lingvoj; La Lingva Ideo de Zamenhof; Pri la Evoluo de la E-Literaturo; Aspekto de Humanisto, D-ro Zamenhof; Generala Aspekto de la I. L. Esperanto. Resumoj sekvas ĉiun Korelingvan artikolon.

Dum la civila milito (1952 ĝis la armistico) la organizita E-ismo "cindaĝis", sed ĝi reviviĝis jam de 1956. Tamen, ankoraŭ nun la tieaj sam-oj sentas siaŭ izolitecon for de fremdlandaj kontaktoj. Esperantismo vivas kaj kreskas per utila internacia kunlaboro, kaj estas esperinde, ke ankaŭ la Koreaj E-istoj, kune kun aliaj simile loĝantaj en malmulte konataj landoj, povos eniri la plenan fluadon de l'Esperanta vivo tramonda.

"**Norda Prismo**", N-ro I, 1969 15-a Jaro 64 paĝoj Kvaronjara. 43 steloj; jare 4 numeroj. Peras K. Linton.

Emilija Lapenna prelegas pri La Esperanta Libro: verkistoj ja abundas; legantoj mal-inundatas. Nuntempe acetado pli necesas ol verkado.

V. Setala proze sintezas La Tragedion de l'Homo (Madach: trad. Kalocsay), post literatura komparo kun similtemaj verkoj. R. Nogueiro penetre pritraktas La Vorton en la Poezio, pereczemple klarigante teorion atentotiran por prozodiistoj. Solidaj recenzoj pri "Vivo de Gandhi" kaj "Parnasa Gvidlibro". Abundas alia bonkvalita prozo.

Waringhien prezentas tradukon de tri Fabloj (de la Fontaine), kompareblaj kun tiuj de L. Thevenin. Gabriel Mora i Arana verse rapodias pri Tri Nudajoj de Modigliani, kun frapaj fotoj de la pentraĵoj. Provi traduki la strofojn estas vane. Edwin de Kock pikhumore sentencumas.

N-ro 2, 1969. Riĉa regalo kultura, poezia kaj proza. Min plaĉis precipe "Memore al L.N.M. Newell: represio el lia novelaro Bakŝiŝ (1938); Lingvaj Figuroj en Esperanto (R. Rossetti), admirinda pritrakto de retorikaj tropoj, metaforoj, stilfiguroj; du poemoj de T. S. Eliot (trad. W. Auld). Abundas alia legindaĵo, inter ĝi kritiko pri U.N. fare de Dana delegaciano, kaj studo pri la ĝermana metriko.

La sagace penetraj recenzoj evidentiĝas honestan takslaboron.

"**Gepatra Bulteno**" 10. Red. Derrick Faux 5 Brunswick Sq., Gloucester, England Kvaronjara. 14 steloj.

Eldonata aŭspicie de UEA, la netformata, bone presata libreto meritas subtenon de ĉiu interesata pri E-infantoj. Ĝia enhavo tamen neniel estas "infaneca" en senco malestima, ĉar troviĝas en ĉiu numero legajo certe meditinda por gepatroj-E-istoj. Ĉefartikolo temas pri komunikado inter infanoj diversrasaj. Valoras prilernaj raportoj el Novzelando kaj Nederlando, kaj ne mankas versaĵoj kaj artikoletoj, kiuj tenas atenton de junaj legantoj.

"**TURISTA MONDO**" Aperis la unua numero de la nova E-Revuo "Turista mondo" (Esperanto-Revuo de la 4 Sezonoj), kies ĉefredaktoro estas la mondkonata svisa ĵurnalisto kaj malnova Esperantisto D-ro Hj Unger el Zuerich.

La nova gazeto (8 paĝoj, grandformato 16" x 12") aperos kvarfoje jare. La unua numero enhavas interesajn artikolojn pri Kanado, Maroko, Lucerno kaj "Ora Prago", ĉiuj riĉe ilustritaj. Trilingva saluto al la legantoj (france, angle, hispane) estas skribita de S-ro Arthur Haulot ĝenerala komisaro de la belga turismo. Sur la paĝo "Esperanto en la praktiko" estas raportoj pri prelegoj turistaj faritaj en la E-societoj de Perth. Melbourne kaj Manly.

Entute bonvena aldonado al nia gazetaro. Ĝia abono en Aŭstralio estas \$2.25 (pere de S-ro Herbert Koppel, 41 Byfield St., Reservoir, Vic., 3073).

WE NOTE THAT . . .

The first encyclopedia to present Esperanto objectively and in detail is the Britannica, 1968 edition. The author of the article is Marjorie Boulton. Copyright has been obtained by Esperanto Information Centre, Room 821, 156 Fifth Avenue, New York, 10010. A reply coupon will bring you a reprint.

In the U.S. "Saturday Review" Prof. Mario Pei helps to dispel a widely held illusion: "Till now the nations of the Soviet have learnt and used English, because they wish to know what we are doing and to share our technical levels. But, if we were ever to propose making English a universal second language, they certainly would resist, urging the claim of Russian to become such."

In his "What's in a Word?" Pei elaborates thus: "There is an art language that has more adepts and is more recognised than any other such. This is a factual situation, not necessarily based on proper merit. Whatever be its merit, however, Esperanto has proved that (1) it has drawn together an impressive body of adepts. (2) It has attained all the ends of a spoken and written language, producing its own literature. (3) It has aroused the attention of governments. (4) It has impressed the public in such a way that there are few who have not heard of it and who do not conceive of it as an international language.

"Secondary School Esperanto" has been published by R. Mackarian, 2 Hazel Gr., Chorley, Lancs.

Dr. Mario Pei in his "What's in a Word?" (240 pp.) devotes four chapters to Esperanto as "the language of tomorrow".

TURISMO: GVIDLIBROJ

BULGARIO: Mallonga Skizo pri Lando kaj Popolo, 1968. Eldonita en 3100 ekz., ĝi estas mirinde detala prezento de la historia, kultura, socia kaj industria vivo tiulanda. "Bulgara E-isto", Poŝtkesto 66, Sofia.

"JUGU MEM!" Faktoj pri Ĉeĥoslovakio. Preskaŭ identa kun la supra laŭ aranĝo kaj poŝformato. Ambaŭ estas riĉe fotohavaj. — Eldonis: "Orbis", Praha.

POLLANDO: 1944-1964. En ĉi impona manlibro oni vidas ĉian aspekton de la Pola vivo; kompleta bildo, ne nur de 1944, sed jam de la historia komenco de la Pola ŝtato. Dense semita per fraĝaj fotoj. Nowy Swiat 27, Varsovio.

FAKTOJ PRI GERMANUJO: 1966. Simle bela libro, plene detala, dense foto-kaj grafikaj-hava. Tre havinda posedaĵo. L. Pickel, 85 Nurnberg 2, Postfach 2113.

TRA PARIZO: 1965. Gvidlibro tre la Urbo Luma. Ĉiu vizitinda loko en ĝi estas verve bildigita vorte kaj fote. Esp. Francaj Eldonoj, 11 rue Paul Vergne, Marmande, France.

ANKORAŬ SENSENCAĴO.

"Russian influence in the sphere could not be regarded as against Australia's interests so long as it was exercised in accordance with Australia's objectives". —Mr. Gorton, The Age, 10/9/69.

Traduko: Ruŝan influon en la areo oni ne povas rigardi kiel kontraŭan al la interesoj de Aŭstralio, tiel longe kiel la Ruŝoj uzas ĝin laŭkonforme kun la interesoj de Aŭstralio.

Nenidira vorturbo, sensignifa frazo-saŭmo. Por tio oni alte pagas ŝtatgvidistojn.

REVUO "ESPERANTO"

Tiu monata organo de U.E.A. estas legata en pli ol 80 landoj. Ĉiu membro-abonanto ricevas ĝin senpage, sed ĝi estas abonebla ankaŭ aparte. Per nia agento, S-ro K. Linton, fariĝu MA. Kiel tia, vi ricevas ankaŭ ĉ. 600-paĝan Jarlibron en du partoj. Ĝi enhavas nomojn-adresojn de 3597 reprezentantoj (delektitoj) en 63 landoj. La kotizo MA estas 6.50.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): F.ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road
Willoughby, N.S.W., 2068

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350
Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

No. 79 (159)

MELBURNO

Novembro, 1969

LANGUAGE FOR SCIENCE

Latin is dead as a scientific medium. It possesses all the difficulties of a modern ethnic language, plus a grammatical complexity that modern languages have long since abolished. Furthermore, classical Latin lacks thousands of technical words that are required in science and engineering. What the world needs is a universal auxiliary language that can be learned by anyone, anywhere, in a minimum of time . . .

It is inconceivable that man has insufficient brains to solve the problem. It must be done, and the only feasible method seems to be the use of an auxiliary language. This language can be taught in the elementary schools so that within a generation every literary person would know it. The study of the international language is of considerable cultural value and is an excellent preparation for the study of an ethnic tongue. The use of the national languages would not be affected by such study . . .

Esperanto . . . is greatly superior to any of the ethnic languages as a medium for scientific use. Any English-speaking person who has tried scientific writing in the international language is impressed by how vague, inexact and sloppy is English in comparison with the constructed language. French has the reputation for logic and clarity, but it cannot compare in that respect with the artificial language . . .

The principal difference between the constructed language and the natural languages is the smaller number of meanings attached to a given word in the constructed one. In this, the attempt is made to have only one meaning for each word instead of the dozen or more meanings sometimes associated with an English word . . .

The constructed language does not ideally attain this, but it does make for more exact scientific thought . . . (1).

As a single example of the innumerable ones that might be written, consider the preposition "of" and its equivalents in Esperanto:

- (1) Two of the . . . were inoperative. (el = part of a whole)
- (2) The cost of . . . is being reduced. (de).
- (3) Add 1.2 liter of water (da = measure of amount).
- (4) He was glad of it (pro = because of).
- (5) The article contains nothing of interest (No preposition is used in Esperanto).
- (6) The . . . was ordered by the City of Los Angeles (No preposition used in Esperanto).

. . . The use of a universal (auxiliary) language for all scientific publication . . . is as feasible as it is inevitable . . . Any engineer or scientist can help to bring it about by: (a) Learning the language. Excellent textbooks and dictionaries are

available, and classes are held in the larger cities. (2) (b) By teaching the language. Most people find it a fascinating subject. Even divorced from any practical application (3) it is excellent mental training, gives an insight into the structure of English and other tongues, is splendid preparation for the study of natural languages, and is fun. — Parry Moon and Domina E. Spencer: "Journal of the Franklin Institute", July, 1948.

- (1) "One word one meaning" has never been a rule of Esperanto. Practical usage and experience have opposed the idea, even as an ideal. However, the relatively few words in Esperanto with plurality of meaning, such as "tako", "kanono", "plumo", are so different in sense as to involve no misunderstanding, and are vividly used by reason of their internationality.
 - (2) In Australia today, as in most countries, Esperanto groups are to be found in many centres away from the "larger cities". There are 3597 appointed local representatives for Esperanto in 63 countries. (Yearbook of the U.E.A. 1969).
 - (3) No-one, having learned Esperanto, should feel a lack of opportunity for practical application. This is presented by the opportunity for teaching, socially addressing Esp. clubs, giving informative talks to church, league or similar bodies, and freely conversing in a neutral language with foreign Esperanto visitors who speak little or no English.
- Further, one may use the language profitably in writing to Esperantists in one's field of work or interest, and so gaining first-hand on-spot information. Readers, hobbyists, may exchange books, discs, tapes, and so on.—Editor.

OFICIALA INFORMILO

14an de Oktobro 1969

Novaj Individuaj Membroj

Cutler, S-ino B. M., Killara, N.S.W.
 Glover, S-ino M., Caloundra, Qld.
 Brimage, S-ro G. W., Tarooma, Tas.
 Simpson, S-ro W., Annerley, Qld.
 Taylor, S-ino D. G., Morwell, Vic.
 Taylor, F-ino G. M., Morwell, Vic.

Novaj Junulaj Membroj

MacRae, C-ro K., Morwell, Vic.
 Donaldson, S-ro R., Morwell, Vic.
 Gray, S-ro B., Morwell, Vic.
 Zomer, S-ro P., Morwell, Vic.
 Tongeren, F-ino M., Morwell, Vic.
 Boyd, F-ino K., Morwell, Vic.
 Mikosch, F-ino V., Morwell, Vic.
 Power, F-ino F., Morwell, Vic.
 McLeod-Dryden, F-ino C., Sale, Vic.

Donacoj al la Publiciga Fonduso

Jam anoncita \$482.87
 Einihovici, D-ro A. 2.00
 C.C.G. 1.00

\$485.87

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Interŝtata Konkurso

Poentoj donataj

Nova Individua Membro	5
Nova Dumviva Membro	50
Aliĝo al la Populara Kurso	2
Aliĝo al la Mezgrada Kurso	5
Aliĝo al la Altgrada Kurso	10
Sukceso ĉe la Elementa Ekzameno	2
Sukceso ĉe la Altgrada Ekzameno	5
Sukceso ĉe la Klereca Ekzameno	10
Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso	1

Stato je la 14a de Okt. 1969.

	Kvoto	Poentoj	\$
Queensland	130	333	256.1
Victo:ia	300	554	184.6
N.S.W. & A.C.T.	260	449	172.7
W. Australia	80	81	101.2
Tasmania	30	29	96.6
S. Australia	40	4	10.0

A.E.A. Ekzamenoj.

F-ino Desly Davies, Bouldercombe, Q.
 Elementa, kun honoro.

C. C. Goldsmith, Sekretario.

PERTH CONGRESS 1970.

7th List of Enrolments:

- 88-89 Cancelled.
- 90. Mrs. Maddern (V.).
- 91. Mrs. B. Cleminson (N.S.W.).
- 92. Mrs. R. I. May (N.S.W.).

FINNO PRI LINGVOJ

N. Kavenius (Turku) en letero:

"Dum la lastaj 20 jaroj la Finnoj montris pli da intereso pri la Rusa lingvo, tamen ĝi estas tre malmulte parolata inter Finnoj. En nia urbo (140,000 loĝ.) lau mia scio parolas ĝin ne pli ol 20 personoj".

"Parolas la Svedan ĉ. 8-10 p.c. de la Finnoj. La Estona lingvo similas al la Finna, kaj ni preskaŭ povas kompreni ĝin."

"En Germanujo mi spertis, ke strate, vilaĝe oni malofte trovas Angle-parolanton. En hoteloj, oficialaj centroj k.s. oni uzas la Anglan, sed certe ne ĝenerale."

En "I-O-E-Gazeto" li plendas pri sia plej proksima najbarlando — Svedujo. En Stokholm neniu Svedo komprenis la Finnán. Kial li ne komprenas la Svedan? la Svedoj mire demandis!

Piednote: Vojaĝante kun sia edzino en kelkaj landoj, ili facile parolis al E-istoj en ĉiu vizitata urbo.

PARLAMENTEJO: CANBERRA, 1913

Ni havas antaŭ ni raran ekzempleron de la 11-paĝa: Arhitektura Konkurso pri la Federacia Parlamentejo. Por la Aŭstralia Registaro presis ĝin Fratoj Peacock, 214 Queen Street, Melburno.

Ĝi estas en bona Esperanto. Supozinde faris ĝin Gerald Whiteford, ŝtatoficisto de la Departamento de Internlandaj Aferoj kaj delegito de la U.E.A. en Melburno. Li estis registrita en la Adresaro de S-ro Zamenhof (n-ro 19: 1908j.) kun numero 19294. La broŝuron oni presis ankaŭ en diversajn lingvojn kaj ĝin dissendis alvokite tra la mondo. Ĝia celo: trovi la plej bonan arhitekton en la mondo.

Ĉe la Esperanto-Kongreso en Canberra 1956 S-ro K. Linton trafe akcentis la rilaton de Esperanto al nia ĉefurbo federacia. La gajninto de la unua premio estis S-ro Burley Griffin, el Ĉikago. S-ino R. B. Bigelow instruis al li Esperanton en la klubejo en Melburno, kaj sekretario M. Cohen enkasigis lian kotizon.

La gajninto de la tria premio estis Franco, Albert Agache. Li legis artikolon pri la konkurso en Esperanto gazeto — supozinde verkitan de Fremi (Maurice Hyde) en "La Revuo" (Augusto, 1913). Tiu artikolo aperis en Esperanto antaŭ ol aperis similaj artikoloj en la Francaj gazetoj. La juĝ-rezulton S-ro Agache ricevis dank'al la sindonema S-ro Whiteford.

Esperantisto planis la strukturon ne nur de la Parlamenta Domo, sed ankaŭ la formon de la ĉefurbo mem. Oni komencis konstrui en 1913; haltigis ĝin la Mondmilito. Fine la bazŝtonon metis la Brita kronprinco en 1920. La registara sidejo estis definitive instalita en Kanbero en 1927.

Prave antaŭdiris "Fremi" en sia artikolo: "La konstruado de Canberra daŭros ion da tempo — ĝuste kiom da tempo, tion la homoj ne kuraĝas aserti".

(Referencoj: La Rondo, p. 122 Jan-Feb., 1956; Jan-Feb., 1967).

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La E-mondvojaĝanto S-ro W. K. Simpkins forlasis Perton 30/9, servoje al Suda Afriko. Dum lia vizito en nia urbo li faris kelkajn paroladojn al infanoj ĉe elementaj lernejoj de Subiaco kaj East Perth. Ni adiaŭis lin ĉe pikniko en King's Park, dimanĉe 28-a de Sept.

Nia jara ĉefkunveno okazos en nia klubejo (258 Mill Point Rd., South Perth) je lundo 8-a de Dec.

MELBOURNE: Nia ĉi-jara "Amerika Teo" okazis 29/9. Tridek membroj kaj amikoj ĉeestis kaj post vigla marĉandado, 2 loterioj kaj abunda vesper-maĝo la kasisto povis anonci ke la rezulto de la vespero estis \$49.91. (Lastjare 30 ĉeestantoj kontribuis \$54.50). La monon ni uzos por nia biblioteko kaj Ekipaja Fonduso.

"Novajoj el Esperantujo" estis la titolo de prelego de S-ro H. Koppel 6/10. Detalaj raportoj pri la Univ. Kongreso en Helsinko kaj la S.A.T. Kongreso en Novi Sad estis la ĉefaj eroj. "Kiamaniere plibonigi nian laboron por Esperanto" estis la titolo de diskutvespero, kiu okazis 13/10. S-ro Mrongovius faris plurajn bonajn proponojn, se nur sin prezentus gelaborantoj pretaj por plenumi la necesan ekstran laboron.

"Rememoroj de konduktoro", estis temo de vivplena kaj humora rakonto (20/10), el kiu evidentiĝis, ke nia S-ro H. Beechey tre takte kaj helpeme, kiel ankaŭ, laŭ neceso, ruzlerite deĵoris dum pluraj jaroj en Londono kiel aŭtobusa konduktoro. Memor-Vespero por D-ro Andrew Fridenberg okazis je 27-a de Okt. kune kun la Baha'i Komunumo, al kiu la mortinto ankaŭ apartenis. 34 personoj ĉeestis inter ili la vidvino S-ino L. Fridenbergs kaj 3 filinoj Rasma, Selga kaj Atika kun edzo Jim Rea. Pianludis Kim Bastin; parolis 2 Baha'i-anoj, S-ro E. McKenzie, Ges-roj Koppel kaj S-ro I. Maddern, kiu speciale alveturis el Morwell. Respondis ĉarme kaj emocie S-ino Fridenbergs per memorrakontoj pri travivaĵoj kun la edzo inter Bahaianoj kaj E-istoj en Danlando post la milito.

En la septembra RENDEVUO S-ro Kim Bastin prelegis pri "Lingvistiko", scienca studo pri lingvoj. La komencpunkto por la studo estas la gramatiko, kiu originis ĉe la grekoj.

Generala Kunveno de A.E.A.

La Generala Kunveno de A.E.A. okazos en la kadro de la 17-a Aŭstralia E-Kongreso en "Forrest House Motel", 221 St. George's Terrace, Perth, je mardo, 6.1.1970 kaj ĵaŭdo, 8.1.1970.

Tagordo:

- (1) Jarraportoj de la Asocio
- (2) Elekto de nova Estraro
- (3) Proponoj de membroj kaj kluboj
- (4) Estonta agado de la Asocio
- (5) Loko ne la 1972-a Kongreso
- (6) Eventualajoj

Kluboj kaj individuaj membroj sendu proponojn por la Gen. Kunveno kaj nomojn por la nova Estraro ĝis 20-a de Dec. 1969 al A.E.A., P.O. Box 415 Manly, 2095. NSW. Elektendaj estos Prezidanto, 2 Vic-Prezidantoj, 2 Sekretarioj, Kasisto kaj Public-Oficisto. (Skribita konsento de nomito estos necesa!)—C. C. Goldsmith, Sekretario; Herbert Koppel, Vic-Sekretario.

GROSJEAN-MAUPIN

Al la Redaktoro de La Suda Kruco: Estimata Sinjoro,—Mi volonte respondas al via letero. Mi rimarkigas, ke la mallongigo **k** anstataŭ **kaj** ne estas elpensita de mi; ĝenerale mi mem ne tre ŝatas **kaj** ne uzas tiajn mallongigojn, sed mi tamen opinias, ke ĉiu ajn rajtas uzi la mallongigojn, kiuj plaĉas al li, kondiĉe, ke li avertu pri ilia signifo. Plie mi kredas, ke aparte en teknikaj verkoj **kaj** en vortaroj, mallongigoj povas esti oportunaj kaj permesi sufiĉe gravajn spacoŝparojn.

Rigardante la uzadon de mallongigoj ne kiel devigan oficialan regulon, sed kiel privatan liberan konvencion, mi tute ne povas kompreni la gravecon, kiun kelkaj esperantistoj asignas al tiu ĉi demando pri mallongigoj.

La uzadon de la signo **&** anstataŭ **kaj** mi ankaŭ proponis, sed mi konas nenian specialan nomon por tiu ĉi signo, nek en la franca lingvo, nek en aliaj lingvoj. Simpatian saluton: Prof. E. Grosjean-Maupin, Wavrans-sur-Ternoise par St. Pol (Pas de Calais) 2/9/33.

La signo **&** estas Angle nomata "ampersand". Vidu: Oxford English Dictionary.

Grosjean-Maupin (1863-1933) estis tre granda Esperanta leksikologo. Li estis la ĉefa aŭtoro kaj la direktanto de la fama Plena Vortaro. En sia "Eseoj", Prof. G. Waringhien, lia kolego, prezentas amegan sinceran tributon al la majstro.

"ELENO VINFERO" ?

Cu iu povus informi nin pri la signifo de tiu plumnomo,

Ĝi estas tiu de nia kara samcelano L. N. Newell. Kio lin motivigis elekti ĝuste tiun nomon?

LATIN AND ENGLISH

That English is a most difficult language to learn lucidly, correctly and concisely is absolutely true; but that no one can so use it who is not well grounded in Latin is only partly true.

Bunyan, who was not well grounded in Latin, wrote a more classical English than Bentley, who was. Dickens, who was not well grounded in Latin, is a more correct and shapely writer than Thackeray, who was. Jane Austen, not well grounded in Latin, wrote a more correct and concise English than Scott, who was. Mark Twain, not well grounded in Latin, wrote a much finer-edged prose than Swinburne, who was. Bernard Shaw, likewise with little Latin, wrote as keenly and concisely as Ma: Beerbohm, a Latinist.

Many whose classical grounding is indubitable have written atrociously.—"English for the English": G. Sampson.

The late A. E. Housman at his appointment as professor of Latin at Cambridge dismissed the specious reasons put forward for the study of Latin, namely that it improves your English, which it by no means necessarily does, or improves your taste in poetry, which a knowledge of Latin and Greek failed to do for Bentley, or refines your taste and character, which again it certainly has not done for many great scholars.

He came to the conclusion that the final justification of Latin study, as of any other, is that it is one of the paths along which you may enjoy the pursuit of knowledge for its own sake.

All men possess by nature a craving for knowledge . . . and the pleasure of discovery differs from other pleasures in this, that it is shadowed by no fear of satiety on the one hand, or frustration on the other. Other desires perish in their gratification; but the desire for knowledge never. — Sir Herbert Grierson: Rectorial Address, Edinburgh, 1937.

It used to be said that the only people who had a profound knowledge of English language and literature were those who had devoted their lives to Latin and Greek. What truth there was behind that generalisation derived partly from the assigning of Latin and Greek to the best brains in the community, and partly to the constant analysing of passages from English prose and poetry involved in the turning of them into the ancient languages. — "New Tongues": Alison Peers; 1945.

(Such positive benefits as are here ascribed to Latin are strikingly evident in Esperanto by reason of its structural simplicity and logical expressiveness.—Editor.)

1009

Jen la nombro de informpetoj pri Esperanto ricevitaj en la oficejo dum la nuna jaro ĝis la 14e de Oktobro. Tre bona, ĉu ne? Sed mi memoras, ke kiam mi unue alvenis en Aŭstralio iu diris al mi, ke oni certe ne povos interesi Australianojn pri la internacia lingvo.

Mi tre volonte agnoskas la grandan helpon kiun mi ricevis de nia Publiciga Oficisto, s-ro H. V. Petley, sed la granda plimulto estis rezulto de la distribuo de la verdaj kartoj. Interesa estas la fakto, ke tre multaj venis el distriktoj kiuj estas cent mejloj, aŭ eĉ pli, for de iu regiono en kiu loĝas membro. Supozeble multaj el tiuj estis pro la simpla enmeto de verdaj kartoj en leterojn al amikoj aŭ klientoj. Tiun planon mi rekomendas al ĉiu leganto; estas plej bone ne mencii la aferon — simple enmetu karton.

Tamen, malgraŭ tiu bona komenco mi ne estas kontenta, ĉar mi estas certa, ke malpli ol kvarono de niaj membroj helpis en tiu distribuado. Se ĉiu estus farinta tion, povus esti ke la nombro ĉe la supro de ĉi tiu alvoko estus multe pli granda, kaj la posta efiko multe pli bona. Ni ne nur ricevis informpetojn, ĉar multaj el la ricevintaj de nia broŝuro aliĝis al la korespondaj kursoj aŭ al lokaj kluboj.

Sekve mi denove petas vian helpon. Mi ne petas monon, sed vian kunlaboron — se oni povas vere nomi tiun agadon "laboro". Ne lasu la aferon ĝis morgaŭ, aŭ vi preskaŭ certe forĝos ĝin. Sendu letereton aŭ poŝtkarton al A. E. A., P.O. Box 415, Manly, N.S.W., 2095, dirante kiom da verdaj kartoj vi deziras, kaj ni tuj plenumos la mendon. Tiel vi helpas al la progreso de nia movado en Aŭstralio, kaj al la plifortigo de nia Asocio.—Tajni Goldsmith.

LA UNUA . . .

La unua broŝuro pri Esperanto aperis en 1887: Rusa, 40 paĝa, titolita "D-ro Esperanto. Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro . . ." En ĝi estas du originalaj poemoj kaj traduko de poemeto (el Heine), la unuaj E-aj literaturajoj.

La unua broŝuro en Esperanto aperis en 1888: "D-ro Esperanto. Dua libro de l'lingvo internacia".

La unua prozaĵo estis tradukajo de Grabowski, "La Neĝa Blovado" (1888).

La unua originalajo: prozaĵo "Marko Kraljevič" de M. Abegus. Premiita en la Literatura Konkurso de 1896, ĝi aperis libre en 1897.

La unua Esperanta gazeto: "La Esperantisto" (1889-1895). Pliajn detalojn oni trovas en "La Suda Kruco", Dec. 1922. Jarlibro 1927 (UIEA).

A DUAL-PURPOSE STAMP

In the Melbourne press (2/10/39): A Victorian girl got a letter from a friend in Germany with a message that escaped the Nazi censor's eye. The clue lay in a sentence at the end of the letter: "Do you still follow your hobby of stamp collecting?" Not a collector of stamps, and not having mentioned philately in her letters, the girl was puzzled. A friend wisely detached the stamp from the letter. Under it was written the message — in Esperanto.

ANGLA KAJ FRANCA

"Por tutmonda rolo la prononco estas por la Angla la plej granda obstaklo. Malgraŭ ĝia simpla gramatiko, ĝia frazarango, vortordo kaj esprimmaniero estas ofte karakterizataj de specialaj uzoj ĉe apartaj okazoj, pri kiuj la lernado estas longa kaj atentopostula." (Meillet).

"La Angla lingvo havas tre difinitajn kaj kompleksajn gramatikojn kun iom da varioj laŭ la sociaj grupoj en kiu ĝi estas parolata". (Prof-o R. Quirk, Londona Uni., "The Use of English").

"La Franca konjugacio havas 2265 diversajn formojn en sia entuteco". (De Beaufront).

"La (Franca) verbo estas la plej granda obstaklo al nia koloniigado". (Generalo Faidherbe).

KUIRI: "Prepari nutraĵojn, elmetante ĝin al fajro, ĝis ĝi iĝas manĝebla" (P.V.). Unu ekzemplo: "kuri teon (Z.)" Ĝis manĝebleco?

ESPERANTO STAMP OF 1926

In Moscow that year assembled the 6th International Congress of Proletarian E-ists. An Esperanto stamp was issued for it. On the stamp appears the Obelisk of Liberty round which is an ellipse along which there is inscribed in Morse alphabet Russian and Esperanto the words: Workers of the world, unite. Many seeing the stamp must have failed to notice the tiny text, which under a magnifying glass is faintly visible. (Informilo IEMW, Vieno).

PARALLEL TRANSLATION

If I err in believing that the souls of men are immortal, I err willingly. Nor would I have this error which enchants me, torn from me while I live. But if, when I am dead, I know nothing, as some minute philosophers suppose, I shall not fear that dead philosophers will mock me.—Cicero.

Rakontante plu ŝi diris:

"Filon havis mi. Foriris

Li kaj velis for en barko

— dronis ve apud Denmarko.

Vi vidas min al urbo Hull alveni,

Por liajn vestojn kaj ceterajn preni."

Se mi eraras, kredante, ke la animoj de la homoj estas senmortaj, mi eraras volonte. Kaj mi ne deziras, ke tiu eraro, kiu ravas min, estu forprenita dum mi vivas. Sed se, mortinte, mi jam ĉesos konscii, kiel supozas iuj etaj filozofoj, mi ne timas, ke mortintaj filozofoj min mokos..

And thus continuing, she said:

"I had a son, who many a day

Sailed on the sea; but he is dead.

In Denmark he was cast away;

And I have travelled far to Hull to see

What clothes he might have left, or other property."

—Wordsworth.

LINGVAJ NOTOJ

Pantalonoj: Levidoj 16/4, 6/10 La Majstro eble erare uzis ĝin plurale laŭ la Slava maniero. Wingen rimarkigas pri la Germana pluralo Hosen. Ĉu oni devas konkludi, ke la pastroj surhavis plurajn pantalonojn?

—Transo: Oni povas diri pri regiono situanta transe, ke ĝi estas transo, simile kiel por "supre", supro. "Transo" ofte suficas anstataŭ "transejo", "transaĵo", "transeco", laŭ la principo pri neceso kaj sufiĉo.

Bati, frapi: Frapi, laŭ Wuester, estas malpli forta ol bati. Ĝi krome estas plinuence uzebla, en figurecaj kunteksto, kie "bati" ne taŭgas (ekz-e, "la vortoj, pensoj frapis min), sed en ilia ĉefa (fizika) signifo ili samsencas.

Aĝo: Ne diru pri nemaljunaj homoj. "Si estas pli maljuna ol sia fratino", sed "ŝi estas pli aĝa ol sia fratino". Povas esti, ke la pliaĝa fratino tute ne estas maljuna.

Fizologie la vivstadioj estas: bebeco, infaneco, adoleskeco (puberiĝo ĝis edziĝebleco), adolteco, maljuneco (Wuester).

MINIMUMA PENO

La leĝo de minimuma peno kontraŭstaras la formojn: aliatempe, aliamaniere, aliaokaze k.s. kiujn oni eltrovis por ke oni akcentu la ĝustan anstataŭ la malĝustan silabon, kiel oni ofte faras, dirante: Alitempe, Aliamaniere, Aliokaze. Pro la aldonita A oni estas devigata akcenti la ĝustan silabon: allateme, Allamaniere, k.s. Bona solvo, sed — la vorto fariĝas

unu silabon pli longa kaj sekve postulas iom da peno, ne multe, sed por la oportunema homo sufiĉe por ĝin rifuzi.

Waringhien ("Sennaciulo" 2/48) en recenzo de "E-o 60-jara" demandis: "Kial la aŭtoro uzas la nekutimajn: aliavorte, alialingvanoj k.t.p. anstataŭ la ordinaraĵ: alivorte, alilingvanoj?"

JESUO, JEZUO?

El 29 lingvoj 22 literas la nomon per S. 2 per S prononcata J, kaj nur 5 per Z. Enkalkulante aliajn lingvojn, oni povus plilongigi la S-liston. La internacia literado estas sendube per S.

La sola formo uzita de Zamenhof estas Jesuo (Rabistoj 7/1). Ĝi estis oficialigita per la 3-a Aldono al la Univ. Vortaro en 1921.

PRI "SIA"

"Ĝis lia malsano li frekventis la borson" Ĉu "lia", aŭ "sia"? "Sia" estas gramatike korekta. Tamen "lia" estas tiel same klara, do bona, ĉar neniu alia homo estas menciita en la kunteksto. Se temus pri alia, oni uzu ties nomon, ekzemple "la malsano de Johano". Denove efikas la leĝo de minimuma peno.

La uzado de "sia" estis enkondukita en Esperanton nur pro motivo de klareco. Ofte en la literaturo oni trovas komplikajn uzojn de la refleksivo: ekzemple Fundamenta Krestomatio 108/15; Kronikoj I: 5/7; Rabeno de B. 13/14; Reĝoj II: 10/3; Agoj 7/10; F. K. 139/9 kaj multe alia

Studu Vortaro de Millidge sub "sia"; raporto de Lippmann, 1926; "Personaj Pronomoj" de Kenji Ossaka, 1953. Entute la refleksivo iufoje prezentas, eĉ por plej bonaj verkistoj, problemon ne rapide solveblan.

ONI(N)

"Akuzativo kaj pronomo poseda (onin kaj onia) estas per si mem formoj tute regulaj . . . Nur en la **praktiko** oni ĝis nun ne uzadis ilin, ĉar preskaŭ en ĉiuj plej gravaj lingvoj la vorto "oni" ne ŝanĝiĝas, kaj la akuzativigo kaj adjektivigo de tiu ĉi vorto sonus tre strange en la oreloj de la plimulto de la Esperantistoj. Sed en Esperanto la 'nekutimeco' ne prezentas gravan kaŭzon por neuzado; tial, kvankam mi persone ĉiam evitas la diritajn formojn, tamen, se iu ilin uzas, mi neniel povus vidi en tio ĉi ian pekon kontraŭ la reguloj aŭ kontraŭ la komuna spirito de nia lingvo."—Zamenhof, 1907.

ADOLTA, ADOLT(U)LO?

"Adolta" (=maturaĝa, edziĝebla pro aĝo) estas nova vorto, ankoraŭ ne en tre ĝenerala uzado.

Waringhien kaj Wells: adolta, adoltulo. Butler: adolta, adolto. Rossetti en "Esperanto", 2/69, p. 31, nomas erara la unuan derivon, implice aprobante la Butleran.

Nu, tio estas diskutinda, dubinda. "Adolt" estas evidente **adjektiva radiko**, sekve tial oni uzu -ul ĉe la derivita substantivo, analogie kun "feliĉa", "dika" kaj ĉiu alia adjektiva radiko.

La afero ŝajnas tute klara. Rossetti iom moketas la longan formon "adoltulino" por substantivo, kaj verdire oni devas supozi, ke fine E-istoj instinkte uzos la vorton "adolto" por la substantivo persona, sekvante la leĝon de "minimuma peno". Tio estus bedaŭrinda ĉe la adjektiva radiko. Prefere oni klasifu la radikon "adolt" substantiva: **adolto**, adolta.

COPPEE AND ESPERANTO

The "British Esperantist", March 1912, has the following quote:

"The spread of Esperanto will preserve the national languages from that mutual penetration which is daily having so corrupting an effect upon them, in consequence of the increasing intimacy of contact between the different peoples". So spoke the famous French poet.

La disvastiĝo de Esperanto garde konservas la naciajn lingvojn kontraŭ tiu reciproka interpenetriĝo, kiu ĉiutage tre koruptas ilin pro la kreskante-intima kontaktado inter la popoloj.

VJETNAMO

Mi ekspedus libretojn presitajn en Vjetnamo al petintoj, kontraŭ afranko.—Red.

PLUM-ERARO

Sur frontpaĝo de N-ro 78 legu: "De post 1920 manpleno . . ." Nepre vin turnu al p. 280, kie vi legas, ke "La Suda Kruco" fondiĝis en 1920. Bibliografoj nepre notu.

RECENZOJ

"**Biblia Revuo**", N-ro 3 (Majo-Junio). Dumonata, 62 paĝoj

Cefaj artikoloj: La Sumer-Akada Dio Anu (H. Wolstein). Esploro pri la mitoj de la tria jarmilo antaŭ-Krista. Pro ĝia esotora naturo, nur homoj jam havante tiufakan scion digestos la kleran pritrakton. La Trian Tagon: rimarkinda studo pri la releviĝo de Kristo (D. Broadribb). Analize komparite la raportojn de la kvar evangelioj kaj klarigite la Jud-Kristanan pensadon de tiu tempo, la aŭtoro pasas al la nuntempa teologia vidpunkto. Hall Caine en sia giganta "Vivo de Kristo" (1938) pritraktis la problemon ankoraŭ pli detale kaj lau simila temperamento kiel tiu de la liberala pensulo. A. Duranti kontribuas dokumentitan studon pri Kana Galilea. La revuo informas, ke nova traduko de la Biblio en la Kataluna jam aperis. La Katulana ne estas Hispana dialekto, sed lingvo simila al la Provenca.

Sub redaktoreco de Dr. D. Broadribb oni projektas novan tradukon de la Biblio en Esperanton, farotan de komitato da kleruloj ĉiufakaj: antikve-lingvaj, arkeologiaj, historiaj, Esperante-stilistaj. Gi enhavos notojn; la tuta teksto estos "sen eklezia tendenco".

Abonoj: Dr. D. Broadribb, Dept. of Eastern Studies, Univ. of Melbourne, 3052.

ESPERANTO PONTO

La unua ponto Esperanta en la mondo, "Esperanto" en Karlsruhe.

SAARBRUECKEN

La flozofia fakultato de la Universitato enkondukis Esperanton kiel oficialan studobjekton.

"FLOAT"

"A float beautifully decorated with flowers": = Parad-ĉaro bele dekoraciita per floroj. Certe ne: flotajo. (Vidu: floto, P.V. sup.).

PROF. J. REGULO

In an address to the Spanish Esperanto Congress he stressed the necessity of getting Esperanto into universities and seminaries, where the educators are made. As professor of Esperanto in the Institute of Languages at the University of La Laguna, he attested the difficulty of first acquiring a provisional or trial period of Esperanto instruction, and then of gaining the founding of a chair and of normal courses. In Spain only La Laguna has this normal instruction, thanks to special circumstances. He added that, as far as he knew, there is no chair of Esperanto in the world, which would grant the titles of Licentiate and Doctor of Esperanto Philology.

Up to now we have succeeded only in being able to teach the language, sketch the history and, principally, the original literature. Such is the situation in most of the universities where Esperanto has gained some footing, and lecturers are able to serve.

In Hungary Esperanto has been accorded at university level the right of a complementary or facultative language for philological diplomas bearing inscription that Esperanto has equality with other tongues of the same category.

While not under-estimating the value of general propaganda, he emphasised that only by success in educational circles will our Movement reach its goal. When in philology chairs of Esperanto are accorded equality with others in that science, only then we may with confidence approach parliamentary commissions with evidence based on firm expertise and free from need to refute the criticism of linguists and professors who know little of our Movement, or who regard it with prejudice; this has often militated against our efforts in the past.

Some years ago we began to remedy the situation with the issue of "Esperantologio"; now we have "La Monda Lingvo-Problemo" supplemented by monographs on the subject.

Prof. Regulo closed by repeating his beliefs that the key to victory lies in the hands of the academics. Towards these should our best efforts be turned. — "Boletín", Zaragoza.

(On this theme see: "Esperanto", 9/66, 4/69, "British Esperantist" 6/67; The A.E. 5/63 (p.227), 3/67 (p.160), 3/68).

LAPENNA IN HELSINKI

From his Esperanto speech at the E-Congress there:

(Translated).—At the recent conference on treaty jurisprudence in Vienna, Ambassador Ralph Harry, representative for Australia—an English-speaking country—stressed the importance of a single language for diplomacy and emphasised the outstanding qualities of Esperanto.

Man has succeeded in putting his feet on the barren surface of the Moon itself—a feat both amazing and admirable in its courage and audacity, an epoch-making achievement of which not only America but all men are justly proud. For it has shown once again that the human intellect is capable of conquests over Nature verging on the miraculous, using natural laws for its own ends. The time must come when that self-same Man shall be able to visit lands other than his own and understand his neighbor; that the master of the world shall cease to be deaf and dumb in foreign-language areas; when he shall understand and be understood in every corner of the earth. ("Esperanto", 9/69).

WROTE BERTRAND RUSSELL:

"After a meeting in Rome in 1955 I was held up by a man almost in tears because he had not been able to understand what had been said because he spoke no English. He besought me to translate what I had said into Esperanto. Alas, I could not." — Autobiography, 1944-1967. Vol III, p. 73. Cited in "British E-ist", 10/69.

Korektu: p. 288: La kotizo MA (UEA revuo "Esperanto") estas 7.50 (ne: 6.50).

AŬSTRALIO, -ANO

Oni rimarkas tie kaj aliloke en presajo la malgustajn formojn: Aŭstralujo: Aŭstralo (la enloganto), ekz-e, La Revuo Orienta, Okt. p. 314; Aŭstralujo. Leteroj de E. Lanti, p. 222, 224 k.a. Aŭstraloj. Sed p. 214 li korekte skribis: Aŭstralio! (La Rondo, 12/54, 1/56).

La formo "Aŭstralio" estas pure Zamenhofa, kaj datigas jam de la Listo de Propraj Nomoj en la "Jarlibro Esperantista", 1897.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road

Willoughby, N.S.W., 2068

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 80 (160)

MELBOURNE

Decembro, 1969

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

14an de Novembro 1969

Novaj Individuaj Membroj

Hunt, S-ro H. R., Mendi, T.P.N.G.

MacDonnell, S-ro F., Brisbane, Qld.

May, S-ino R. I., N. Narrabeen, N.S.W.

Russell, S-ino S. A., Charleville, Qld.

Novaj Junulaj Membroj

Bellman, F-ino M., Morwell, Vic.

Bullen, F-ino G., Morwell, Vic.

Perkins, F-ino R., Morwell, Vic.

Donacoj al la Publiciga Fonduso

Jam anoncita \$485.87

C.C.G. 1.00

Melbourne Esp. Soc. 10.00

\$496.87

Adresaro

Ni baldaŭ pretigos novan Adresaron. Por certigi, ke ne estu eraroj en ĝi, bonvolu sendi al ni senprokraste la jenan informon.

Klubo: La nomojn kaj adresojn de la Prezidanto, Sekretario, Kasisto, kaj Libroperanto, kaj la lokon, tagon, kaj horojn de viaj kunvenoj.

Membroj: Se vi translokiĝis kaj ne informis nin, bonvolu tion faru nun, sed tre klare skribu la novan adreson. Se vi sukcesis en iu ekzameno pri Esperanto pri kiu ni ne estas informita, bonvole sendu informon pri kiu ekzameno kaj kiam.

Tiujn informojn sendu al Aŭstralia Esperanto-Asocio, P.O. Box 415, Manly, N.S.W. 2095.

Oportuna okazo

Nun ĉe la komenco de nova jaro, estas la plej taŭga momento varbi novajn membrojn por nia Asocio; aligiloj estas haveblaj kontraŭ peto. En 1969 la membraro kreskis proksimume 50%; helpu ke ni tion faru ankaŭ en 1970, ĉar tio donus al ni firman bazon, kaj certigus la regulan aperadon de nia gazeto. Ni nun progresas, sed se ĉiu Esperantisto en la lando estus membro, tio multe helpus al ni influi la edukajn aŭtoritatojn. Al tiuj personoj NOM-

—C. C. GOLDSMITH, Sekretario.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Interŝtata Konkuro

Poentoj donataj

Nova Individua Membro 5

Nova Dumviva Membro 50

Aliĝo al la Populara Kurso 2

Aliĝo al la Mezgrada Kurso 5

Aliĝo al la Altgrada Kurso 10

Sukceso ĉe la Elementa Ekzameno 2

Sukceso ĉe la Altgrada Ekzameno 5

Sukceso ĉe la Klereca Ekzameno 10

Ĉiu \$1 al la Publiciga Fonduso 1

Stato je la 14a de Nov. 1969.

	Kvoto	Poentoj	%
Queensland	130	357	274.6
Victoria	300	589	196.3
N.S.W. & A.C.T.	260	465	178.8
W. Australia	80	81	101.2
Tasmania	30	29	96.6
S. Australia	40	4	10.0

A.E.A. --- Ekzamenoj.

F-ino Desly Davies, Bouldercombe, Q.

Elementa, kun honoro.

"Neniu iam legis ĉiujn verkojn de Alexandre Dumas — eĉ ne li mem". — (Schaap in "Time", 9/9/69).

"TINY" fariĝis 80 - jara



S-ro Cecil C. Goldsmith, Gen. Sekretario de A.E.A. festis sian 80-an naskiĝtagon je la 16-a de Novembro. S-ro Goldsmith, kiun ĉiuj karesnomas "Tiny" (Etulo) naskiĝis en Gloucester la 16-an Nov. 1889. 18-jara li

esperantiĝis en Birmingham. Dum la 1-a mondmilito li estis oficiro en la brita armeo kaj grave vundiĝis en la batalo de la Somme en Sept. 1916. Dum 2 jaroj li devis resti en hospitalo. Post la milito "Tiny" reiris al Birmingham, fariĝis sekretario de la loka klubo kaj organizis la Britan E-kongreson en 1920. La Mezlanda E-Federacio, kies sekretario li estis, nombris tiam 300 membrojn. Dum kelkaj jaroj li instruis E-on ĉe la granda fabrikejo de ĉokolado Cadbury.

En la jaro 1926 S-ro John Merchant, la tiama B.E.A. Prezidanto, telegrafis al "Tiny", petante ke li akceptu la postenon de Administranto de B.E.A. Feliĉe por BEA li akceptis kaj en 1934 li fariĝis Sekretario, kiam la tiama sekretario, S-ro M. Butler, akceptis la postenon de Eduka Sekretario. Pere de la asocia aŭtomobilo "Tiny" vizitis multajn grupojn, federaciojn kaj lernejojn tra Britujo, vendis multajn librojn kaj faris multan propagandon por nia afero.

En 1927 C.C.G. fondis la "Esperanto Publishing Co. Ltd.", kies unua sekretario kaj direktoro li fariĝis. Tiu plej granda E-eldonejo en la angle parolanta mondo multe helpis la movadon per eldonado de lernolibroj, vortaroj kaj literaturaj verkoj.

En 1936 okazis skismo en U.E.A. kaj S-ro Goldsmith fariĝis la unua sekretario de la nova Internacia E-Ligo, kies ĉefsidejo estis ĉe Heronsgate, Rickmansworth. En 1939, pro la milito, BEA ankaŭ iris al Rickmansworth kaj kiam la tiama BEA-sekr., S-ro Wilkinson, devis militservi, "Tiny" akceptis la grandan taskon fari la grandan laboron de la 2 organizoj. Post la milito, en 1947, UEA kaj IEL reunuiĝis kaj C.C.G. fariĝis Sekretario de U.E.A. ĝis lia emeritiĝo en 1954. Dum sia multjara laboro por Esperanto "Tiny" organizis 3 Universalajn kongresojn (Oxford 1930, London 1938, Bournemouth 1949) kaj almenaŭ 10 britajn kongresojn.

Kompreneble, C.C.G. neniam emeritiĝis de E-laboro. Li daŭrigis sian laboron

kiel direktoro de la Esperanto Publ. Co. En 1965 li decidis viziti siajn amikojn en Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Kiel gasto ĉe nia kongreso en Canbera (1966) li instigis la Manly-anojn organizi kongreson en 1968, promesante reveni el Anglujo por helpi ilin. Ĉe tiu kongreso li akceptis el miaj manoj la postenon de A.E.A. Sekretario, kiun li tiel sperte nun plenumas.

Ĉe la klubkunveno de la Manly-klubo, 20-a Nov., F-ino Audrey Dennys, nome de A.E.A., transdonis al S-ro Goldsmith ledan tekono. Kortuŝite li akceptis la donacon, sed modeste respondis ke li estus pli kontenta se oni estus uzinta la monon por asociaj celoj.

Al "Tiny" ĉiuj A.E.A. membroj gratulas, deziras longan vivon kaj daŭran laboron por nia afero.—Herbert Koppel, Melbourne.

17th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4th to 9th January, 1970, Perth, W.A.
7th List of Enrolments

- No. 88 Mr. W. Wybenga, Morwell, Vic. (non-attending)
No. 89 Mrs. W. Wybenga, Morwell, Vic. (non-attending)
No. 90 Mrs. I. T. Maddern, Morwell, Vic.
No. 91 Mrs. B. Cleminson, Harbord, N.S.W.
No. 92 Mrs. R. I. May, Sydney, NSW.
No. 93 Mr. H. W. Gilbert, Hawthorn, Vic.

State Distribution: W.A., 25; Vic., 22; N.S.W., 13; Q'ld., 5; S.A., 2; Tas., 1.
Total: 68. Mail last-minute enrolments to the Congress Secretary, W. H. Howard, 31 Donegal Road, Floreat Park, W.A., 6014.

OSCAR WILDE: BALADO

Erara estas aserto, ke li verkis la Baladon de l'Prizono Reading dum li sidis en malliberejo. En la karcerejo venis al li la ideo; sugestis ĝin la pendumigo de viro tie en Julio, 1896. Li komencis verki la poemon ĉe Berneval (Francujo) en 1897. La 14-an de Oktobro tiujare li skribis: "Mi jam finis la grandan poemon —600 versojn". Gi oficiale publikigis la 13-an de Feb., 1898 (Dimanĉon) kaj estis vendeje havebla la sekvanta tagon. Esperanta traduko (de L. Newell) aperis en "Norda Prismo" n-ro 2, 1967. En ĝi: 378 versoj.

Simila erardiro ofte ripetigas, nome, ke Cervantes faris sian verkon "Don Kihoto" en malliberejo.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: "La Nigra Cigno", organo de la E-ligo, nia kutima fonto de novaĵoj, NE alvenis ĝis la redaktofino de ĉi tiu raporto (19/11/69).

MELBOURNE: Sian kutiman "mik-spotan" programon 3/11 S-ro F. R. Banham komencis per recenzo pri la granda romano 'Les Miserables' de Victor Hugo, kiun li nomis unu el la plej grandaj verkoj de la homa imagopovo. Per "Mia Kristnaska Pudingo" li provizis kaj humoron kaj kuriozan recepton por pudingo kaj kuko en unu potu. Sekvis aliaj rakontoj kaj traktatoj pri la karaktero de D-ro Zamenhof.

F-ino A. Hearn 10/11 priskribis aventurojn inter E-istoj transmare, inkluzive sian restadon ĉe la Internacia Altlernejo en Helsingor. S-ino Fay Koppel 17/11 prezentis tradukitan artikolon pri la unua koncerto de Yehudi Menuhin ĉe Carnegie Hall (Novjorko) kaj montris bildon de preĝejo en Gstaad (Svisujo), kie okazas ĉiujare muzikfestivalo de tiu mondfama violonisto. Poste S-ro H. Koppel donis informon pri diversaj tutmondaj E-organizaĵoj.

Pli serioza temo ol kutime estis areto da kortuŝaj rakontoj ("Diru ĝin nun", "La ĝojo ĉeesti" kaj "Larmoj") legitaj de S-ro K. Linton ĉe la oktobra RENDEVUO. Li provizis materialon por serioza pensado kaj eble pli zorga, komprenema traktado kun frathomoj.

La karavano al Perth, organizita de S-ro H. Koppel, konsistis el 16 E-istoj el Melbourne (13), Adelaide (2) kaj Launceston (F-ino E. Minton). Ili forlasos Melburnon per vagonaro je 1-a Januaro kaj alvenos en Perto je 4-a Jan.

SYDNEY: S-ro F. Mueller-Sorau, la "libromanĝemulo" alportis, 13/10, s'an "manĝaĵon". Li parolis pri la plej diversaj libroj, kiujn li dum sia vivo aĉetis, la plej multekostan, la plej malmultekostan ktp. La plej multajn li fakte legis. S-ino E. Brandman, estrino de muziklernejo, parolis 20/10 pri "Spertoj en muzikedukado." Post la parolado 3 gefratoj, studentoj en la muziklernejo, tre bone ludis gitaron kaj akordionojn.

Muzika kaj teatra vespero okazis 27-10, aranĝita de la Manly Dramgrupo kaj S-ino E. Brandman. Denove ĉeestis 2 muziklernantoj kaj la filo de S-ino Brandman, Tre sukcesa vespero. Je 10/11, S-ino V. Schlesinger legis el la libro VIVO kaj opinioj de Majstro M'Saud.—VOLO.

MANLY: Dum la pasintaj 5 monatoj membroj de Manly Esp. Klubo ĝuis bone

aranĝitajn programojn. De tempo al tempo gesamideanoj el la Sidneja Societo vizitis niajn kunvenojn el la Vespera Lernejo kaj prelegis pri interesplenaj temoj. Inter tiuj gast-parolantoj estis S-roj J. Matasin, V. Guelting, T. Elliott, F. Mueller-Sorau, V. Bourlin, V. Demovitz, S-inoj E. Matasin, kaj M. Chaldecott. Elstare lerta "prelego" pri D-ro Zamenhof prezentis S-ro F. Banham el Melbourne. Al ĉiuj vizitantoj ni kore dankas pro pensigaj programoj.

El niaj propraj membroj parolis S-ro P. E. Schwerin pri eksterlanda vojaĝo al la Monda Kongreso en Helsinko kaj pri kontaktoj kun Esp-istoj en 16 landoj; ŝerce rakontis S-ro R. G. Robertson pri sia vivo; prelegis pri lingva scienco S-ro K. Smith; rakontis ĉiu ano pri sia plei perferata libro; montris, pridiskutis kaj vendis E-ajojn el nia biblioteka ŝranko S-ino K. Morrison; prezentis son-bendigitan muzik-programon S-ro G. Thatcher klarigis pri man-fabrikado de bambuflutoj F-ino D. Taylor kaj poste ludis 4 el niaj flut-muzikantoj; prezentis 3 teatraĵojn nia Drama Grupo reĝisorita de S-ino M. Liston.

La naŭa ĉiujara afer-kunveno okazis 19/6. Prezidis Alderman F. Preacher. Elektigis: Prez. M. Duncan; Vice-Prez. F. Preacher kaj K. Smith; Sek. O. Russel; Kas. L. Jullie.

Tri kursoj okazis ĉiujarde ĉe la Vespera Lernejo: elementa 7-9 p.t.m. gvidata de S-ino B. Cleminson; progressa 7-8.15, S-ro R. G. Robertson; altgrada 7-8.15, F-ino F. Cardale. Sekvis klub-programoj 8.30 - 9.30.

La tag-jurnalo "Manly Daily" favore raportis pri Esp. programoj prezentitaj de P. Schwerin, M. Liston kaj V. Bourlin.

Ĉiuj anoj kiuj studas per koresponda kurso (inkluzive de la altgrada traduka kurso de S-ro F. Banham) rekomendas al aliaj Esp. studentoj ĉi tiun metodon de lernado — M. Duncan.

BRISBANE: Nia societo partopronis per granda veturilo en la "Warana" procesio. Sur la veturilo estis grupo de belaj fraŭlinoj, kaj S-ino Violet Yowe alte tenis la grandan verdan flagon.

Vizitis nin 22/9 gedoktoroj Rosa kaj Jaime Scolnik el Cordoba, Argentino. Hazarde ankaŭ ĉeestis S-ro Buswell el Adelaide, kaj ni havis treege interesan vesperon. La gefratoj Scolnik flugis hejmen laŭ Nov-Zelando kaj Paska Insulo.—Tom Donnelly.

REDCLIFFE: Antaŭ 2 monatoj, S-ro Vic. Clarke alparolis 40 junulojn ĉe kunveno de la Apex Klubo; ili montris

grandan intereson. S-rino Clarke prelegis al la "Civilia" Widows Guild. Ankaŭ ĉeestis la aŭstralia poŝtministro, Rt. Hon. Alan Hulme kun edzino, kaj S-ino Houghton, edzino de la parlamentano por Redcliffe kaj multaj konsilantoj.

S-ino Styles, kiu laboras en la urba biblioteko renkontas multajn kiuj demandas pri Esperanto. Ŝi disdonas multajn "verdajn kartojn".

ROCKHAMPTON: Laŭ longa raporto en la "Rockhampton Morning Bulletin" Esperanto estas nuntempe instruata al 25 lernantoj de la ŝtata linceo fare de la Prezidanto, S-ro N. W. Russell. Ŝi ankaŭ uzas la lingvan laboratorion.

La ĝenerala kunveno elektis: Prez. S-ro N. W. Russell; Vic-Prez: S-roj J. Moore kaj W. G. Dunbar; Sekr. F-ino Deslej Davies; Kasisto: F-ino D. Neddrie; Bilbotokeo: F-ino J. Turner; Sekr. por amuzaj aferoj: S-ino Y. Rayer.

Entute ni jam dissendis 60 bumerangojn al 25 landoj, kies profito iros al la Societo St. Vincent de Paul. E-klasoj daŭras ĉiujauĉe en la ĉambroj de la Plenkreskula Asocio. — J. Moore.

MILITISTA ALVOKO

Supozinde kun iom da espero, Majoro H. W. R. Petersen, Komisiito por Militista Terminaro, 180 Onepu Rd., Lyall Bay, Wellington, N.Z. petas kunlaborantojn por tiu Terminaro. Kompreneble estus bonvenaj "parolantoj de ĉiuj lingvoj, sed nepe de la Angla, Rusa, Germana kaj Franca, kun specialistoj ĉiubranĉaj de la armeo."

Ni atentigas, ke jam aperis: Armea Terminaro (Jarlibro UEA, dua parto 1940: E. Durrant, DBEA. Recenzo "B.E." 1/41.) Militista Vortareto, kvinlingva (UEA 1955) de multaj kompilintoj. Recenzo "B.E." 11/55). American Esperanto Magazine, n-roj 5-8, 1964.

Ĝisdataj Informoj Pri Grupoj

Sydney: Esperanto House, Lawson St., Redfern. Lunde: Tel. 95-6357.

Manly: S-ino M. Duncan, 119 Bowen St. 97-5163.

Melbourne: Esperanto House; 12 The Crofts, ĉe Punt Rd., Richmond. Lunde: 46-1215.

Brisbane: S-ro H. V. Petley, 32a Lindsay St., Toowoomba.

Perth: S-ino R. McGrath, 41 Reynolds Rd., Mt. Pleasant. 64-2339.

Adelaide: F-ino W. Addis, 8 Tennyson St., Medindie 5081.

AŬSTRALIA PRONONCADO

Estas rimarkinda la unuformeco de la prononco Aŭstralia, konsidere ke la lando estas tiel tre vasta. Iuj pretendas rimarki, ke Sud-Aŭstraliano parolas iom distinge diference ol Kvinlandano. Tio estas dubinda tamen ankoraŭ oni ne funde esploris la aferon. Estas pli firmaza diro, ke mankas atesto, ke ekzistas lokaj parol-varioj en la Aŭstralia parolmaniero. Tio forte kontrastas kun ĉiu alia Angleparola lando. En Anglujo estas tre malsamaj parolformoj inter limo de areo malgranda; simile en Usono kaj Kanado. En Sud-Afriko la influo de la Afrikansa estas fortega.

En Aŭstralio mankas ankaŭ klas-"dialektoj". Male, en Anglujo la soci-klasojn kaj-nivelojn oni povas rimarki per la parolnuancoj kaj lingvaĵo. La parolo estas insigno de socia stato, edukiteco aŭ ĝia malesto. Certe en Aŭstralio tio estas malpli rimarkebla, ĉefe pro ke la Aŭstralia socio ne disvolviĝis sammaniere kiel la Angla. En Aŭstralio la parolo de plej eminenta legisto aŭ ŝtatestro ofte estas nedistingebla de tiu de ministro aŭ farmlaboristo, escepte nur per la vortoj, kiujn ili elektas. Troviĝus butik-servistinoj, kiuj parolas en maniero, kiu tuj impresas la aŭskultanton per sia poluro kaj klaro. — "Current Affairs Bulletin," vol. 10, n-ro 9/1952.

[Pri la dua paragrafo estas aldoninde, ke la "kvalito" de prononco, bela tonuanco kaj klare belsone esprimita lingvaĵo forte varias ĉe: parlamentanoj, radiokaj TV-parolantoj profesiaj. Kelkaj parlamentanoj sone kaj tone parolas neniel diference ol haven-laboristoj, inter kiuj troviĝus homoj pli kapablaj paroladi elokvente, klare kaj koncize ol niaj elektitaj elituloj. Eble la plej proksima norma lingvaĵo ankoraŭ audiĝas de el la predikejoj, pro tio ke la klerikoj devas fari kurson de la predik-arto. Tamen ankaŭ tiu disciplino ne tute sukcesas forigi la ennaske propran "melodion" el la voĉoj de Skotaj, Kimraj kaj Nord-Anglaj pastroj.

Estas jam klarevidente, ke TV kaj radio tute ne forigis la Anglajn, Usonajn k.a. dialektojn, parol-apartajojn, idiomaĵojn kaj voĉtonojn; kaj bone. Aŭskultadi la velurajn vibroj de la lokaj kaj landaj idiomaj ankoraŭ por multaj el ni restas konstanta ĝuo. — Red.]

Enriko estas en malsanulejo. Li enamiĝas al flegistino. Fine li riskas ŝin demandi: "Bonvolu diri al mi, kion mi donu al vi, por ricevi kison de vi?" ... "Kloroformon!"

PARALLEL TRANSLATION

DON QUIXOTE. Cervantes' great, ironical, romantic story is written in a style so noble, so nervous, so humane, so branded with reality, that "the mere touch and impact of it puts courage into our veins". It is not necessary to read every word of this old book. There are tedious passages. But never to have opened it; not to have caught the tone, the temper, the terrible courage, the infinite sadness of it, is to have missed being present at one of the "great gestures" of the undying, unconquerable spirit of humanity. — J. C. Powys.

In a certain parliament there was a lively debate; attack followed attack, until finally one of the members made an offensive remark: 'H'm, it's clear that half those present are mad!'

This caused a great stir. The Speaker swung the bell, called the offender to order and insisted that he withdraw his remark. After some hesitation the member stood up and solemnly declared: 'I regret my remark; it is not true. On the contrary, I must come to the conclusion that half of those present are not mad'.

DON KIĤOTO. La granda, ironia, romaneca rakonto de Cervantes estas verkita en stilo tiel nobla, tiel vigle-esprima, tiel homeca, kaj tiel klare karakterizita je la realeco, ke "la nura tuŝo kaj kontakto kun ĝi metas kuraĝon en niajn vejnojn". Ne estas necese, legi ĉiun vorton de tiu malnova libro. En ĝi troviĝas tedaj partoj. Sed ne malfermi ĝin, ne kapti ĝian tonon, humoron, teruran malmimon kaj senliman malĝojon —tio signifas malesti ĉe unu el la "grandaj faroj" de la senmorta, nevenkebla spirito de la homaro.

En unu parlamento estis vigla debato, atako sekvis atakon, ĝis fine unu el la parlamentanoj faris la ofendan rimarkon: "Ho, mi vidas, ke fakte duono de la ĉeestantaro estas freneza?"

Granda bruo ekestis, la prezidanto svingis la sonorilon, admonis la ofendinton al ordo kaj postulis, ke li reprenu sian rimarkon.

Post iom da hezito la parlamentano ekstaris kaj solene deklaris: "Mi bedaŭras mian rimarkon; ĝi estas malvera. Kontraŭe mi devas konstati, ke duono de la ĉeestantaro estas nefreneza . . ."

A.E.A. BOOK SERVICE

"Ekspedico Kon-tiki" (Thor Heyerdahl) \$3.50
 "Taglibro de Anne Frank" \$2.50
 (Tradukis G. J. Degenkamp)

La Nova Testamento (Bindita) .90c
 Hinnaro Esperanta (Broŝura)
 5-a eld .85c

Order from A.E.A. Book Service,
 10 Sumersett Ave., Oakleigh South,
 Vic. 3167.

LA UNUA A.E.A. ?

Cu iu povas konfirmi la daton en kiu fondiĝis la unua Aŭstralia E-o Asocio. "British E-ist", Jan. 1912, sub nomo de J. Lyall, asertas, ke ĝi fondiĝis ĉe la Unua Land-kongreso en Adelajdo 1911. En la Centjara numero de The A.E. la dato donita estas 1918. Alia dato menciita estas 1915. Sur p. 50 (Nov.-Dec. 1951) de La Rondo "1905" estas prezeraro. La tiutempa kredo de la redaktoro estis, ke tio devas esti "1915". Kelke da linioj sube "1940" devas esti: Okt. 1937.

J. L. COBBIN

Tre frua E-isto Aŭstralia. En 1889 li skribis en St. Leonards, Sidnejo al Londona gazeto "The Office", varme aprobante E-on, pri kiu li legis skizon en tiu gazeto. Li poste skribis, ke li jam "lernis la lingvon, sen studi ĝin" kaj intencis sendi leteron al "ĝia klera aŭtoro."

S-ro C. W. Ballard (1868-1954), la unua red. de La Suda Kruco, informis, ke li korespondis kun Cobbin dum 1887-91. Cobbin redaktis stenografian gazeton en Sidnejo (1888), ofcis en la Civila Servo Sudafrika kaj ĉe The Sydney Morning Herald. Li mortis en 1897 ĉe Kap-Urbo, Sudafriko. ("B.E.", Aug. 1932).

REINITS KAJ RITZ

En La Adresaro de D-ro Zamenhof, serio 2 (1889-1892) aperas la nomoj de D.G. Reinit kaj Herman Ritz; iliaj numeroj — 1394, 1397. Ili do estas la unuaj Aŭstraliaj E-istoj registritaj. Estas interese, ke al "La Suda Kruco" kontribuis la pra-pioniro Reinit la fabelon: La Sep Mallaboruloj (Aŭgusto, 1926).

Ambaŭ viroj loĝis en Mt. Victoria, N.S.W.

RECENZOJ

Konciza Historio Pri la Kornvala Lingvo kaj Ĝia Literaturo: de G. H. Sutton. 16 p. broŝ. 4/8p. Angla plus 4 p. sendkosto. Ĉe B.E.A. per agente nia.

La Kelta lingvogrupo: la Gaela (Irlanda, Skot-gaela, Manksa) kaj la Bretono, (Kimra, Bretona, Kornvala). En 1901 oni fondis Societon por revivigi la Kornvalan kiel parolatan, per eldono de taŭgaj tekstoj.

En 1904 aperis lernlibro, kies aŭtoro Jenner estis la unua, kiu ĝin povis paroli post la morto de la lingvo en 1777. La societoj federigis en 1920. En 1968: ĉ. 3000 membroj kaj revuo. En 1929 eldoniĝis lernlibro "por moderna uzado". Sekvis aliaj; la plej ĝisdata en 1962. Kompletiga eldono de A-Kornvala vortaro: 1955. Aperadas Kornvalinga revuo kvaronjara.

Jam de 1962 oni havas ekzamenojn: meze 25 personojn ĉiujare. En Truro: en la Kornvala Somera Lernejo oni ĝin instruas al ĉe-ĉeantoj.

Kial Kornvalanoj ĝin lernas? Ne pro neceso, sed nur pro kultura deziro — ĉar ili estas Kornvalanoj!

Mirinde informa libreto, kiun riĉigas ankaŭ bona bibliografio kun mapo. Kornvaligo de la Enkonduko ebligas interesan lingvan komparon.

E-istoj simpatias kun homoj luktantaj savi sian lingvon. Ili, ankaŭ ni, batalas inercion, monmankon, antaŭjuĝemon — spite tion gajne aliras paŝon post paŝo. Tamen restas multo stude farendi. Oni bezonas alte klerajn filologojn, kiuj prenis sur sin la taskigon meti la Kornvalan lingvon sur la saman studnivelon, kie sin trovas aliaj Europaj lingvoj.

Lingve tre bona, ankaŭ teknike dank' al The Blackburn Times.

... mi esperas, ke la scivolemo de fakuloj, kiuj iam dezirus labori por plialtigi la studnivelon sur kiu nuntempe troviĝas la antikva kornvala, estos vekita". Prefere: Metu "estos vekita" tuj post "ke" (mi esperas, ke estos vekita la scivolemo ...).

Germana Demokratia Respubliko: bildoj kaj faktoj. 256 paĝoj. Riĉe ilustrita ankaŭ per koloraj fotoj.

Artisme kaj teknike belega libro. okulfrapa pro sia impona amplekso kaj kompleta aranĝo. Ĝi povas servi kiel antidoto al ekstretoj en alitendencaj tekstoj. Sed lastatempe rimarkeblas en gazetoj burĝonanta agnosko pri la industria graveco kaj socia progreso en G.D.R.

La libro ne informas pri tio: ĉu virinoj ricevas salajron egalan al la vira kondiĉo ke ili plenumas plen-kontentige tiun saman laboron mensan aŭ korpan? Supozinde ili ne tion ricevas, ĉar ili ricevas krom-bonaĵojn forme de aparta liberempo, ripoz-periodoj k.s. pro sia virineco kun ties pro-naturaj "malavantaĝoj". En Aŭstralio oni nun varme diskutas la demandon.

Tolerecon pri la religio atestas la p.m. de la Madono kun Infano; sampaĝe aperas bonega p.m. pri Karl Marx. Ĉu tia frapa kontrasto en mondokonceptoj parolas pri kultura kaj filozofia vast-horizonteco?

Pres-libereco. "ne estas permesite misuzi la rajton pri libera opiniesprimo" En komparata libro — "Faktoj pri Germanujo (Fed. Resp. Germ.)" — oni simile legas: "politikaj partioj . . . devas konformi al principoj demokratiaj . . ." (tio inkludas ankaŭ la gazetojn).

Bona E-ajo. Generale fluegebla por ĉiu E-adepto. Unu vorto: "La rajtoj . . . nek estas **motivitaj** nek limigitaj". Preferinda estus pli klarsena vorto.

"KOSMO", n-ro I revuo de Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Copenhagen F. 24 p. 2 dol. Kvaronjara.

Metafizike humanisma laŭ mondpercepto, la revuo suplementas la bel-n serion da libroj, kiujn jam eldonis tiu instituto.

En "Adiaŭ al 1968" la temo tuŝas la krimojn kontraŭ la homaj rajtoj — Nigero-Biafro, la Ĉeĥoslovakia krizo, la ruĝ-gardismo Ĉinia, la milit-krimoj en Vjetnamo, ekstermado de Sudamerikaj Indianoj, la rasa diskrimino en Usono kaj la ĝlobvasta reago de studentaj ribeloj tra la mondo

"La homaj rajtoj estos jam respektataj . . . nur post pluraj miljaroj (proks. 3000) . . . Nur post miliard-jara evoluo la homo atingis la nuna stadion en sia kreigo. Mezurante per tiu ulno, oni devas atendi nur treege mallongan tempon, relative, antaŭ ol la plenumado de la homaj rajtoj jam fariĝos tute natura, enaska elemento de la homo".

En n-ro 2 aperas "Mirinda Mondo", pri strangaj insektoj, bestoj.

Teknike perfekta, mistike pens-plekta.

Fervoja Terminareto — Esperanta-Hungara; Hungara-Esperanta. Poŝformata, 144 p. Magyar Eszperanto Szovetseg, Nepkoztársaság utja 73-75, Budapest VI.

"Brolgo": Legendo Indígena. Poemo de Minnie Filson; proze tradukita de "Revanto" (Sidneja E-isto). 12 p. Dek cendoj. Mimeografita. Ce E. W. Chandler, 57 Northcote St., Crow's Nest, 2065.

La aŭtorino, ostomalsanulo, amiko de E-o, fekundas poemojn. "Brolgo" plurfoje aperis programe ĉe la ABC kaj troviĝas en poem-antologioj Aŭstraliaj. Per sia poemo ŝi evidentiĝas sian intiman partoprenon en la anima kaj pens-eta viva de la indigena popolo.

Brolgo, amikema birdo, estas speco de gruo; alinome "Native companion" (kamarado de indigenoj).

Brave bona entrepreno en la kampo de sendependa eldonado.

"Klerigo", organo de A.I.E.A. Util: prieduka gazeto. 1 dol. jare. Mendebila ĉe S-ro Chandler. N-ro 35 enhavas ankaŭ interesan, amuze progresigan vortludon (John Moore).

"OOMOTO"

Tiu Japane eldonata revuo, tute en Esperanto, estas malkara — nur 1.60 poi ses numeroj jare. Ĝi vigne vivis tra jam kvar jardekoj, donante interese kulturan legajon. 30-paĝa sur bona papero. Peranto, la Redaktoro de The A.E.

HUMPHREY TONKIN

prez. de TEJO, nin rememorigas, ke Zamenhof estis junulo, kiam li kreis Esperanton, kaj ankaŭ Lapenna estis junulo, kiam li unue organizis E-agadon. Subteno do la junularon. kiel Patrona Membro de Tutmonda E-ista Junulara Organizo, 16 guldenoj.

Membroj ricevas la bultenojn kaj gazeton "Kontakt". Peras Ken Linton.

ALVOKO AL AMIKOJ

Studento ĉe Universitato Karel (Praha) petas interŝanĝon de E-ajoj, Anglalingvaj sciencaj aŭ artaj libroj kaj diskoj eldonitaj en Ĉ.-S. kontraŭ similaj Aŭstraliaj, laŭ interkonsento. Ivo Zelezny, Vrchlickeho 41/493, Praha 5.

ADAM ZAMENHOF

En artikolo (Sidneja "Daily Mirror") antaŭ kelke da jaroj la aŭtoro sugestis, ke la gepatroj nomis sian unuan filon Adam, ĉar por ili li simbole reprezentis la novan eraon, la novan generacion — la novan homon. F-ino. M. Boulton komentis en sia "Zamenhof": "Feliĉe estis, ke la gepatroj ne suspektis, kia kruelega ironio kaŝiĝis en tiu paradiz-elvoka nomo". Li estis mortpafita en 1940 de Germanoj. ("Brit. E-ist" 11/46.)

NEW SOUTH WALES ESPERANTO FEDERATION

Nia 10a Konferenco kaj 2a Jarĉefmanĝo okazis sabaton 18/10/69 en la Hotelo Manly.

La aferkunvenon malfermis la prezidanto je 2.30ptm. Li bonvenigis 19 anojn kaj 1 vizitanton.

La Sekretario raportis ke la federacio enhavas 4 grupojn kaj 78 individuojn; 6 novaj membroj aliĝis en 1969.

Reprezentantoj de lokaj grupoj raportis pri progreso de la pasinta kunveno, kaj oni decidis ke la venonta konferenco okazos je Feb. 14/15 1970, eble en taŭga loko sur la norda marbordo apud Forster, anoncota en venonta bulteno.

Poste, nia 2a Jarĉefmanĝo okazis en la Koroborea Cambro. La tabloj estis tre bele aranĝitaj. 44 anoj kaj gastoj ĝuis la feston, eĉ pli grande sukcesan ol la antaŭa. Post kelkaj paroladetoj E-lingve, ni vigne babiladis ĝis reiro hejme. — George Thatcher.

"TRA SOVETA UKRAINO"

N-ro I. Riĉa fasko da prozaĵoj, poemoj, historiaj kaj politikaj informoj, tradukitaj el la Ukraina. 52 grandaj paĝoj. Ĝi estas senpaga, sed la stokoj estas limigitaj. Petu tuj ekzempleron ĉe Ukraina Societo de Amikeco, Kirova 32, KIEV, USSR.

LA DEK-UNIA REGULO

Laŭ tiu Regulo (Cox: p.64): (En vortoj kunmetitaj) la ĉefa vorto staras en la fino. Laŭ tio sekvas, ke la ĝustaj formoj estas "horduono", "kronduono" k.c., ĉar la plena esprimo estas: duono de horo, duono de krono (Angla monero). Ambaŭ formoj estas uzade bonaj (duonhoro kaj horduono). La lasta estas pli severe logika kaj konformas al la II-a Regulo; sed la unuan oni ĝenerale preferas pro ĝia pli vasta internacieco: demi-heure; halfpenny; Halbgroschen.

Simile pri "noktomezo" (mezo de nokto). Ofte troviĝas "meznokto", laŭ internacieco. Tamen, E-istoj kiuj fidelas al la Regulo, uzante la formon "noktomezo", devus konsekvence uzadi ankaŭ aliajn similajn kunmetitojn — penckvarono, kronduono k.c.

La uzado de Zam. ne estas konsekvenca: Marta (2-a eld.) p. 12: "post kvaronhoro . . ."; Fabeloj de Andersen, vol. 3, P. 16: 4 — "ne povis dormi eĉ horkvaronon".

Rimarku, ke bonaj estas: meznombro, mezkvanto, mezepoko, Mezafriko k.s., ĉar ili signifas "meza" = the middle (one) of; average, medium, mid-, sekve adjektivo kvazau fandiĝinta kun sia substantivo —

simile al "grandsinjoro", "finstacio", "dikfingro" (polekso) k.a.

Komparu ankaŭ: duondio, duonpatro, -filo, -frato (Plena Gramatiko, p. 151).

Kalocsay en "Lingvo Stilo Formo" (p. 14, 59) traktas la problemon: La Maskita elizio de Adjektiva Finajo. Li tamen mem uzas: "malgrandnacioj" sur p. 47.

STUDLUDO PRI "TUTO" . . .

Notindaj uzoj: La tuta tiu leĝo (Nombroj 5/30). Estus strange, se oni sangus la vortordon je: La tiu tuta leĝo.

Nur ilian parton vi vidos, la tutan vi ilin ne vidos (Nombroj 23/13). Kiel vi sintakse akordus "tutan" kun "ilin" (singularo kaj pluralo)?

Ĝi ne povas esti tutajgita (cannot be made whole), Jeremia 19/11.

Kiu pozicion oni uzu post "tutaĵo"? Millidge: el. Kabe: de (Plena Vortaro).

Estas diferenco inter "tute" kaj "entute". "Tute" — plene, komplete, senescepte. "Entute" — ĝenerale . . . forlasante la apartajn detalojn.

OLIMPIKO

R. J. Milton en "British E-ist", Okt., pledas por "olimpiko" anstataŭ "olimpikoj" (Wells; P. V.). En tio konsentas ankaŭ Waringhien (olimpiko = olimpiaj ludoj). Oni bezonas la singularon: "la olimpiko de Meksiko; la olimpikoj de Tokio kaj Meksiko". La Rondo: 1/56, 10/56.

VELURO ?

Ekzemplo de la figura uzo de vorto: "Sur la ventro veluro, en la ventro mururo" (Z.) = malsato. Figura uzo de vortoj riĉigas la lingvon, ne ŝveligante la vortarojn. Tamen oni zorgu, ke ĝi estu klare, internacie komprenebla.

CAR STICKERS

People say that they seldom see the word "Esperanto" in public.

The B.E.A. stocks two fluorescent car stickers with the texts: "Do YOU speak Esperanto?" and "Learn the International Language ESPERANTO, a second language for all". To advertise in the press is very expensive, but 8d. for the two stickers could bring the word Esperanto to countless thousands of eyes. Two B.E.A. members brought it to the notice of 12,500 people in one year. If 500 members did the same it could inform over six million that Esperanto is alive — at a tiny cost. What a cheap yet most effective form of advertising. All you need is a car and four pence.

WM. ED COLLINSON

Profesoro, L. K.-ano, mortis en Junio, 80-jara. Multajn jarojn li lektoris en la Univ. de Liverpool pri Esperanto; aŭtoris: "La Homa Lingvo" (1928) kaj la ankorau ne eldonitan: "Civilizo kaj Lingvo".

LINGVA SERVO

Izolitoj kaj memlernantoj, sen kontakto kun instruisto, ofte renkontas lingvajn problemetojn. Por tiuj kaj aliaj la Redaktoro provos respondi laŭ sia kapablo apartajn punktojn de lingvo, historio kaj bibliografio.

Kondiĉoj: Demandantoj devas esti anoj de A.E.A. La demandoj estu esprimitaj klare, nete, koncize. Afrankita koverto estu kunsendita por respondo.

NAMES IN NON-ENGLISH NOVELS

The English-speaking Esperanto reviewer, when treating of certain Esperanto novels, often finds difficulty in following the characters, clothed as they are, for example, with names such as Fyodorovich, Khelestokhov, Pushanshovski. Like wise, Oriental novels with their Shuh Chang-Lin, Kim Tiktok, Lak Wunlung and the like make heavy demand on the memory of a devoted reader. Names such as Artemi Ukhavyortov or Jang Kungchun do not give one the ready mental picture of personality one gets with say, Oscar Oak, Percy Pipchin, Cuthbert Cossey, Gregory Gritjaw, internationally chosen by an English author to reveal something of the aspect or bearing of their fictional owners.

And some of these foreign authors seem almost as prolific as Dickens, with his over 1550 characters, sown densely through the pages.

We would delve back to the days when characters bore really significant cognomens: Guido the Gimlet, Charles the Corkscrew Beowulf the Bradawl, Edwin the Earwig, Rollo the Rumbottle, Hubert the Husky . . . Queen Pyorrhæa, Princess Amenia, Sir Erysipelas, The Honorable Nausea, the Ladies Longtooth and Hernia, Lord Knotacent (of Knotacentium Towers) . . . And, on a lower scale, who has not met the acidulous Mrs. Bedandbrekker?

Demandoj: Estimata redakcio, vonvolu klarigi al mi en via responda fakto: kial mia fianĉino ĉiam fermas la okulojn, kiam ŝi kisas min.

Respondo: Ni konsilas al vi, rigardu vin mem en spegulo.